

Beletra Edeno

neregula beletra bit-revuo n-ro 8 (septembro 2024)



Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj.

Redaktis Vejdo (vejdo@163.com)

Kontribuis Luiza Carol, Hong Jia, Laimundas Abromas, Yin Jiaxin, Nicole Else, Elena Popova, Ĉinhomo, GB 2312, Lin Leming, Mandio, Pipi, Bardhyl Selimi, Liu Hongyuan, Le Le, Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser, Vejdo, Mikaelo Bronštejn, Eto, Rita Mkrťĉjan, Maria Nazaré Laroca, Yi Qiao, Erika Godó, Rovere Emanuele, Yanke, Yan Li, Guozhu, Vilhelmo Lutermano
AI-ilustris John Huang, karikatur-esperantigis Paula Adúriz

Enhavo

Originala prozo

Luiza Carol: La naŭ instruistinoj el Parnaso.....	003
Hong Jia: Nova radseĝo.....	012
Laimundas Abromas: Malfacila interparolo.....	016
Yin Jiaxin: Amo kaj malamo ĉe monto kaj akvo.....	019
Nicole Else: Ĉu mi estas ne normala virino?.....	027
Elena Popova: Ĉeriza vetero, Virino survoje.....	029

Tradukita prozo

Bakin: La paradizo por la birdoj k.a. (trad. Ĉinhomo).....	030
Liu Cixin: Mikroskopa fino (trad. GB2312).....	040
Guy de Maupassant: Kaptitoj (trad. Lin Leming).....	046
Zhao Weiqi: Glavfiŝo de amo (trad. Mandio).....	056
Wang Youyuan: Unu rozo (trad. Pipi).....	059
Iljet Aliĉka: La malgranda viro (trad. Bardhyl Selimi).....	061
Ai Wu: Vintra nokto (trad. Liu Hongyuan).....	067
Yang Shuo: Liĉia mielo, Odo al kamelifloroj (trad. Le Le).....	069
Fratoj Grimm: Fraĉjo kaj fratinjo (trad. Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser)	074
Chiung Yao: En profunda korto (9) (trad. Vejdo).....	079

Originala poezio

Mikaelo Bronŝtejn: Por la trikvaronjarcenta naskiĝtago.....	086
Eto: Mi havas propran liberecon, Vento en majo.....	089
Rita Mkrtĉjan: Aŭtuno, Aŭtuna folieto.....	092
Maria Nazaré Laroca: Trairado k.a.....	096
Yi Qiao: Aforismoj k.a.....	099
Erika Godó: Ke vi ĉiam restu kiel infano k.a.....	103
Vejdo: Saĝa ŝafido k.a.....	105

Tradukita poezio

Rovere Emanŭele: Kisu min multe k.a.....	112
Jean de LA FONTAINE: La grilo kaj la formiko k.a. (trad. Luiza Carol)	116
Bai Juyi: Rakonto pri bivoludistino (trad. Yanke).....	118
Teatro	
Ni Ming: Vi estas mmia okulparo (reverkis Yan Li).....	122
Artikolo kaj eseo	
Guozhu: Kiu estas Gulik?.....	133
Rita Mkrtĉjan: Esperanto en ni, aŭ ni en Esperanto?.....	139
Vilhelmo Lutermano: Evoluo de Ĉinio signifas evoluon de ĉiuj triamondaj landoj.....	142



John Huang, prezidanto de internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) nordamerika, ĉefredaktoro de la revuo "La Merkato", estas ĉina-kanada esperantisto kaj komercisto. Li estas la oficiala fotisto por du sinsekvaj Universalaj Kongresoj en 2022 kaj 2023. Li esperantistiĝis jam en la 1980-aj jaroj kaj aktive partoprenis multajn Esperanto-agadojn en la sekvaj jardekoj. Li faris la AI-bildojn de ĉi tiu numero de Beletra Edeno.

Foto sur la kovrilo: *La ĉefa kongresejo de la 109-a UK, Aruŝo, Tanzanio, fotita de John Huang*



Karikaturoj esperantigitaj de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Luiza Carol (Israelo)



aŭtorino, Luiza Carol

La naŭ instruistinoj el Parnaso

Scienc-fikcia rakonto laŭ grekaj antikvaj legendoj

Antaŭ tre longe

Antaŭ miloj da jaroj, kiam la historio de la homaro apenaŭ komenciĝis, la Teron vizitis aliplanedanoj, kiuj similis homojn. Iliaj korpoj estis ĉiam junaj kaj belaj, krom kiam ili intence volis igi sin aspekti kiel abomenindaj monstroj, por timigi la homojn. Ili nek maljuniĝis, nek malsaniĝis, nek sentis fizikajn dolorojn. Ili kapablis vojaĝi facile kaj rapide inter planedoj kaj galaksioj. En ilia komunumo, la nivelo de la scienco estis miloble pli alta ol la iama nivelo de la antikvaj homoj sur la Tero. El multaj vidpunktoj, iliaj sciencaj konoj kaj ilia teknologio ege surpasis eĉ niatempan kulturon. Iliaj karakteroj similis tiujn de la teranoj. Do, tiuj aliplanedanoj kapablis mensogi, envii, avari, ekkoleri, kalumnii, ŝteli, murdi ktp. Sed ili kapablis ankaŭ ami, kompati, entuziasmiĝi pri io bela, malavari, sincere amikumi, helpi, teni siajn promesojn ktp. La rilatoj inter tiuj aliplanedanoj kaj la antikvaj teranoj estis tre diversaj. La aliplanedanoj ofte uzis hipnozon, kiel metodon por influi homajn sentojn, pensojn kaj agadojn. Ŝajnas ke tamen ili ne povis uzi la saman metodon por influi unuj la aliajn, do ene de ilia komunumo aperis oftaj konfliktoj. Iliaj hipnoz-influo estis kelkfoje bonefikaj, aliffoje malbonefikaj por la koncernaj homoj. La aliplanedanoj kapablis fariĝi nevideblaj per la homaj okuloj, kiam ajn ili deziris. Ili ankaŭ kapablis aliformiĝi en aliajn estaĵojn por atingi siajn celojn.

Ŝajnas ke nun, tiuj aliplanedanoj ne plu troviĝas sur la tero. Oni ne scias, ĉu ili forlasis nian planedon definitive. Eble parto el ili revenos aŭ jam revenis. Iuj supozas, ke ili eĉ ne foriris, sed decidis kaŝi sin pro diversaj kialoj... Cirkulas centoj da rakontoj pri tiuj aliplanedanoj kaj miloj da supozoj. La antikvaj homoj nomis ilin

“dioj” kaj “diinoj” kaj dediĉis al ili belajn templojn, el kiuj multaj daŭre konserviĝas.

La naŭopo

Ĉi tie mi rakontos pri tre famaj antikvaj aliplanedanaj instruistinoj, kiuj laŭ onidiroj loĝis antaŭ tre longe sur la greka montaro Parnaso. Ili estis naŭ fratinoj, tre talentaj kaj sentemaj. Ili klopodis instrui al la antikvaj teranoj diversajn artojn kaj sciencojn, por ke la vivo sur la Tero fariĝu pli bela kaj la homoj fariĝu pli sentemaj. Ili iniciatis individuajn lecionojn kaj elektis siajn lernantojn laŭ kriterioj kiujn la homoj nek konis nek povis influi. Neniu lernanto estis invitita viziti ilin ĉe ilia mistera montara loĝejo. La fratinoj mem decidis kiun kaj kiam viziti. Ilia propra metodo de instruado oni nomis “inspiro”, kaj la naŭ instruistinoj oni nomis ankaŭ “inspiristinoj” aŭ “muzoj”.

La patro de la inspiristinoj estis Zeŭso, la ege potenca reĝo kiu regnis super la diaro kaj la homaro. La patrino de la inspiristinoj oni nomis Mnemozino (“La Memoriga”), ĉar ŝi scipovis signife influi la memorkapablojn.

La naŭ fratinoj nek kapablis nek deziris “inspiri” iun ajn kontraŭ ties volo. Fakte la homoj plej ofte petegis la favoron fariĝi iliaj lernantoj, sed nur malmultajn ili akceptis. Ĉiu ajn el la naŭ inspiristinoj havis siajn apartajn talentojn, siajn proprajn kompetentojn kaj siajn prioritatajn spertojn. Laŭ tiuj specifaj spertoj, ili dividis inter si specifajn pedagogiajn taskojn. Ili ĉiam kunlaboris tre efike, tial ili fariĝis brila imitinda ekzemplo de harmonia teama laboro.

Erato, Polimnio kaj Kaliopo

La naŭ inspiristinoj bone konsciis pri la graveco de poezio koncerne la evoluon de la homa spirito. Tial, tri el ili elektis instrui poezion. Tiuj klopodis igi la homojn esprimi sin klare kaj bele. Kiam oni klopodas esprimi sin pere de vortoj, la pensoj pliprofondiĝas kaj la emocioj nuanciĝas. Tio signifas, ke la poeziema triopo multege helpis la homaron maturiĝi.

Unu el tiuj inspiristinoj ŝatis instrui pri verkado de ampoemoj, tial oni nomis ŝin Erato (“La Aminda”). Alia inspiris la homojn verki himnojn pri vivoĝojo kaj danko al la dioj, tial oni nomis ŝin Polimnio (“La Himnara”). Alia inspiristino, kiun oni nomis Kaliopo (“La Belvoĉa”) pro ŝia ĉarma voĉo, kutimis instrui pri eposoj rilatantaj al heroecaj agoj kaj al filozofio.

Iom post iom, la lernantoj de Erato, Polimnio kaj Kaliopo komencis esprimi sin ne nur pere de versoj, sed ankaŭ pere de artecaj prozaĵoj. Pere de ĉiuj literaturaj ĝenroj (poemoj, rakontoj, teatraĵoj, eseoj) la homoj kutimiĝis imagi paralelan mondon, pli

interesan kaj sencoplenan ol la reala. Tio instigis ilin doni sencon al siaj propraj vivoj kaj riĉigi siajn vivospertojn. Verkante kaj legante beletraĵojn, la homoj komencis ankaŭ filozofumi.

Multaj lernantoj de Erato, Polimnio kaj Kaliopo kutimiĝis ankaŭ pentri aŭ skulpti siajn mensajn imagojn. Iuj aliformis siajn ampoemojn en pentraĵojn aŭ skulptaĵojn pri siaj amatoj aŭ amatinioj. Aliaj aliformis siajn himnojn dediĉitajn al la potencaj dioj de la tero, la suno, la akvo kaj la aero en pentraĵojn kaj skulptaĵojn pri belegaj pejzaĝoj, bestoj, floroj aŭ fruktoj, ofte en pentritajn aŭ skulptitajn portretojn pri la dioj mem. Aliaj artistoj ilustris famajn rakontojn pri realaj aŭ imagaj eventoj. La tri inspiristinoj konsideris ĉiujn pentraĵojn kaj skulptaĵojn kiel videblajn kaj tuŝeblajn poemojn kaj prifieris inspiri ilin.

Oni deklamis aŭ kantis ampoemojn kaj eposojn dum geedziĝ-festenoj. Tiam oni ĝuis belaspektajn frandaĵojn kaj bonodorantajn trinkaĵojn, kiuj bonhumorigis la festantojn kaj helpis ilin fariĝi pli kaj pli kreemaj. La gastigantoj preparis tiujn festenojn pacience, entuziasme kaj kun granda amo, por plezurigi la novajn geedzojn kaj la gastojn. Erato kaj Kaliopo konsideris tiujn artecajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn kiel videblajn, tuŝeblajn, flareblajn kaj gustumebajn ampoemojn kaj eposojn. Dum tradiciaj religiaj festoj, oni pensis pri la potencaj dioj kapablaj helpi aŭ malhelpi la vivon de la homoj. La vortoj de la himnoj esprimis la homan deziron pri bona vetero, pri bona rikolto kaj pri sano. La kortuŝaj preĝoj kaj dankesprimoj okazis ĉirkaŭ bele dekoraciitaj tabloj plenaj je bongustaj bonodorantaj manĝaĵoj. Kaj tiuj frandaĵoj fariĝis ĉiujare pli kaj pli evoluitaj. La homoj kuiris pli kaj pli bonguste kaj samtempe pli kaj pli sanige, plibonigis multajn speciojn de fruktoj kaj legomoj, elpensis novajn receptojn... Tiamaniere, la homoj bone konsciis pri la sankta energio kiun oni ricevas de la tero, suno, akvo kaj aero.

Polimnio konsideris tiujn artecajn frandaĵojn kiel videblajn, tuŝeblajn, flareblajn kaj gustumebajn danko-himnojn, dediĉitajn al la dioj de la tero, de la suno, de la akvo kaj de la aero. Ŝi estis fiero ke ŝi inspiris ilin.

Iom post iom, la poemeca pensmaniero komencis integriĝi en la ĉiutagan vivon de la homaro.

Sed, kiam Zeŭso observis la agadojn de Erato, Polimnio kaj Kaliopo, lia frunto sulkiĝis pro maltrankvilo...

Eŭterpo kaj Terpsikoro

Du el la inspiristinoj ŝategis muzikumi kaj danci. Plej ofte ili instruis duope. Kvankam ambaŭ kapablis kaj muzikumi kaj danci, unu el ili preferis muzikon. Tiuj

ĉi kantadis, muzikludadis aŭ aŭskultis muzikon ĉiutage ekde vekiĝo ĝis enlitiĝo kun plezurego, tial oni nomis ŝin Eŭterpo ("La Muzikema"). La alian oni nomis Terpsikoro ("La Dancema"), ĉar ŝi prioritatis dancon. Eŭterpo helpis siajn lernantojn krei kantojn prezenteblajn unuope aŭ koruse. Terpsikoro elpensis diversajn ritmojn, paŝmanierojn kaj stilojn de movado, kiujn la lernantoj efektivigis unuope aŭ grupe.

Erato, Polimnio kaj Kaliopo bonvole helpis pliriĉigi iliajn muzikajn kaj dancajn kreaĵojn per artecaj vortoj, taŭgaj juveloj kaj vestaĵoj.

Tamen, kiam Zeŭso observis la agadojn de Eŭterpo kaj Terpsikoro, lia vizaĝo ombrigiĝis pro malkunsento...

Talio kaj Melpomeno

Alia duopo estis Talio ("La Floranta") kaj Melpomeno ("La Melodia"). Ili ĉiam bezonis unu la alian kaj helpis unu la alian.

Talio estis tiel nomata, ĉar ŝi aspektis ĉiam gaja kiel freŝa floro. Ŝi tre amis florojn, arbojn kaj grenojn, tial ŝi ofte inspiris siajn lernantojn pri agrikulturaj laboroj. Ŝia bonhumoro akompanis la homojn dum festoj dediĉitaj al semado aŭ rikoltado, samkiel dum festenoj planitaj okaze de gajaj eventoj, kiel ekzemple geedziĝoj aŭ naskiĝoj. El ĉiuj inspiristinoj, Talio posedis la plej multenombrajn kaj diversajn talentojn. Talio helpis la homaron irigi la grundon kaj obteni pli kaj pli multajn bongustajn kaj sanigajn fruktojn, legomojn kaj grenojn. Ŝi estis spertulo pri geometrio kaj arkitekturo, tial ŝia ĉeesto ĝojigis sciencistojn, inĝenierojn kaj laboristojn kiuj elpensis kaj realigis ŝoseojn, pontojn kaj domojn. Talio kutimis stimuli kaj la raciemon kaj la emociemon de la homoj. Ŝi estis ege amata precipe pro tio, ke ŝi inspiris al siaj lernantoj la kapablon kompreni la ĝojojn de aliuloj, kune kun la deziro kundividi siajn ĝojojn. La homoj inspiritaj de Talio fariĝis ŝercemaj kaj gajaj, ĉiam pretaj igi aliulojn ridi aŭ rideti. La humuro kiun Talio inspiris estis bonintenca kaj saniga, tute senmalica.

Melpomeno ricevis tiun nomon, ĉar ŝi havis fascinan voĉon, per kiu ŝi inspiris al la lernantoj la kapablon kompreni kaj kompati suferantajn aliulojn. La tristeco kiun ŝi inspiris, vekis en la homoj la deziron helpi la malfeliĉulojn aŭ almenaŭ kuraĝigi tiujn. Melpomeno ankaŭ ŝategis ludi liron kaj iuj eĉ supozas, ke estas ŝi kiu inventis tiun ĉarman muzikilon. Ŝiaj bonkoreco kaj kunsentemo akompanis la homojn dum ties tristaj momentoj, kiel ekzemple dum funebraj tagoj aŭ kiam okazis grandaj malfeliĉoj.

Talio kaj Melpomeno ŝategis aktoradon kaj deklamadon. Ili kutimis kunlabori kun Erato, Polimnio kaj Kaliopo. Nur imagu, kiom enuigaj estintus ajnaj beletraĵoj, kiuj nek vekus en vi senton de kompato nek amuzus vin... Sen Talio, la vivo estintus

griza kaj senĝoja, sed sen Melpomeno mankintus amo, do la tuta vivo estintus sensenca. La homaro bezonis ilin ambaŭ por akiri animan ekvilibron.

Talio kaj Melpomeno kunlaboris brile okaze de longaj spektakloj, kiuj okazis en belaj amfiteatroj. Por tiuj tre popularaj eventoj, Melpomeno inspiris tragediojn kaj Talio inspiris komediojn. La spektantoj aprezis tiujn spektaklojn kaj partoprenis ilin amase. Geniaj verkistoj prezentis siajn verkojn sur tiuj scenejoj. La publiko estis entuziasma, reagis kun granda intereso, ploris aŭ ridis kune kaj komentis kun pasio.

Malgraŭ tio, kiam Zeŭso observis la agadojn de Talio kaj Melpomeno, liaj okuloj malheliĝis pro malkontento...

Uranio kaj Klio

Uranio ("La Ĉiela") kaj Klio ("La Raportema") estis inspiristinoj kiuj kompletigis unu la alian kaj multe dependis unu de la alia. Uranio kaj Klio, samkiel Talio, stimulis tre multe la racion de siaj lernantoj, dum la aliaj fratinoj stimulis precipe la emociojn kaj la sentojn.

Uranio ŝategis precipe okupiĝi pri astrologio kaj astronomio, tial ŝi ricevis sian nomon. Pere de astrologio, Uranio scipovis malkovri multajn sekretojn pri la estonteco. Ŝi kapablis antaŭvidi gravajn eventojn kaj konsili la homojn kiel agi por preventi malfeliĉojn aŭ por ne misitafi siajn ŝancojn pri feliĉo. Nur al tre malmultaj speciale elektitaj lernantoj, ŝi konsentis inspiri la raran kapablon antaŭvidi la estontecon. Tiu kapablo estis samtempe arto kaj scienco, kaj postulis apartan denaskan inklinon. Uranio ankaŭ inspiris siajn lernantojn malkovri leĝojn de matematiko, kemio kaj fiziko, por kompreni kiel moviĝas la planedoj kaj la steloj. La evoluo de la sciencoj helpis ankaŭ al la kreado de pli kaj pli belaj kaj fortaj konstruaĵoj. Interalie, oni konstruis amfiteatrojn por longaj teatro-spektakloj. La inspiristinoj ĉeestis naŭope tiajn spektaklojn kaj prifieris pri siaj lernantoj. La harmonia kunlaboro inter la naŭ instruistinoj, helpis la homojn aprezi la ekvilibron inter raciemo kaj emociemo. Ekzemple, homoj kutimiĝis admiri ne nur la fascinan belecon de la steloplana ĉielo, sed ankaŭ la perfektan kongruecon inter ĉiuj fizikaj leĝoj kiuj gvidas la stelojn kaj la planedojn. Tiel la teranoj komencis jam revii pri kosmaj vojaĝoj...

Klio, la plej aĝa el la naŭ fratinoj, inspiris al siaj lernantoj la kapablon esplori kaj kompreni la historion de la homaro, samkiel la kapablon priskribi la gravajn eventojn akurate, klare kaj fidele. Ŝi helpis siajn lernantojn selekti el inter multegaj ĉiutagaj eventoj ĝuste tiujn, kiuj vere gravas kaj indas esti menciitaj en historiaj libroj, por

ke la sekvaj generacioj povu ekscii la veron pri la spertoj de siaj antaŭuloj. La historiaj verkoj inspiritaj de ŝi provis veki en la animoj de la legantoj admiron kaj imitemon rilate al valoraj sciencaj kaj artaj realigoj aŭ al noblaj sociaj agadoj, kiuj estis okazintaj aŭ ĝuste okazantaj. Samtempe, ili vekis la kritikemon koncerne erarojn kiujn la homaro estis farinta aŭ faranta kaj la deziron neniam ripeti la samajn erarojn. Iom post iom, la eventoj kiujn la historiaj verkoj priskribis fariĝis famaj kaj la herooj okazigintaj tiujn eventojn fariĝis same famaj. La plej bonaj sciencistoj kaj artistoj kaj iliaj kreaĵoj fariĝis pli kaj pli bone konataj kaj multaj homoj volis imiti ilin. Honesteco estis la ĉefa virto kiun Klio fortigis en la homaj animoj. Onidire ŝi estis la plej filozofiema el la naŭ fratinoj, ĉar ŝi konis gravajn sekretojn pri la pasinteco, laŭ kiuj ŝi povis helpi la homaron modli sian estontecon.

Klio kaj Uranio kompletigis unu la alian: sen bona kompreno de la pasinteco, oni ne povas imagi la estontecon; sen ajna mensa imago pri la estontecon, oni ne povas kompreni la signifon de la pasintaj kaj de la nunaj historiaj eventoj.

Zeŭso observis la agadojn de Uranio kaj Klio, kaj liaj pugnoj streĉiĝis pro kolero...

La vivo ne iras ĉiam glate

Kutime la dioj konsideris sin mastroj de la homoj kaj kondutis al tiuj laŭ siaj kapricoj. Preskaŭ ĉiam la dioj ordonis al la homoj, punis ties eventualan malobeemon kaj altrudis al ili sian volon. Tute malsimila estis la konduto de la naŭ instruistinoj el Parnaso. Tiuj amis kaj estimis la homojn, neniam altrudis sian volon. Per sia inspir-metodo, la naŭopo provis helpi la lernantojn memlerni, por ke tiuj spertiĝu pri diversaj artoj kaj sciencoj. La homoj admiris la instruistinojn kaj ĉiam bonvenigis ilin. Kiam oni admiras iun tutkore, oni klopodas simili tiun. Do, la homoj strebis fariĝi kiel eble pli saĝaj, pli sanaj, pli kreemaj kaj amemaj danke al la influo de tiuj ĉarmaj estaĵoj. Iom post iom, aperis eĉ homoj kapablaj inspiri aliulojn, ĉar normale tien kondukis ilin ilia deziro imiti la inspiristinojn. Do la naŭopo inspiris ankaŭ la arton kaj sciencon de pedagogio. Tiamaniere, parto el la lernantoj fariĝis instruistoj, kiuj instruis ontajn instruistojn, kiuj instruis ontajn ktp.

Intertempe, la plejmulto el la aliaj dioj kutime malŝatis la rapidan evoluon de la homa kreemo, ĉar ili ne volis, ke la homoj fariĝu iliaj rivaloj. Kaŝobservante la homojn, la dioj rimarkis, ke tiuj fariĝas pli kaj pli sanaj kaj belaj. Intertempe, la artecaj kreaĵoj fare de la homoj iĝis pli kaj pli emociigaj kaj parto el ili surpasis eĉ tiujn de la dioj mem. Ankaŭ la sciencaj kreaĵoj de la homaro estis evoluantaj rapide. La historiaj verkoj priskribis akurate kaj fidele ne nur la agadojn de la homoj, sed

ankaŭ tiujn de la dioj. Tiuj ĉi ofendiĝis pro tio, ke la historiaj verkoj ofte priskribis ankaŭ iliajn difektojn kaj iliajn erarojn. Do, multaj dioj malkontentis pri la maniero laŭ kiu la naŭ fratinoj influis la homaron.

Zeŭso mem malkontentis pri la realigoj de siaj naŭ filinoj, precipe pri tiuj de Klio kaj Uranio. Zeŭso timis, ke Klio povus malkaŝi hontindajn eventojn el lia pasinteco, dum Uranio povus informi la homojn pri tio, ke lia regno ne estos eterna...

Iun tagon, Zeŭso alvokis ĉiujn diojn en sian majestatan nuban palacon sur la Monto Olimpo. Tie li proklamis:

“Mi ordonas al vi kontraŭstari kaj puni la vantajn homojn, kiuj deziras fariĝi similaj al ni.”

La longa konflikto

La plejparto de la dioj ekĝojis pri la decido de Zeŭso, ĉar ĝuste tion ili delonge deziris kaj eĉ instigis. Aliaj dioj simple indiferentis pri tio. Kelkaj bonkoraj dioj loĝantaj en arbaroj, riveroj kaj lagoj simpatiis la homojn, sed iliaj fortoj estis tre limigitaj kaj kutime ne kuraĝis kontraŭstari la tre potencajn diojn. Nur la naŭ instruistinoj el Parnaso aŭdacis senkaŝe malobei sian patron. Timiga kaj fortega estis Zeŭso, fulmon kaj tondron li posedis kaj manipulis, sed kiam li vidis larmojn en la okuloj de siaj plej amataj filinoj, lia koro fandiĝis kaj tuj li fariĝis tolerema kaj pardonema... Tial Zeŭso kelkfoje ŝajnis ne rimarki la malobeemon de la naŭopo, kvankam li ja instigis la aliajn diojn detrui aŭ difekti multegajn homajn kreaĵojn... Do, la konduto de Zeŭso estis kaprica kaj malfacile antaŭvidebla, samkiel la ŝanĝanta montara vetero...

Ricevinte la ordonon de Zeŭso, multaj potencaj dioj interkonsentis difekti aŭ neniigi la homajn kreaĵojn kaj malhelpi la laboron de la naŭ instruistinoj. Arogantaj kaj ambiciaj dioj komencis aliformi pli kaj pli ofte la varman homan kompaton en egoisman kompaton de si mem. La sanigan homan ŝercemon, ili aliformis tre ofte en malican ironion. Pro la malicaj influoj de tiuj dioj, la rilatoj inter kreemaj homoj ofte ŝanĝiĝis draste: iliaj sentoj de admiro aliformiĝis en envion, ilia sincera helpemo aliformiĝis en malamikan kritikemon. Ambicio kaj egoismo pli kaj pli ofte aliformis la kreaĵojn kunlaboron en konkuradon. Tiel, kreemaj gekolegoj iĝis rivaloj. Kalumnioj kaj mensogoj venenis pli kaj pli multajn homajn animojn. Famo kaj mono fariĝis la ĉefaj celoj de la homa kreemo. Por famo kaj mono, iuj dancistoj kaj muzikistoj fariĝis tiom ambiciaj kaj konkuremaj, ke ili preskaŭ aliformis siajn publikajn prezentadojn en sportajn atingojn. Iuj dancistoj iĝis maldikaj kiel skeletoj, por ke

iliaj spinoj fariĝu pli kaj pli flekseblaj. Onidire foje, la spino de juna dancistino frakasiĝis sur la scenejo kaj ŝi restis tie senmova, dum la publiko estis aplaŭdanta, supozante ke ŝi atingis la plej artecan kurbigon de sia korpo... Iuj muzikistoj, trejniĝis ludante per siaj muzikiloj po multegajn horojn ĉiutage, ĝis la muskoloj de iliaj manoj difektiĝis. Aliaj ekzercis kantadon ĝis iliaj gorĝoj grave malsaniĝis. Por fariĝi famaj riĉaj kuiristoj, iuj elpensis allogajn sed malsanigajn manĝaĵojn, kiuj entuziasmigis la klientojn sed samtempe malsanigis tiujn. Por fariĝi famaj kaj riĉaj, iuj verkistoj ĉesis ajnan intencon pensigi aŭ emociigi la legantojn. Anstataŭe, ili klopodis distri la legantojn pere de kiel eble pli konsternigaj manieroj. Onidire iu poeto, ambiciante atingi eksterordinaran originalecon, sendis hazardan sinsekvon de vortoj al literatura revuo kaj subskribis ĝin. Ŝajnas ke tiel li akiris grandan prestiĝon kaj eĉ lanĉis novan literaturan modon... Novaj pentristoj kaj skulptistoj strebis atingi originalecon pere de sensencaj kreaĵoj, kies prezoj altiĝis kaj malaltiĝis subite laŭ la kapricoj de rapide ŝanĝeblaj modoj. Onidire, unu el tiuj “laŭmodaj” artistoj iĝis fama kaj riĉa vendante “pentraĵojn” fare de lia simio, kiujn li subskribis per sia propra nomo... Novaj malhonestaj politikistoj influis malhonestajn historiistojn. Tiuj ĉi prezentis la homan historion tiel, ke la homoj ne plu lernu el ĝi kiujn erarojn oni devus eviti, sed kontraŭ kiuj devus venĝi unu generacio post la alia, senfine... Fiaj diktatoroj avidaj je famo kaj mono suferigis milionojn da homoj kaj instigis al longaj kruelaj militoj. Ankaŭ en landoj kie ekzistis demokratio, mensogemaj politikistoj trompis kaj suferigis siajn popolojn. Ju pli da militoj, des pli da armiloj estis bezonataj. Novaj sciencistoj kaj teknikistoj obsedantaj pri famo kaj mono uzis siajn talentojn por krei armilojn... Ju pli evoluitaj fariĝis la armiloj, des pli kruelaj fariĝis la militoj.... Malicaj dioj detruis aŭ falsigis valorajn antikvajn dokumentojn atestantaj pri la veraj historiaj eventoj. Ili detruis aŭ falsigis ankaŭ dokumentojn antaŭvidantaj la estontecon de la homaro kaj disvastigis opiniojn de ĉarlatanaj astrologoj, kiuj devojigis la energiojn de la homoj.

Intertempe, la naŭ instruistinoj el Parnaso daŭrigis siajn kutimajn agadojn kuraĝe kaj vigle. Helpis ilin ilia patrino, Mnemozino. Tiu ĉi plifortigis la memorkapablojn de la etaj infanoj, tiel ke ili povu memori facile kaj neforviŝeble ĉion ajn, kion oni instruas al ili kun sincera amo kaj entuziasmo.

Zeŭso kaj aliaj kapricaj dioj ŝanĝis tre ofte siajn kondutojn koncerne la homojn, sed la naŭ instruistinoj restis ĉiam fidelaj al la homoj. Iom post iom, Klio komprenigis al la homoj la fakton, ke la tiel-nomataj “dioj” ne estis ĉiopovaj kaj ilia regno ne estis eterna. Danke al Klio, la homoj komencis paroli pri tio, ke la tutan universon regas iu potenca senkorpa mistero, kiu estas la eterna fonto de vivo kaj amo... La mondo ŝanĝiĝis... Venis tempo, kiam Zeŭso kaj liaj kapricaj familianoj tediĝis pri sia longa turisma vizito sur la tero, des pli ke ankaŭ la homoj reciprokis

tiun tediĝon. Do la aliplanedanoj decidis forlasi la Teron kaj aliformiĝi en aliajn estaĵojn aliloke.

Jam pasis multaj jarcentoj de ilia foriro. Oni ne scias, ĉu ili intencas reveni. Aŭ eble ili jam revenis kaj kaŝiĝas? Iliaj iamaj influoj, ĉu bonaj ĉu malbonaj, daŭre konserviĝas en nia socia vivo.

Iuj supozas, ke la bonkoraj inspiristinoj fariĝis anĝeloj, por daŭre helpi la homaron. Eble ili ofte enkorpiĝas en homojn, kiuj vartas aŭ instruas infanojn stimulantе ties kreemon. Ĉu vi rimarkis, kiom multaj infanoj kapablas kanti, danci, pentri, modli, deklami, fabeli, prepari fruktosalatojn, konstrui kastelojn... Domaĝe ke tiom da kreemo ofte perdiĝas, kiam la infanoj kreskas kaj tentas ilin diversaj ambicioj... Ĉu ne?



esperantigita de **Paula Adúríz** (Hispanio)

Hong Jia (Ĉinio)

Nova radseĝo

En la vilaĝo la pedanta instruisto Man paralizigiĝis pro apopleksio. Kvankam li instruis en bazlernejo por vivteno dum sia tuta vivo, tamen krom elspezoj por manĝado kaj vestaĵoj, li ne povis ŝpari monon el la malgrasa salajro. Lia edzino, laborema kaj lerta en kamplaboroj, malhavis rimedojn por perlabori kroman monon, kaj aliflanke ŝi ne povis forlasi lin en la lito. Man pensis, ke, se li aĉetus radseĝon, li povis moviĝi tien kaj tien, tiel ke lia maljuna kunulino povis provizore forlasi lin por fari aliajn aferojn. Li kaj lia edzino konsiliĝis, kiel solvi la problemon. Lia edzino veis, “Ni loĝas en malriĉa vilaĝo. Eĉ se mi kapablus perlabori, kie mi povus lukri la monon. Ni atendu kelkan tempo kaj elpensu alian solvon. Nun mankas al ni mono aĉeti radseĝon.”

Post kelkaj tagoj ili aŭdis, ke en la apuda vilaĝo paralizito mortis. Li suferis de la sama malsano kiel Man kaj disponis elektran radseĝon por oportune moviĝi laŭvole. Lia edzino jam mortis du jarojn pli frue. Kaj lia nura filo, tre riĉa, funkciis kiel estro de kompanio en la urbo. Nun li okupiĝis pri la funebraĵo de sia patro. Post entombigo de sia patro li volis elvendi ĉiujn aĵojn, inkluzive de domo kaj reiri al la urbo por siaj aferoj.

Aŭdinte tion, Man kaj lia edzino sentis, ke la ŝanco venos kaj la radseĝo certe estas senutila por lia filo nomata Kelo. Ili konsideris, ĉu ili povos aĉeti tiun radseĝon je malalta prezo. Tio estas bona afero, sed kiel ili povus malfermi buŝon por diri sian ideon al lia filo Kelo, ĉar lia patro mortis nur antaŭ kelkaj tagoj.

Ĝuste tiam ekster la pordo aŭdiĝis krioj, “Eluzitaĵoj por mono!” Ili konis la voĉon de la kolektanto de eluzitaĵoj kaj forĵetaĵoj. Li estis Oĉjo Pan.

La edzino de Man haste malfermis la pordon kaj voke haltigis lin, “Ho la, Panĉjo, mi volas konfidi aferon al vi.”

“Saluton! Nu, kio estas la afero?” demandis Pan.

“Ĉu vi scias, ke mia edzo estas alnajlita al la lito pro paralizo?”

“Jes, mi jam aŭdis pri tio.”

“Por solvi la problemon, ke li ne povas moviĝi laŭvole, ni konsiliĝis aĉeti radseĝon por lia irado, sed ni malhavas sufiĉan monon. Se ni aĉetos malnovan radseĝon, li povos sidi sur ĝi kaj moviĝi laŭvole. Antaŭ kelkaj tagoj en la apuda vilaĝo mortis la maljunulo, kies filo estas ĉefo de kompanio en la urbo. Dum ĉi tiuj kelkaj tagoj tiu okupiĝas pri la funebraĵo de sia patro. Lia patro ankaŭ estis paralizito kaj moviĝis per radseĝo. Nun li jam mortis kaj la radseĝo estas senutila al lia filo. Kaj oni diras,

ke lia filo volas elvendi ĉiujn aĵojn, inkluzive de la domo. Ni hontas iri tien por fari peton, ĉar lia patro ĵus mortis. Estas oportune fari tion por vi kiel kolektisto de eluzitaĵoj kaj forĵetaĵoj. Ĉu vi bonvolus helpi nin por informiĝi pri la radseĝo?”

“Kompreneble jes. Sed kie troviĝas la domo de la maljunulo?”

“Iru okcidenten laŭ la vojo ĉirkaŭ dek minutojn. Kiam vi vidos ruĝbrikan duetaĝan domon, lia filo Kelo loĝas tie.”

“Bone. Mi tuj iros tien. Dankon!”

Dirinte dankon, Pan triciklis rekte al la celloko.

Post kvin minutoj li atingis la ruĝbrikan domon. Li parkis la triciklon ĉe la pordo kaj frapis je la pordo. Momenton poste mezaĝulo, dece vestita, malfermis la pordon. Kun nigra funebra bendo sur la brako, li evidente estis la filo de la mortinto.

“Pardonon, ke mi vin ĝenas. Mi kolektas eluzitaĵojn kaj forĵetaĵojn per mono. Mi aŭdis, ke ĉi tie estas multe da eluzitaĵoj por vendi, ĉu ne?”

“Jes, mi jam ordigis la domon kaj elportis la senutilaĵojn en la korton. Jen kia amaso! Eniru la korton por elekti tiujn, kiujn vi konsideras indaj por kolekti.”

En la korto kuŝis amaso da forlasitaĵoj de la mortinto. Apud ĝi impone staris preskaŭ nova elektra radseĝo. Dum kolektado de tiuj senutilaĵoj Pan jen kaj jen ĵetis ekrigardojn al la radseĝo. “Ĉu vi ankaŭ vendas la radseĝon?” demandis Pan timeme.



“Ne, mi ne vendas ĝin. Tamen, kiam mia patro mortis, li diris lastajn vortojn al mi, ke mi ne vendu la radseĝon, sed donacu ĝin al tiu, kiu ĝin bezonas.”

“Aĥa, ĉu vi scias, ke en la orienta ekstremo de la vilaĝo vivas paralizito nomata Man. Li estis instruisto. Lastatempe li suferis de apopleksio kaj fariĝis paraliza. Antaŭ duonhoron mi vizitis lin kaj li konfidis al mi aĉeti malnovan radseĝon por li. Kia hazardo!” diris Pan.

“Instruisto Man? Antaŭ dudek jaroj, kiam mi lernis en bazlernejo, li estis mia

instruisto. Bonege, mi donacu ĉi tiun radseĝon al li, tiel ke mi povas plenumi la deziron de mia patro. Mi petas, ke vi forportu la radseĝon al li, dankon!”

Ordiginte la senutilaĵojn sur la triciklo, li ankaŭ metis la radseĝon sur ĝin. Dirinte dankon, li forveturis. Kiam li atingis la vojkruciĝon, li hezitis. Ĉi tie kuŝis du vojoj, unu kondukanta al la domo de Man kaj la alia al sia hejmo. Enpenseme li bruligis unu cigaredon post alia. Evidente svarmis diversaj pensoj en lia cerbo. Fine li direktis la triciklon al la direkto al sia hejmo.

Ĉe la pordo maljunulino en malnova radseĝo gapis al la direkto de lia reveno. Ŝi estis lia edzino. Antaŭ tri jaroj ŝi trafis akcidenton kaj vundis al si dekstran kruron. Post kuracado tiu kruro perdis la irpovon kaj ŝi devis rajdi en radseĝon por moviĝi tien kaj tien. Ŝian radseĝon Pan aĉetis kiel eluzitaĵon en la urbo. Vidinte sian edzon reveni, ŝi ekridetis. Pan haltigis la triciklon ĉe la pordo kaj kriis, “Jen mi alportas al vi elektran radseĝon, kiun vi vere deziras! Preskaŭ tute nova!”

“Vi certe aĉetis ĝin per multe da mono, ĉu ne? Mi tre ĝojas, ke mi ekhavas novan elektran radseĝon, tiel ke mi povos veturi al pli malproksima loko, eĉ al la urbo.” diris la edzino.

“Mi ne aĉetis la radseĝon. Ĉu vi aŭdis, ke antaŭ kelkaj tagoj mortis maljunulo ĉe la okcidenta ekstremo de la vilaĝo? Antaŭ morto li diris al sia filo, ke tiu donacos ĝin al tiu, kiu ĝin bezonas. Estis hazarde, ke mi iris al lia hejmo por kolekti eluzitaĵojn kaj li donacis la radseĝon al mi. Do ĝuu ĝin, mia kara!”

La edzino estis ekster si de ĝojo, tiel ke ŝi eĉ ne povis fermi sian buŝon pro rido. La edzo helpis ŝin sidi en la radseĝon kaj ŝi facile manipulis ĝin tien kaj ĉi tien. Ankaŭ Pan montris larĝan rideton sur la vizaĝo.

La duan tagon la elektro de la radseĝo elĉerpiĝis. Tiam Pan konsciis, ke li forgesis la ŝargan ŝnuron ĉe la hejmo de Kelo. Tamen kun la sekreto en sia koro li ne havis kuraĝon reiri al la ruĝbrika domo preni la ŝargan ŝnuron. Tio, kion li povis fari, estis aĉeti ĝin en la urbo. Nerimarkite, kelkaj tagoj forpasis. Sed estis malfacile por Pan pasigi tiujn tagojn. Kiam li eliris kolekti eluzitaĵojn kaj forĵetaĵojn, li ne kuraĝis iri en la direkto al la hejmo de la instruisto Man nek en la direkto al tiun de sinjoro Kelo. Lian koron rongis la sento de trompado. Malgraŭ ĉio li denaske estis honestulo vivanta en la kamparo. Finfine li ne povis kovri la sekreton plu kaj li elverŝis la veron al sia edzino.

La edzino lin riproĉis, “Kial vi faris tion kontraŭ via konscienco? Ĉiukaze mi havas malnovan radseĝon, kiun mi movas per mano. Tamen mi jam kutimas uzi ĝin sen ajna malfacilo, dum mankas al la instruisto Man eĉ malnova radseĝo. Mi scias, ke li malhavas multan monon por aĉeti novan radseĝon. Estas tre povrinda por li ĉiam kuŝi sur la lito. Ne, vi ne povas akapari la aĵon, kiu apartenas al aliulo. Do redonu ĝin al la instruisto Man!”

Kun hontemo li ŝarĝis la radseĝon sur la triciklon kaj sin direktis al la hejmo de la instruisto Man. Ne malproksime de la hejmo de la instruisto Man li renkontis ties edzinon.

Ŝi salutis lin kaj diris, “Hej, ni atendis vin kelkajn tagojn kun malpacienco, sed vi ne revenis kaj doni al ni nenian informon pri la radseĝo.

“Nu, mi kunportas la radseĝon al vi. Sinjoro Kelo diris, ke antaŭ morto, lia patro diris al li, ke la radseĝo estos donacita al tiu, kiu bezonas. Ĉu Man fartas bone?” Pan respondis.

“Kio? Alia radseĝo? Mi tute konfuziĝas pri tio. Hieraŭ sinjoro Kelo sendi tute novan radseĝon al ni!” diris la edzino de la instruisto.

Ankaŭ Pan ŝtoniĝis. Kio okazis? Kial sinjoro Kelo donacis al ili tute novan radseĝon?

Okazis, ke iun tagon sinjoro Kelo subite trovis la ŝargan ŝnuron de la radseĝo ĉe murangulo de la dormoĉambro de sia patro. Li pensis, ke se mankas la ŝarga ŝnuro, la radseĝo ne povas esti ŝargita kaj la radseĝo ne povas moviĝi libere. Pro tio li aŭte veturis al la hejmo de la instruisto Man por doni la ŝargan ŝnuron al li. Sed kiam ni atingis la hejmon de la instruisto Man, li nur vidis lin kuŝanta sur la lito kaj la radseĝo videblis nenie. Li konsideris, ke Pan certe trompis lin. Pan ne donis la radseĝon al la instruisto kaj retenis ĝin al si aŭ ĝin forvendis. Kiel antaŭa lernanto, Kelo nur babilis kun la instruisto kaj poste foriris sen elpreni la ŝargan ŝnuron. Li decidis fari esploron pri la radseĝo. La postan tagon li veturis per aŭto al la hejmo de Pan. De malproksime li vidis maljunulinon sidi en la radseĝo, kiu ĝuste estis tiu de lia patro. Li alproksimiĝis kaj salutis la maljunulinon, demandante, ĉu Pan loĝas ĉe tie.

“Jes,” respondis la maljunulino, “mi estas lia edzino. Li ne estas hejme. Ĉu vi havas aferon por babili kun li?”

“Mi estas Kelo. Antaŭ nelonge mia patro mortis en la apuda vilaĝo. Mi estas lia filo,” diris Kelo.

“Oho, vi estas lia filo? Mi devas esprimi dankemon al vi. Mia edzo diris al mi, ke vi donacis la radseĝon al ni. Grandan dankon! Kvankam mi havas malnovan radseĝon, ĝi tamen moviĝas nur per la mano. Se mi volas iri pli malproksimen, mi devas fari grandajn penojn, alie, mi vole nevole restas ĉirkaŭ la domo. Jen via elektra radseĝo. Kia miraklo! Se mi volas iri al pli malproksima loko, estas oportune por mi nur premi la butonon. Mia edzo aĉetis ŝargi ŝnuron en la urbo. Nun se elektro elĉerpiĝas, mi ŝargas ĝin, kaj ĝi ekviglas kiel junulo,” ŝi klarigis.

Nun ĉio troviĝis en hela lumo. Sinjoro Kelo ne volis malkaŝi la veron al la publiko. Por eviti difektadon al la personeco de Pan li tenis la sekreton en la profundo de la koro. *

Laimundas Abromas (Litovio)



Malfacila interparolo

Staseo estas esperantisto denaska, liaj gepatroj estis esperantistoj kaj lia avo ankaŭ estis esperantisto. Pro tio li ne povas kompreni, kial inter la homoj estas tiom multe da mensogo, prirido, malamo, agresemo. Kie estas la kaŭzoj de tio? Ĉu nur en Litovio oni mensogas, malamas,

aŭtoro, Laimundas Abromas

agresemas? Ĉu ankaŭ en aliaj landoj tio okazas? Staseon turmentis tiom multe da demandoj, kaj li decidis preparoli, pridiskuti ilin kun Andreo, gvidanto de loka Esperanto klubo.

—Andreo, diru, ĉu tio estas vero aŭ absurdo? Statistiko diras, ke ni en Litovio avangardas en la sinmortigado, intencaj murdoj, primokado de malsampensantoj, alkoholismo, laŭ kvanto de prizonuloj ktp.

—Multaj litovaj esperantistoj, senescepte vi, ne volas kredi tiun timigan statistikon. Ĉar inter homoj disvastiĝas fama eldiro de Mark Twain: „Estas tri specoj de mensogo: mensogo, impertinenta mensogo kaj statistiko“, -strabe ridetante diris Andreo.

—Jes, vere. Jam dum multaj jaroj oni diras, ke esperantistoj estas sentaŭguloj, stranguloj kaj plej malbonaj homoj, ĉar ili volas konkeri la mondon. Mi suspektas, ke tio ĉi estas komploto – iuj volas damaĝi nin kaj intence tion faras, — nervoziĝinte parolis Staseo.

—Brave, Staseo. Se io ne plaĉas al ni, ni tuj serĉas, kiuj estas tiuj malbonuloj, kiuj damaĝas nin. Se, verdire, kulpas nur ni mem kaj ni mem damaĝas nin... Kio estos tiam? – scivole parolis Andreo.

—Tiam ni serĉu la kaŭzojn... en ni mem, —lante voĉis Staseo. —Verdire, mi ankaŭ rimarkis ion... Mi ne komprenas, pro kio la homoj tiel kondutas? Kial oni mensogas, malamas, agresemas, drinkadas, sinmortigas? Pro kio oni ne volas esti pli bonaj, ne volas ŝanĝiĝi? Pro kio oni tiom amase elmigras eksterlanden? – li verŝis demandon post la demando.

—Pro tio, ke ŝanĝi sin mem multe pli malfacilas, ol ŝanĝi ĉirkaŭaĵon, medion. Jen pro kio oni forveturas, anstataŭ ŝanĝi sin, — parolis Andreo. — Mi pensas, ke la

homaro malsanas. Ni forte malsanas per dependo al agresemo. Pri tio oni malfacile kredas. Tamen tio estas reala problemo, kiun multaj neas. Kion devas fari alkoholulo, kiu volas ĉesi drinkadi? – per demando finis li.

—Agnoski, ke li posedas problemon..., — kulpe diris Staseo.

—Jes! Ĝuste tiel! — diris Andreo, li leviĝis de sur la seĝo kaj komencis iradi en la ĉambro. —Ni devas agnoski, ke al ni plaĉas la agresemo, ni estas dependantaj de agresemo, ni uzas ĝin kiel nian ilon – tio estas parto de nia vivkulturo.

—Eble vi pravas, tamen estas tia la mondo, tia estas la mondpercepto... tiaj estas la distroj, — parolis Staseo. — Oni ŝaltu iun ajn televidkanalon –ĉie oni nur pafadas kaj persekutas, drinkadas kaj murdas, rabas kaj perfortas. Do, ĉu ni kulpas, ke ni konfuzis hororfilmon kun la vivo? La televido instruas nin malami, agresi, mensogi. La bonaj novaĵoj neniun interesas.

Andreo sidiĝis ĉe la tablon kaj plenzorge diris — Mi suspektas, ke tio venas de pratempo.

—Do, pro kio la malamo tiom allogas, — Staseo per manplatoj ŝirmis sian vizaĝon. — Kie estas la esenco, la kaŭzo?

—Vi sciu, mi ne trovas ĝustan respondon. La dependeco de agresemo, de malamo, verŝajne estas rezulto, sed ne kaŭzo, — konkludis Andreo.

—Vin aŭskultante, mi kaptis interesan ideon... – parolis Staseo.

—Nu, bonvolu diri, — ekatentis Andreo

— Mi suspektas, ke tio okazas pro la manko de estimo, toleremo...

—Kiel? – ekmiris Andreo.

— Se oni timas, sekve oni estimas, — emociplene parolis Staseo. — Multaj agresemoj nome tiel komprenas la devenon de estimo — subigante alian. Ili kredas, ke per forto kaj timo eblas profiti estimon.

—Tamen estimo posedas nenion komunan kun timo, - ekmiris Andreo. — Estimo estas kontraŭo al agresemo kaj timo. Por perforto bezonatas viktimo kaj por estimo – la homo... Oni kredas, ke estimon necesas meriti. Sekve, la estimo estas merito.

—Estas ankoraŭ unu maniero...

—Kiu? –ekbrilis la okuloj de Andreo.

—Ricevi estimon senpage! — parolis Staseo

—Kiel senpage? Vi volas diri, ke ĉiuj ĉiujn estimu senkaŭze? — miris Andreo.

—Ĝuste tiel! Vera estimo postulas nek perforton, nek meriton. Kiel ni, esperantistoj, estimas unu la alian. Necesas nur diri al si mem, ke mi estimas ĉiujn homojn, ĉar mi mem volas esti estimata, — klarigis Staseo.

—Tamen tio tiel simplas, tiel ordinaras... , tro simplas, — miris Andreo.

—Konfucio antaŭ 2500 jaroj diris: „Absolute ĉio en la socio sintenas sur estimo...” — aldonis Staseo.

—...aŭ sur la agresemo kaj timo... —finfine Andreo komprenis la alternativon. — Se inter homoj mankas denaska estimo, ĝin ŝanĝas timo kaj agresemo.

—Nome! Aŭ ni kontrolas nin kaj estimas homojn, aŭ timo, malcerteco kontrolas nin kaj naskas agresemon, — konkludis Staseo.

—Do, sekvas, ke scipovo donaci estimon estas la ŝlosilo al la homaj koroj, — ekradiis Andreo.

— ...kaj liberiĝo for de agresemo kaj malcerteco, timo, — finis Staseo.

Ambaŭ samideanoj nur nun eksentis, kiel lacigis ilin tiu malfacila interparolo.

—Mi sentas min kiel permane malŝarginta vagonon da karbo, — konfesis Staseo. — Ni iru trinki po bokalo da malvarma biero, — proponis li.

— Kun plena estimo, Staseo, — ekĝojis Andreo.



esperantigita de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Yin Jiaxin (Ĉinio)



Amo kaj malamo ĉe monto kaj akvo

1

Tiu ĉi rakonto okazis komence de la dudeka jarcento en la apudmara regiono de la sudorienta Ĉinio.

Iun posttagmezon de la somera libertempo, varma vento blovdas tra Jafen-vilaĝo ĉirkaŭata de montoj. Minzi, portante argilan kruĉon da teo, iris ekster la vilaĝon al rizkampo, en kiu Asu kun sia patro estis priklanta rizplantidojn.

Proksimiĝante al la kampo, Minzi salute vokis al la duopo: “Hola, onĉjo Lu, fraĉjo Asu!”

Surprizite la paro rektigis sian korpon, kaj Asu kun ĝojo laŭte demandis: “Minzi, pro kio vi venis ĉi tien en tiel varma horo?”

“En tiel varma horo vi certe soifas, mi pensas.” Demetinte la kruĉon sub arbo, Minzi per maniko viŝis la ŝviton de sia frunto, alvokante: “Venu trinki teon kaj ripozu iomete.”

“Minzi, estas tre varme. Ne ĝenu vin alporti teon por ni. Ni jam kunportis iom da akvo.” Dirinte, Olda Lu daŭrigis sian laboron.

“Mi pensas, ke via kunportita akvo ne sufiĉas,” dirante Minzi klinis la kapon.

Asu sidiĝis apud Minzi en la ombro de la arbo kaj trinkis bovlon da teo, poste

zorgeme sugestis: “Minzi, mia paĉjo pravas. La suno tro ardas por vi elteni. Pli bone, vi restu hejme.”

Minzi ruĝiĝis, mallaŭte grumblis: “Mi nur deziras vidi vin kaj babili iom kun vi.”

Minzi kaj Asu estis najbaroj. La du familioj loĝis muron ĉe muro en sama korto. Asu aĝis pli ol Minzi je kvin jaroj, kaj ili ambaŭ lernis de la sola instruisto en la vilaĝo. Matene, ili iris al la lernejo manenmane, kaj reveninte, ili plenumis hejmtaskon kaj ludis kune. Ili havis inter si rilaton intiman kiel sangaj gefratoj. Husi, la patro de Minzi, vivtenis sian familion per fiŝkaptado kaj Olda Lu per terkultivado. Dum la du viroj laboris ekstere, iliaj edzinoj sin okupis pri mastrumado hejme. La patrino de Asu bredis porkon kaj la patrino de Minzi tenis dekelkajn kokinojn. Ofte ili ambaŭ babiladis en la korto, farante kudradon kaj flikadon.

La fiŝkaptisto Husi kaj la terkultivisto Olda Lu kutime revenis hejmen ĉe la sunsubiro kaj kune sidis tetrinkante kaj babilante ĝis vespermanĝo. Kvankam ambaŭ familioj ne vivis riĉan vivon, tamen kiel simplaj plebanoj ili estis kontentaj pri sia propra feliĉa vivo.

Tempo fluis tiel pace, sed iutage ĉio ŝanĝiĝis.

2

Proksime al Jefen-vilaĝo je preskaŭ dudek kilometroj etendiĝis vasta maro, sur kiu sin trovis bando da kanajloj. La ĉefo alnomiĝis Frenezulo Zan. Ja estis la bando, kiu frakasis la pacan vivon de la du familioj en Jefen-vilaĝo.

La vera nomo de Frenezulo Zan estis Zan Linzi, kaj li estis vilaĝano de la ĉemara vilaĝo Gufen. Liaj gepatroj, longtempe fiŝkaptante sur la maro, ne havis tempon nek povon eduki lin. Li jam ekde sia infaneco ŝatis interbatiĝi kontraŭ najbaraj buboj kaj ofte kaŭzis ĝenaĵojn. Iusomere li ĉasadis en la montaro Vulon kaj hazarde renkontis la taŭistan ĉefpastron Junjan, kiu ekzercas sin en luktarto. Zan Linzi estis tiel fascinita de ties lertaj movoj de luktarto, ke li petis fariĝi ties lernanto. La taŭista ĉefpastro ekzamenis lin per la rigardo kaj diris: “Lernanto de luktarto devas havi aplomban koron kaj afablan konduton. Laŭ mia observo, vi ŝajne ne estas tia junulo, do bonvolu foriri.”

Zan Linzi ne volis foriri sen ajna akiro, li obstine petis, ke la taŭista ĉefpastro donu al li iom da instruoj. La taŭista ĉefpastro levis la kapon al la ĉielo kaj eligis profundan suspiron: “La sorto estas destinita, ke ni renkontiĝu hodiaŭ. Lernado de luktarto bezonas kompreneman kapablon. Mi ne instruos vin. Nun ke vi jam vidis miajn movojn de ekzercado, do vi mem provu ilin memori kaj asimili. Mi esperas, ke vi ĉiam restu senkulpigema kaj tolerema, kaj vivu simple kaj modere. Se tiel, vi estos feliĉa sen ajna rimorso. Alie, ve...”

Post hejmraveno, Zan Linzi komencis atente rememori kaj pene ekzercadi la

movojn de la taŭista ĉefpastro. Ĉu dum la frosta vintro ĉu dum la varmego somero, li ekzercis sin en luktarto kun konstanteco kaj persisteco. Komence, li povis kondukti laŭ la instrukcio de la taŭista ĉefpastro, restante senkulpigema kaj tolerema. Sed post sinsekvaj malsukcesoj je enamiĝo, li tute ŝanĝiĝis.

Starante sur la marbordo de Gufen-vilaĝo kaj rigardante al la malproksimo, oni povis vidi grandan insulon, sur kiu situas Rosan-vilaĝo. Tie loĝis knabino, kiu nomiĝas Mele. Zano Linzi renkontis Mele dum foiro kaj tuj lin allogis ŝia bela aspekto. Mele ankaŭ naskis simpatian al li. En postaj foiroj, la du gejunuloj renkontiĝis plurfoje. Zano Linzi falis en sian amon al ŝi, pensante pri ŝi tagnocte. Sed Mele ne aŭdacis akcepti lian amon, ĉar ŝi bone konis, ke laŭmore, malpermesata estas geedziĝo inter la du vilaĝoj Gufen kaj Rosan, inter kiuj ofte okazis furiozaj konfliktoj. Zano Linzi devis kaŝi sian amon ankore. Ĉiutage kiam li sopiris al Mele, li iris al la marbordo kaj fiksigardis la insulon Rosan por kelka momento. En iu printempa tago, Mele edziniĝis malproksimen. Informiĝinte pri tio, Zano Linzi longe staris sur la marbordo, vizaĝe al la vilaĝo Rosan murmurante: “Rosan-vilaĝo en miaj okuloj, sed kie estas mia amatino?”

Pro malĝojo, Zano Linzi ekfumis cigaredon kaj ekdrinkis alkoholon, lia konduto fariĝis pli kaj pli stranga. En pluvegaj tagoj li ofte, kun la vesto malbutonita kaj larmoj en la okuloj, vagadis sur la strando kaj lasis al pluvo frapadi lian tutan korpon. De tempo al tempo li levis la kapon kaj laŭte vokis al la ĉielo: “Kie estas vi, mia kara?”

Post longe, knabino nomata Muzi rebruligis la amflamon en Zano Lingzhi. Tiu ĉi knabino estis ne nur bela kaj afabla, sed ankaŭ legpova kaj ĝentila. Ŝi revigligis Zano Linzi. Vespere oni ofte vidis, jen ke Muzi kun Zano Linzi promenadas sur la strando, lasante freŝan venton ludi sian longan kaj nigran hararon, jen ke Zano Lingzhi remadas en boato kun Muzi, babilante kaj ridante. Ŝi havigis al li ĝojon, kiun li neniam antaŭe spertis. Li konsideris ŝin donaco de la Ĉielo.

Iun tagon, alilanda ferŝipo ankris por proviantado ĉe la vilaĝo Gufen. Multaj vilaĝanoj scivole iris spekti, ĉar antaŭe ili neniam vidis alilandan ŝipon de tiel proksime. Dume la ŝipestro per binoklo rigardis la spektantan homamason, inter kiu estas Muzi. La ŝipestro ne atendis, ke en tiu ĉi izola vilaĝo troviĝas junulino tiel bela kiel Venuso. Liaj avidaj okuloj estis fiksitaj sur Muzi ĝis tiu forlasis la kajon.

En la vesperkrepusko de la sekvanta tago, Zano Linzi kaj la gepatroj ne revenis al la haveno je la kutima horo. Muzi maltrankvile atendis ilin, paŝante tien kaj reen ĉe la kajo. La ŝipestro ŝin vidis kaj vokis el la ŝipo. Muzi ne komprenis la fremdan lingvon, do la ŝipestro al ŝi montris la binoklon kaj invitis ŝin al la stirejo por observi boaton sur la maro. Muzi, naiva fraŭlino, forte sopiris sian amaton, do ŝi senpripense supreniris en la stirejon. Ŝi absolute ne imagis, ke al ŝi okazos makabra afero.

La ŝipestro kun la ĉefmaato kaj la dua maato faris monstran krimegon, poste forĵetis senkonscian Muzi sur la strandon kaj haste forveturigis la ŝipon. Kiam Zan Linzi alvenis, li vidis, ke kompatinda Muzi kuŝas sur la sablo, kun taŭzitaj haroj, en disŝirita blanka bluzo kaj sangomakulita flava jupo. Disrompiĝis la koro de Zan Linzi. Li premis sian amatinon al la sino kaj senĉese vokis ties nomon amare. Finfine Muzi vekigis, sed ŝi ne plu povis rekoni sian amaton, ĉar ŝi jam frenezigis!

Zan Linzi tute furiozis kaj pleniĝis de angoro. La du doloraj amospertoj ŝanĝis liajn temperamenton kaj agmanieron. Li ignoris la instrukcion de la taŭista ĉefpastro kaj ekĝenis vilaĝanojn ĉie. Sekve li eĉ unuiĝis kun kelkaj kanajloj ŝtelante kaj rabante de tempo al tempo. La bando ordinare kaŝis sin sur nekonata insulo, okaze de manko de mono kaj nutraĵo, ili ŝtele subordiĝis kaj atakis vilaĝon. Vilaĝanoj sentis sin tre ĝenitaj, sed neniuj kuraĝe aŭ kapable rezistis ilin. Postdorse oni kromnomis Zan Linzi "Frenezulo Zan".

3

Iun aŭtunan posttagmezon kiam la vilaĝanoj laboris en kampo, al la kajo de Jefenvilaĝo alboridiĝis granda ligna ŝipo, kiu portas Frenezulon Zan kaj ties subulojn. La bando senbrue eniris la vilaĝon kaj faris ŝteladon. Ili, kun la ŝtelitaĵoj pasante preter la domo de Asu, ekvidis la patrinojn de Asu kaj Minzi brodantajn sub arbo en la korto. En la knabineco la du patrinoj aspektis belaj kaj ĉarmaj, post la edziniĝo ili malofte laboris enkampe, tiel ilia haŭto restis delikata kaj glata. Kvankam ili estis ne plu junaj kun po infano de dekkelkaj jaroj, tamen ili ankoraŭ havis allogan belecon. Rigardo al la du virinoj ekbruligis voluptfajron en la interno de Frenezulo Zan. Li volis, ke la du virinoj vivu en lia nesto sur la maro kaj ĉiumomente kontentigu lian lascivan deziron, do li ordonis forkapti la du virinojn. Plorkriante kaj baraktante, la du patrinoj rezistadis per tuta forto, sed vane. La kanajloj al la du virinoj ŝtopis la buŝon per ŝtofo kaj ligis la manojn kaj piedojn per ŝnuro, poste ŝovis ambaŭ respektive en jutsakon.

Elportonte la du patrinojn el la korto, la kanajloj renkontis Asu kaj Minzi, kiuj revenis de lernejo. Vidinte la teruran okazantaĵon, Asu tuj impetis al Frenezulo Zan kaj ĉirkaŭbrakumis ties kruron, plorege petante liberigi la du patrinojn. Ĉu kato povas akiri frandaĵon el faŭko de tigro? Kelke da kanajloj forkuris laŭeble rapide, portante la du jutsakojn. Frenezulo Zan, kiu ekzercis sin en luktarto plurjare, simple donis unu pezan pugnobaton al Asu je la kapo, ke tiu svene falis surteren. Dume, Minzi fariĝis ŝokita de la ĥaosa sceno, senmove apogante sin sur la pordo.

Olda Lu kaj Husi ĉiam kondutis honeste, milde kaj timide. Informiĝinte pri la afero, ambaŭ kolapse falsidiĝis sur la teron. Ili ne sciis kion alian fari ol korŝire muĝadis kiel furioza rabbesto, frapadante al si la bruston. Afablaj vilaĝanoj alarmis

la policon. Serĉinte kaj persekutinte kelkan tempon, la policianoj kaptis du subulojn de Frenezulo Zan. Ili konfesis: tiutage la bando, metinte la du virinojn sur la ferdekon, urĝe forveturigis la ŝipon, timante persekutadon de vilaĝanoj, dum la du virinoj kontinue baraktis kaj fine rulis sin en la riveron. Frenezulo Zan timiĝis de la pereco de du vivoj, tiel ke li kun sia bando fuĝis al oni ne scias kie. Tiuj ĉi du subuloj ne volis forlasi sian hejmlokon por vagadi surmare, tial ili arestiĝis.

4

Ĉiutage la suno leviĝis kiel antaŭe, kaj la vivantaj devis daŭrigi sian vivon. Asu decidis ĉesi sian vizitadon al lernejo kaj iri al la budhista templo nemalproksima de Jefen-vilaĝo, por lerni luktarton de la ĉefbonzo. Li deziris propramane mortigi Frenezulon Zan kaj ties bandon. Rimarkinte kaŝitan mortigan motivon de Asu, la ĉefbonzo kunmetis la manplatojn antaŭ sia brusto kaj duonfermis la okulojn, dirante: “Amitabo! Mi kaj la disĉiploj ekzercadis nin en luktarto, cele al nenio alia ol fortigi la sanon kaj defendi la templon. Vi, tiel juna, ja havas fortan venĝemon en via koro, mi ne povas instrui al vi luktarton.”

Asui rakontis al la ĉefbonzo pri la tragika okazaĵo en Jefen-vilaĝo kaj konfesis sian intencon venĝi sin kontraŭ Frenezulo Zan. La ĉefbonzo milde diris: “Amitabo! Naskiĝo estas morto kaj morto estas naskiĝo.” Li fermis la okulojn kaj ekestiĝis en zenostato, ignorante Asu.

Asu apenaŭ forlasis la templon kiam li renkontis la konatan de si bikŝuon ĉe la enirejo. Sciinte pri la afero de Asu, la bikŝuo proponis, ke li iru al la montaro Vulon kaj lernu luktarton de la taŭista ĉefpastro Junjan. La bikŝuo emfazis: “Renkontinte la taŭistan ĉefpastron, ne elmontru vian venĝintencan nur diru ke vi lernos luktarton por sanfortiĝo. Se la taŭista ĉefpastro malkovros vian venĝintencan, ekspliku, ke vi volas forigi malbonulojn por protekti la vilaĝanojn.”

Atinginte Vulon-montaron, Asu per multaj penoj renkontiĝis kun la taŭista ĉefpastro, kaj akceptiĝis kiel ties disĉiplo post multfoje da petoj. Sur la monto li diligente lernis kaj ekzercis sin ĉiutage, malgraŭ la vetero ventega, ŝtorma, neĝada aŭ varmega. Kvin jarojn poste, li fariĝis tre lerta je pugnobato, piedbato kaj glavarto. Dum tiuj kvin jaroj li neniam forgesis la malamon kontraŭ Frenezulo Zan kaj ties bandon. Asu volis descendi la monton por venĝi sin, sed li ne sciis kiel diri al sia majstro, la taŭista ĉefpastro.

Iun nokton antaŭ ol fari zenadon, la taŭista ĉefpastro Junjan ekaŭdis obtuzan bruon en proksima malgranda arbaro. Ĉu sovaĝa besto denove venas ataki homojn? Tenante glavon li silente aliris la arbaron por esplori. Tie li vidis, ke Asui ekzercas sin en luktarto. Laŭ la vervo de lia ekzercado, la taŭista ĉefpastro divenis la intencon de sia disĉiplo. En la sekvanta posttagmezo, li venigis Asu al la zenito de la monto

kaj diris: “Ashu, antaŭ kvin jaroj mi jam sciis, ke vi kovas venĝemon en la koro. Observinte vian ekzercadon hieraŭ nokte, mi asertis ke vi volas foriri de la monto.”

Asu sciis, ke neniuj intencoj povas kaŝiĝi antaŭ la saĝa majstro. La taŭista ĉefpastro donis glavon al li, dirante: “Vi prenu ĉi tiun glavon, Morgaŭ ĉe la matena krepusko, iru mem al la stalo kaj forrajdu la plej ŝatatan de vi ĵujubkoloran ĉevalon. Vi ne bezonas adiaŭi iun ajn, inkluzive min, kaj foriru kviete. Ĉi tiu glavo kaj la ĉevalo estas miaj donacoj al vi.” Li elprenis saketon kaj aldonis: “Ekde via alveno, ĉiuposttagmeze vi senpage okupiĝis pri bagatelaj aferoj en la templo. Jen estas iom da mono por via survojaj elspezoj.”

“Dankon, majstro!” Asu surgenuiĝis kaj faris profundan riverencon antaŭ la majstro.

“Asu, kun via nuna kapablo, ne estas problemoj venĝi vin kontraŭ Frenezulo Zano kaj lia bando. Tamen, eble vi neniam povos ilin trovi.”

“Kial mi ne povos trovi ilin?” demandis Asu konfuzite.

Ĉirkaŭrigardinte la neĝkovritajn montojn, la taŭista ĉefpastro kun emocio suspiris, duone al Asu kaj duone al si mem: “Vasta estas la reto de la Ĉielo, kvankam grandaj estas ĝiaj maŝoj, ĝi tamen lasas al nenio ilin trairi.” Dirinte li forlasis Asun sen returni la kapon.

Asu ne komprenis la vortojn de sia majstro. Kial li ne povos trovi Frenezulon Zano kaj lian bandon? Li ne kuraĝis plue demandi. En lia koro la majstro estus vivanta dio, kiu povus ĉion scii kaj travidi.

En la sekventa frumateno, Asu laŭ la ordono de la majstro descendis Vulon-montaron, rajdante sur la ĵujubkolora ĉevalo. Sur la zigzaga pado, kun larmoj en la okuloj, li foj-refoje retrorigardis la templon sur la montosupro. Kvankam li deziris kiel eble plej rapide trovi Frenezulon Zano kaj venĝi sin, tamen vere li sentis domaĝon, disiĝante de la majstro kaj la taŭistoj-amikoj.

5

Oni diras: “Sen virino ne ekzistus hejmo.” Forpaso de la edzino kaj foriro de la filo multe ĉagrenis Oldan Lu, ke li ofte sola drinkadis hejme anstataŭ kulturaj enkampe. En la supra parto de Bahe-rivero aperis kelkaj orsablo-lavantaj fersipoj. Ili severe poluis la akvon, tiel ke fiŝoj pli kaj pli malmultiĝis en akvaro ĉe Jefenvilaĝo. La fiŝkaptisto Husi devigite ekserĉis novan akvoregionon kun riĉa fiŝresurso. Minzi ne volis forlasi Jefenvilaĝon, esperante revidi fraĵon Asun. Ŝi firme kredis, ke fraĵo Asu nepre revenos en iu tago. Tamen, por vivtenado, ŝi devis, kune kun sia patro, remis en la malnova ligna fiŝboato laŭflue de Bahe-rivero.

Sub la aŭtuna sunbrilo, la ligna fiŝboato lante veturis en la malsupran parton de Bahe-rivero. Husi intencis eltrovi senhoman lokon, kiu taŭgas por anki la fiŝboaton

kaj instalati sin kaj la filinon.

“Patro, rigardu, kiel granda arbo!” Entuziasme kriis Minzi, montrante malproksiman bordon. Vere, tie staris altega arbo kun kolosa krono, sub kiu kuŝis kelkaj plataj ŝtonoj. Ĉirkaŭ la loko estis vasta malaltaĵo kovrita de densa fragmitaro, tra kiu sin trovis apenaŭ rimarkebla pado ligiĝanta al ŝoseo ĉe montopiedo. Je ekstremo de la ŝoseo videblis urbeto. Husi kaj la filino starigis tendon kiel la domon, kun la plataj ŝtonoj kiel tablo kaj litoj.

Komencis nova vivo. Ĉiutage Husi fiŝkaptis post tagmanĝo kaj en la sekva mateno vendis la fiŝojn en la urbeto. Ĝenerale, Minzi asistante akompanis la patron. Hazarde ŝi faris mastrumadon hejme. Poste sidante ekster la tendo, ŝi jen spektis birdojn inter branĉoj, jen meditis rigardante malproksimen. La figuro de Asu ĉiam ŝvebadis antaŭ ŝiaj okuloj. Minzi ne ŝatis tiun ĉi izolan strandon de fragmitoj, ŝi sopiris pri Jefen-vilaĝo kaj tieaj vilaĝanoj, precipe pri fraĵo Asu, kun kiu ŝi multfoje intervidiĝis en songo.

6

Kvankam la sopiro al la hejmloko turmentis Asu dum kelkaj jaroj, tamen li decidis hejmeniri post plenumo de la venĝo. Li bone konis, ke tiaj homoj kia Frenezulo Zano ne al kutimas vivi norde aŭ enlande, li kun la glavo rajdis sur la ĉevalo suden laŭ ĉemara regiono. Dum pli ol du jaroj li serĉadis siajn malamikojn, perlaborante la vojaĝkostojn kiel provizora dungito. Finfine iun tagon, li informiĝis, ke Frenezulo Zano kun sia bando aktivas en la ĉefurbo de Hanan-insulo, kiu distancas ĉirkaŭ mil kilometrojn de Jefen-vilaĝo. Post kiam Asu atingis la ĉefurbon, oni sciigis al li, ke la bando jam esti eliminata.

Maje antaŭ kvin jaroj, subite aperis bando da rabistoj en la akvoregiono de la ĉefurbo. Oni ne sciis, de kie ili venis. Ili foje kaj foje rabis komercajn ŝipojn kaj vilaĝojn. La lokaj policanoj plurfoje serĉis sur la maro kaj persekutis sur la tero, sed ili ne sukcesis. Antaŭ unu kaj duona jaro okazis granda cunamo. Inter la viktimoj oni trovis naŭ alilokanojn, ok mortintaj kaj unu severe vundita. Pridemandite, la vundito konfesis, ke li estas membro de la bando el naŭ homoj, inter kiuj la ĉefo estas Frenezulo Zano; antaŭ ses jaroj la bando dum rabado mortigis du virinojn sur Bahe-rivero ĉe Jefen-vilaĝo, ili fuĝis kaj vagadis sur maro; poste ili venis al Hanan-insulo. La polico ĵetis la postvivanton en malliberejon. Neatendite li baldaŭ mortis de malsano.

Asu bedaŭris, ke li ne mortigis la malamikojn propramane, tamen li ankaŭ sentis sin ĝoja, ĉar la Ĉielo jam punis la malbonulojn. Li tuj sin returnis al hejmloko. Li volis laŭeble rapide vidi la patron, Minzi kaj onĉjon Husi.

Reveninte al Jefen-vilaĝo, Asu tre ĉagreniĝis, ke la patro jam kadukiĝis, kaj

aranaĵoj tute vualas la fenestron de Minzi. Ĉe la funebra ceremonio por la du patrinoj, surgenuante kaj riverencante kap-al-tere antaŭ la du spirit-tabuletoj, li ploregis preskaŭ ĝis svene, kaj ĉiuj ĉeestantaj vilaĝanoj inkluzive de la sola instruisto larmis torente kiel tajdo. Post la ceremonio, Asu abrupte rememoris la vortojn de sia majstro ĉe la adiaŭo kaj demandis al la instruisto, kion signifas “Vasta estas la reto de la Ĉielo, kaj kvankam grandaj estas ĝiaj maŝoj, ĝi tamen lasas al nenio ilin trairi”. La instruisto klarigis: “Tiuj vortoj estas similaj al la okcidenta proverbo, kiu diras ‘La muelŝtonoj de Dio muelas malrapide, sed fajne.’ Tio signifas, ke la Ĉiela ordono estas justa, kaj malbonfarantoj ricevos punon. Ĝi ŝajnas neperfekta, sed fine ĝi ne forlasos iun ajn malbonan homon.” Asu ekkomprenis la vortojn kaj elkore pli admiris sian majstron.


7

Iun frumatenton zefiro estis milda kaj aero vigliga. Minzi vekiĝinte eksentis sin senkaŭze maltrankvila kaj ekscitita, kaj ŝia koro ŝajne batis iomete pli forte ol normale. Ŝi decidis resti hejme anstataŭ akompani la patron.

Posttagmeze Minzi, sidante sur ŝtono, ĝuis la ĉirkaŭan pejzaĝon: aŭtuna ĉielo estas altega, nuboj maldensaj, montaro blua kaj fragmitaro orflava. Kiel agrabla la mondo estas! Post momento Minzi stariĝis kaj pasumis tien kaj reen. Ŝia menso malpaciis kiel la birdoj flugantaj kaj pepantaj inter la branĉoj. Foje ŝi turnis sian vizaĝon al Bahe-rivero, kaj aliafoje al la ŝoseo ĉe la montopiedo. Subite, Minzi trovis, ke de malproksime algalopis ĉevalo. Baldaŭ la rajdanto venis al la digo, haltigis sian ĉevalon kaj ĉirkaŭrigardis kvazaŭ serĉante ion. Poste la rajdanto spronis sian ĉevalon ekiri laŭ la pado tra fragmitoj en la direkto de la granda arbo. Minzi sentis streĉitecon kaj ne sciis kion fari. La jujubkolora ĉevalo pli kaj pli alproksimiĝis, Ŝi konfuziĝis kaj ekscitiĝis: “Kiu estas tiu? Ĉu estas...? Ĉu estas...?” Ŝiaj okuloj vualiĝis de larmoj kaj la lazura ĉielo turniĝis super ŝia kapo...



Nicole Else (Aŭstralio)



Ĉu mi estas ne normala virino?

Jen finfine la momento alvenis. Estas la 9a vespere kaj Sofia enaviadilas. Antaŭ unu monato

aŭtorino, Nicole Else

ŝi decidis translokiĝi al Aŭstralio. Nun ŝi pasigos la tutan nokton en la aviadilo kaj eĉ iom pli. Ŝi ne plu povas ŝanĝi sian planon. La aviadilo tuj ekflugos. Ĉu ŝi sukcesos dormi aŭ ĉu ŝia menso estos ankoraŭ plenplena de demandoj, duboj, timoj?

Sofia ne kontentis pri sia vivo en Britio. Tial ŝi decidis forlasi Brition en la espero trovi socion kiu pli taŭgas por ŝi. En la aviadilo, ŝi unue komencis legi la libron “Amo, tuso kaj forpaso” kiun ŝi kunprenis por ne enui en la aviadilo, sed baldaŭ ŝi ne plu sukcesas atenti pri la vortoj en la libro. Ŝi komencas pripensi pri tio kio gravas en socio kaj pri problemoj kiujn ŝi spertis.

Ŝi ne sentas sin sama kiel la aliaj virinoj. Tio kio gravas al ŝi ŝajne ne tiom gravas al aliaj personoj kaj inverse.

Ŝi ja ofte aŭdas, ke gravas la personeco de personoj, ilia konduto, ĉu ili estas afablaj, agrablaj kaj bonkoraj. Ne tiom gravas la ekstera aspekto. Kiel por libro ne gravas la kovrilo, sed la enhavo. Sed... en praktiko preskaŭ ĉiuj diras, ke la ekstera aspekto de persono ege gravas. Gravas surhavi belajn, gladitajn vestaĵojn. Sofia pensas, ke gladi estas perdedo de tempo. Ŝi ofte aŭdas, ke unuaj impresoj tre gravas. Ĉu tio ne kontraŭdiras la eldiron, ke la interno de persono plej gravas? Sofia ŝatas praktikajn vestaĵojn, komfortajn ŝuojn sen alta kalkanumo, ŝi malŝatas ŝminkajon. Ĉu personoj juĝas ŝin pro tio? Certe, multaj faras. Se vestaĵo estas komforta, ŝi surmetas ĝin ĝis kiam ĝi estas difektita. Kial elspezi monon por aliaj vestaĵoj?

Por multaj personoj tre gravas imponi. Ili tre deziras posedi mansakon, sportŝuojn, brakhorloĝon de fama prestiĝa multekosta firmao. Ili fieras, ili ŝajne volas montri, ke ili estas altvaloraj personoj, kvazaŭ viaj posedaĵoj determinas vian valoron. Sed Sofia pensas, ke ili devus honti elspezi multe da mono por io kio haveblas multe malpli koste. Ekzistas multaj brakhorloĝoj kiuj perfekte funkcias kaj aspektas bele por malalta prezo. Aliaj en la mondo ne havas sufiĉe da mono por aĉeti medikamentojn, por pagi luprezon, ekzemple. Sofia tute ne volus posedi

multekostajn juvelojn. Tute ne per posedaĵoj ŝi deziras imponi. Ŝi deziras pli justan mondon en kiu ne estas tiom granda diferenco inter malriĉuloj kaj riĉuloj.

En la socio honesteco estas ĝenerale alte taksata. Ankaŭ nur teorie, en praktiko vi devas daŭre esti malhonesta kaj mensogi. Ekzemple Sofia memoras pri intervjuo por laborposteno. La kompaniestro demandis kial ŝi deziras labori por tiu kompanio. Ĉu ŝi honeste respondu “mi ne vere deziras labori por via kompanio, sed mi bezonas monon por vivteni min”. Krome vi daŭre devas esti malhonesta por ne vundi aliajn personojn. Vi devas ŝajnigi, ke vi ŝatas la tute senutilan donacon, ke vi admiras la multekostan aŭton, ke ne gravas se iu stulte perdigis al vi multe da tempo.

Gepatroj ofte diras al siaj infanoj ke respekto kaj ĝentileco tre gravas. Sed praktike ili montras, ke tio kio vere gravas estas la vortoj, ne la sentoj de la infanoj aŭ gejunuloj. Multaj gepatroj devigas infanojn diri “bonvolu” kaj “dankon” ekzemple kaj ne nur “Donu al mi...” kvazaŭ se la infanoj diras tiujn vortojn ili sentos respekton. Sed diri respektajn vortojn kaj senti respekton kaj dankemon estas io tute alia. Infanoj obeemaj eble konsentos diri respektajn vortojn, sed ĉu tio signifas ke ene de si ili vere sentas respekton? Tute ne laŭ Sofia. Kial devigi infanon diri dankon, kiam la patrino donas sandviĉon ekzemple? Eble gepatroj povus klarigi, ke fremduloj juĝos ilin kaj do indas diri “dankon” al ili eĉ se vi ne sentas dankemon, sed gepatroj ja konas la infanojn kaj povas juĝi ilin laŭ agoj kaj ne laŭ kiom ofte ili vere diras “dankon”. Sofia volonte diras “dankon” kiam ŝi sentas dankemon, sed se oni diras ĝin aŭtomate por tute eta afero, tiam ĝi perdas sian signifon, ĝi ne plu estas eldiro de vera dankemo.

Multaj personoj pensas, ke Sofia estas malĝentila, ĉar ili aldonas signifon al ŝiaj vortoj. Eble ŝi skribis demandon kiel “Kial vi ne respondis?”. Ŝi simple deziris scii la kialon. Eble li malsaniĝis aŭ havis speciale multajn okupojn kaj tial ne respondis. Sed la ricevanto interpretis tion kiel aĉan akuzon, fortan kritikon, ke li ankoraŭ ne respondis. Daŭre personoj misinterpretas la vortojn de Sofia kaj misjuĝas ŝin. Iuj eĉ asertas, ke ŝi estas ne normala. Sofia demandas sin, ĉu ankaŭ Aŭstralianoj tiel interpretos ŝiajn vortojn aŭ ĉu tio estas tipe Brita afero.

Ĉu Aŭstralianoj estos same juĝemaj kiel Britoj? Ĉu ili juĝos personojn kiujn ili fakte ankoraŭ tute ne konas laŭ la aspekto kaj vestaĵoj? Ĉu almenaŭ la Esperantistoj estos malpli juĝemaj kaj provos iom ekkoni la personon antaŭ ol juĝi?

En la aviadilo Sofia pasigis multajn horojn pripensante pri tio kio ĝenerale gravas en socio kaj pri la fakto, ke ŝia pensmaniero ne estas sama kiel tiu de la plejmulto.

Finfine venas la anonco, ke la aviadilo baldaŭ surteriĝos. Sofia apenaŭ sukcesis dormi. Kvankam ŝi lacas, ŝi estas ekscitita pri sia nova vivo en fora lando.

Ĉu Sofia faris bonan decidon translokiĝi? Nu, baldaŭ ŝi povos konstati ĉu la vivo en Aŭstralio ja estas pli bona ol la vivo en Britio.

Evidente Sofia ne estas normala. Sed kio vere estas normaleco? ✖

Elena Popova (Bulgario)



Ĉeriza vetero

Kiam ili eliris hejmen, la suno brilis kaj la ĉielo, sen unu nubo, promesis belan printempan tagon.

La ĉerizarbo en la vinberujo donis abundajn fruktojn, jam maturajn. Unu el la branĉoj estis fleksita al la tero sub ĝia pezo. Patro kaj filino iris por kolekti tiom, kiom ili povis porti. Ili hastis,

aŭtorino, Elena Popova

plenigante du grandajn sakojn, kiam ili aŭdis malproksiman tondron. Ili apenaŭ povis eliri el la vinberejoj survoje al la urbo, kiam forte ekpluvis. Nenio estis videbla ĉirkaŭe pro la pluvmantelo.

Tute malsekaj, kun sakoj plenaj de akvo sur la ŝultroj, ili rapidis silente. Ili pasigis la unuhoran vojon en duono de la tempo sen halto. Ili ne sentis sin lacaj sub la minaco de pluvo kaj tondro de la koleraj nuboj. Ili devis alporti la fruktojn hejmen...

Ili haltis ĉe la enirejo de la bloko por ellasi la akvon el la sakoj, jam ruĝa pro la ĉerizsuko.

Kiam ili revenis al la vinberejo kelkajn tagojn poste, la ĉerizarbo aspektis malgaje forlasita, kun la putrantaj ĉerizoj lasitaj sur ĝi, kun la pendanta branĉo. Laodoro de putriganta frukto estis ĉie.

Virino survoje

Sola virino en malhelaj vestoj malrapide marŝas al la rivero. Ŝi verŝajne volas rakonti al ĝi pri siaj zorgoj.

La rivero estas trankvila hodiaŭ, io kantas kaj parolas. Eble ĝi jam "legis" la menson de la virino kaj jam respondas al ŝi. Ni aŭskultu ĝin:

"Homoj, birdoj kaj ĉiaj bestoj venas al mi, eĉ la arboj kaj la herboj strebas al mi, ĉar sen la akvo, kiun mi alportas, ekzistas vivo por neniuj. Mi komprenas ilin kaj helpas kiam kaj kiel mi povas. Mi forlavis kaj forigas timojn, dubojn kaj zorgojn, mi donas pacon kaj esperon. Jes, kiam mi estas trankvila, pura kaj bona kiel hodiaŭ. Sed ne ĉiam! Kaj ne koleru al mi, kiam mi estas ŝtorma, malklara, kiam mi ruinigas, do mi purigas ĉion malbonan kaj malnovan sur mia vojo, kiun vi ĵetas al mi.

Jen, la birdoj trinkas, dankas min kaj poste kantas al mi... Mi aŭdas ilin kaj mi estas feliĉa... Homoj, zorgu pri mi, por ke ankaŭ vi estu feliĉaj, mi petas!"

Virino marŝas al la rivero.

La ĉielo estas malluma, ie estas fajro, sed ĉu ankaŭ ne estas fajro en ŝia animo?

majo 2024

Bakin(1904-2005)



Bakin, granda verkisto de Ĉinio

La paradizo por birdoj

Ni vespermanĝis ĉe la lernejo, kie nia amiko instruis. La vetera varmego jam mildiĝis. La suno subiris la monton kaj restigis rubandon da vesperruĝo sur la ĉielo, sur montsupro kaj sur arbokronoj.

“Ni iru remi,” Chen proponis. Tiam ni spektis la montan pejzaĝon, starante ĉe la lageto antaŭ la lerneja pordo.

“Bone,” aliaj amikoj ĝoje eĥis.

Irinte pecon da makadama vojo, ni rapide atingis la riverbordon. Tie staris domo kun palafitoj en riverakvo. Trairinte ĝin, ni trovis kelkajn boatojn sub du arbegoj ĉe la bordo.

Ni saltis en boaton unu post alia. Unu amiko malligis la ŝnuron de la boato kaj movis ĝin per bambustango. Ĝi malrapide skuiĝis kaj glitis al la mezo de la rivero.

Tri amikoj remis. Mi kaj Ye spektis la pejzaĝon ĉirkaŭan, sidante en la boato.

Malproksime sur montdeklivo alte staris pagodo en brakumo de multaj verdaj arboj. En la proksimeco mankis multe da tiaj pagodoj, kaj tie troviĝis la hejmloko de amiko Ye.

La rivero estis larĝa, sed neniam ondetoj videblis sur la blanka akvosurfaco. La boato trankvile fluis sur la rivero. Tri pagadoj regule plaŭdis en akvon.

Ĉe iu loko la rivero mallarĝiĝis. Frondoj post frondoj kun verdaj folioj sin ŝovis sur la riversurfacon. Tiuj folioj estis aminde verdaj. Ili apartenis al prospere

kreskantaj banjanarboj, sed mi ne povis vidi ties trunkojn.

Kiam mi asertis, ke tie kreskas multaj banjanarboj, miaj amikoj tuj korektis mian eraran aserton. Unu el ili diris, ke nur unu banjanarbo kreskas tie, kaj alia diris, ke du. Mi jam estis vidinta multajn grandajn banjanarbojn, sed tiom grandan arbon kiom ĉi tiu mi unuafoje vidis.

Nia boato laŭgrade proksimiĝis al la granda banjanarbo. Fine mi ekhavis ŝancon vidi ĝian veran vizaĝon: vere ĝi estis granda arbo kun sennombraj branĉoj, sur kiuj kreskis radikoj kaj multaj el ili pendis ĝis la tero kaj eĉ enŝoviĝis en la grundon. Parto de ĝiaj branĉoj pendis tuj super la akvosurfaco. De malproksime oni povis vidi, ke granda arbo kvazaŭ kuŝas sur akvo.

Nun estis la sezono, dum kiu prosperis branĉoj kaj folioj. (La arboj jam donis etajn berojn, multaj el kiuj jam falis sur la teron.) Per tio tiu ĉi banjanarbo ŝajne montris al ni sian tutan vivforton. Tiom da verdaj folioj, amasiĝantaj sur la arbo faskojn super faskoj, lasis neniajn fendetojn inter si. Junverdeco brilis antaŭ niaj okuloj, kvazaŭ nova vivo sur ĉiu folio tremetus.

Kiel bela arbego en la suda lando!

Nia boato haltis momenton sub la arbego. Ni ne surbordiĝis pro malseka grundo. Amiko diris, ke tie estas “la paradizo por birdoj” kaj multaj birdoj konstruis neston sur tiu ĉi arbego. Kampuloj ne permesis kapti ilin. Mi ŝajne aŭdis bruon de flugilsvingado de kelkaj birdoj, sed kiam mi direktis tien mian atenton rigardon, mi ne vidis signon de birdoj. Nur sennombraj radikoj hirtiĝis tie, kiel palisoj. La tero estis malseka, eble pro tio ke flusakvo ofte invadis la bordon. Nenia birdo troviĝis en “la paradizo por birdoj”, mi pensis. La boato startis sub remado de amiko kaj ĝi lante fluis al la mezo de la rivero.

Sur kampara pado ĉe la bordo staris kelkaj liĉiarboj, kiuj estis peze ŝarĝitaj per ruĝaj beroj. Nia boato floris ĝis tie. Amiko direktis la boaton per pagajo en mallarĝan fluejon. Apud la pado ni ĉiuj saltis sur la bordon.

Du amikoj rapide grimpis sur arbon kaj jetis suben frondojn kun liĉiberoj. Mi, Chen kaj Ye kaptis ilin, starante sub la arbo. Kiam grimpintoj surteriĝis, ni manĝis liĉiberojn, reirante al la boato.

La sekvan tagon ni veturis per boato al la hejmloko de Ye, jen la loko kun pagodo sur montdeklivo. Ni ekiris de la lernejo, kie Chen instruis, kaj ni preterpasis “la paradizon por birdoj”.

Matene la sunradioj rebrilis sur la akvosurfaco kaj arbokronoj. Ĉio aspektis tre hele. Nia boato restis sub la arbego dum kelka tempo.

Komence estis kviete ĉirkaŭe. Tuj poste aŭdiĝis subite pepado de birdo. Amiko Chen kunfrapis siajn manojn, kaj ni vidis birdegon ekflugi, sekvate de la dua kaj la tria. Ni daŭrigis manfrapadon kaj baldaŭ la arbaro fariĝis vigloplena. Ĉie vidiĝis

birdoj kaj birdombroj, grandaj, malgrandaj, mikskoloraj, nigraj, unuj el kiuj pependis sur arboj, la duaj ekflugis kaj la triaj svingis flugilojn.

Mi atenteme pririgardis, sed miaj okuloj ne povis ĉirkaŭpreni ĉion. Kiam mi klare vidis unu birdon, mi preterlasis alian, kaj kiam mi okule kaptis ĉi tiun, la tria forflugis. Garulo alflugis, sed ĝi tuj reflugis en la arbaron, surprizite pro mia manfrapado. Ĝi ekscitite kantis sur maldika branĉo. Kiel oreplaca kanto!

“Ni foriru,” Ye urĝis.

Kiam la boato glitis al la vilaĝo sube de la pagodo, mi returnis mian kapon por vidi la pompan arbegon forlasitan malantaŭe. Mi ekhavis senton de domaĝado. Hieraŭ miaj okuloj trompis min. “Paradizo por birdoj” vere estis la paradizo por birdoj.

Kantono

junie de 1933

Fajro

Aŭdiĝis nur malpeza ronkado kaj subite estingiĝis la kvadrata lanterno pendanta de la boattegmento. Mi leviĝis al la sida pozo kaj puŝmalferminte la fenestreton apudan, mi vidis strion da griza lumo. Mi ne sciis, kiam estas nun kaj kie la boato restas. Mi kvazaŭ troviĝis en sonĝo kaj la koŝmaro multe pezis sur mia kapo. Ruĝa maso flosis antaŭ miaj okuloj. Elŝovinte la kapon, mi vidis tra la fenestreto, ke kviete kuŝas horizontale pale verda akvo de la rivero kaj malproksime alte staras montoj kvazaŭ pentritaj per nigra tuĉo. Mi stupore fiksrigardis la akvosurfacon: aperas mia kapo en la akvo, komence ĝi estis nigra ombro kaj poste ĝin kovris ruĝa maso. Mi ekfrotis al mi la okulojn: mia kapo speguliĝis malhele sur la akvosurfaco. Nenia lamplumo vidiĝis. Ŝajnis al mi, ke ĉio jam falis en profundan dormon. La ĉielo malalte pendis. Kelkaj steloj aparte brilis. Riverakvo malpeze forfluis sub la boato. Mi etendis manon en la akvon kaj sentis grandan malvarmon de la akvo. Mi rigardis la ĉirkaŭaĵon sufiĉe longe. Dum tiu tempo la objektoj antaŭ miaj okuloj ŝajne ne ekmoviĝis kaj nur la aero malvarmiĝis iom post iom. Okaze ekbrilis fasko da ruĝa lumo, sed kiam mi okule kaptis la ruĝan lumon, mi nur vidis amason da montoj en profunda dormo.

Mi retiris la kapon en kajuton, kiu troviĝis en malhela mallumo, kaj sentis homan odoron jen kaj jen ataki miajn naztruojn. Laodoro, kvazaŭ mano, gratadis al mi la bruston. Mi eligis elspiron ekster la fenestreton kaj fermis ĝin. Subite la amiko apud mi laŭte ekparolis: “Jen vidu. Kia fajrego!” Mi surprizite rigardis mian amikon. Mi povis vidi nenion. La amiko restis en peza dormo. Li ĵus ekmoviĝis ŝajne por sin turni sur la alian flankon en la lito, sed nun eliĝis nenia sono.

La kajuto estis obskura mondo sen lumo kaj fajro. Sed kial la amiko kriadis pri

“fajro”? Ĉu li havis la saman sonĝon kiel mi? Mi volis veki lin por bone demandi lin. Mi donis puŝon al lia brako, sed li nur eligis voĉeton kaj turniĝis al la alia flanko. La amikoj dormantaj apud li senĉese elblovis ronkojn, nek laŭtajn nek rapidemajn, donante la impreson, ke ili bone dormas.

Mi sentis malkomforton je la okuloj. Miaj palpebroj ŝajne peziĝis. Kun okuloj ĉiam malfermitaj mi sentis lacecon kaj mi klinis min al la kajuta vando por endormiĝi kun fermitaj okuloj. Apenaŭ mi fermis la okulojn, mi aŭdis tiun amikon krei “fajron”. Mi surpriziĝis. Kiam mi retenis mian spiron por aŭskulti plu, li denove firme fermis sian buŝon.

Mi turnis la kapon sur la kapkuseno por rigardi ĉirkaŭen kaj miaj okuloj laŭgrade adaptiĝis al la mallumo. Mi vidis kelkajn ombrojn kaj distingis la kolorojn de la litkovrilo kaj lana littuko. La korbo pendanta ĉe la boatvosto iome skuiĝis kune kun la boato, kvazaŭ gvitanta homo blanke vestita. En la kajuto estis tre sufoke. Ronkado pli kaj pli laŭtiĝis, sed ĝi ne povus eliĝi tra la boattegmento. Ĝi ŝajne akumuliĝis kaj pleniĝis la kajuton. Ĝi, kune kun malbonodoro, premis sur min, tiel ke mi preskaŭ ne povis spiri. Mi ne havis eblecon fermi miajn okulojn nek povis trankviliĝi. Mi volis barakti, kaj mi turniĝis en la lito, dekstren aŭ maldekstren. Sed tio ne utilis, kaj mi sentis pli neelteneblan sufokecon.

Tiam miajn orelojn kaptis la sama krio “fajro”. Antaŭ miaj okuloj ekbrilis ruĝa lumo. Tiu amiko en peza dormo ne malfermis sian buŝon. Ĝi estis mia propra krio. La fajra lumo en mia sonĝo ankoraŭ alpremias min. Ne plu ĝin eltenante, mi forpuŝis la litkovrilon kaj fuĝis ekster la kajuton.

Ekster la kajuto dormis servisto ŝajne en kvieta dormo, kaj miaj paŝoj ne dispremis lian sonĝon. La boato flosis sur la kvieta akvo pale briletanta. La montoj hele inkaj ĉirkaŭe similis al ekrano ŝirmanta la riverakvon kaj du aŭ tri dormantajn boatojn.

Mi staris, apogante min sur la kajuta pordo. La riverakvo konstante kaj murmure frapetis la boatfundon. Vento blovis en mian vizaĝon de tempo al tempo kaj malpeze knarigis la boattegmento. Mi sentis ioman faciliĝon de spirado. Kune kun ronkado el la kajuto alŝvebis krio “fajro!”.

Frostotremo min kaptis. Denove ĝi estis mia voĉo, “fajro” en mia sonĝo!

Kvar jarojn! Ĝi jam postkuris min kvar jarojn!

Antaŭ kvar jaroj, tiun tagon, kiam Ŝanhajo estis okupita, mi rigardis la transbordan incendion, kvazaŭ brulantan Romon. Domoj estis reduktitaj al cindro, vivoj ruinigitaj kaj la tero tretpremita. La fajra maro bolis antaŭ miaj okuloj kaj mi neniam vidis tian fajregon, kiu detruis ĉion — vivon, klopodojn, riĉaĵojn kaj esperon. Ĉio ĉi tio tamen ne neniom rilatis al mi. La flamanta tero estis la loko, kie mi loĝis; tiuj suferantoj estis miaj samlandanoj kaj miaj fratoj; tio, kio estis detruita, estis miaj

espero kaj idealo. La idealo de nia nacio troviĝis en torturo. Rigardante la ruĝan lumon tra la ĉielo, mi sentis, ke mia koro estas tranĉita per tranĉilo. Mi ekpensis pri la maksimumo de Okcidenta filozofo: “Tiaj kelkaj minutoj povas esti dekjaran malamon kaj dumvivan venĝemon.” Kun dentoj grincigitaj mi ĵuris en la koro: “Iutage ni, kun la kapo alte levita, nepre reiros al tiu ĉi loko kaj konstruos belan ĝardenon sur la ejo plagita de tiu fajrego.” Kiam mi forlasis la bordon, retenante larmojn, mi kvazaŭ vidis reviviĝintan fenikson el la fajrego.

Jam forpasis kvar jaroj. Ĉi-nokte mi sonĝis pri la terura fajrego sur la boato revenanta de Yangshuo, kaj mi refoje vidis sur la kvieta rivero la fajregon okazintan en Ŝanhajo antaŭ kvar jaroj, dum kiuj mi neniam forgesis tiun tagon kaj ĉiam pensadis pri la tago, kiam ni revenos kun la kapo alte levita. Ĉu la tago de venko alproksimiĝas, aŭ mia entuziasmo malpliigis kaj mi bezonas fajron por helpi ĝin bruliĝi? Ĉu la vorto “fajro” el la buŝo de mia amiko dormanta estas al mi averto aŭ profetaĵo?...

Kun timemo mi returnis la kapon al la kajuto. Amikoj ĉiuj troviĝis en peza dormo kaj neniun donis al mi respondon. Mi apenaŭ returnis la kapon, kiam mi vidis lumantan ombron forflugi super mia kapo al la sel-forma montopinto. Ĝi ĝuste estis la fenikso en la fajro.

Mia rigardo sekvis la halucinan ombron en mia cerbo. Mi pensadis kaj mi pripensis niajn teron kaj popolon en suferoj, kaj mi nereteneble ekridetis kun larmoj en la okuloj. Dum tiu ĉi palpebruma daŭro la tuta rivero, la tuta ĉielo kaj la sennombraj montoj ŝajne lumiĝis.

*skribita en Guilin post reveno de Yangshuo,
la dudek-du-an de septembro, 1941*

La kvieta ĝardeno

Ne aŭdiĝas bojado de la hundo de la domposedanto. Nun estas tre kviete en la ĝardeno. Tiu sennoma kvinpetala blanka floro ankoraŭ restas en soleca florado. La sunlumo verŝas siajn radiojn sur pinbranĉojn kaj miniaturan florarbon en vazo kaj farbas orflave tiujn verdajn foliojn. La vetero estas serena. Sen levi la kapon por vidi, mi certas, ke etendiĝas serena ĉielo dekmil liojn.

Subite mi aŭdas sonojn de tintilo sur la sulkoj de ferladaj tegoloj. Levinte la kapon, mi vidas du sciurojn glitante de sur tegoloj. Tiuj du estaĵetoj plezure ĉasas unu al la alia inter pinbranĉoj. Mian atenton kaptas iliaj lanpilk-similaj vostegoj, amindaj okuletoj kaj tintiloj pendantaj sur la kolo. Mi simple fiksas mian rigardon al ili tra la fenestro. Sed post du aŭ tri ĉirkaŭkuroj ili reiras de la visteria pergolo al

la tegoloj de la tegmento, kaj malaperas dum palpebruma daŭro, lasante al mi la kvietan ĝardenon.

Apenaŭ mi mallevas la kapon, mi aŭdas pepadon de birdoj. Mia denova rigardo kaptas blugrizan birdon kun blanka kapeto, kiu fiere kantas kun kapeto levita. Sur la elektra drato super la tegmento paro da paseroj estas ĉirpe kverantaj.

Kvankam mi ne komprenas kion ili pepe diras, mi tamen elaŭdas trankvilan ĝojon el la pepbruo. Tio, kion ili volas komuniki al mi, certe estas ilia ĝoj sento. Malfeliĉe mi ne povas responde reagi al ili. Per eksvingo de mia mano ili forflugis. Miaj vortoj ne povas retenigi ilin, sed ili restigas al mi kvietecon de la ĝardeno. Tamen mi scias, ke ili baldaŭ revene alflugos.

Nun mi sentas, ke mi estas la sola estaĵo en la tuta ĝardeno. Sidante kaj klinante min super la tablo, mi skribas sen ĝeno de ajna sono. Estas ĝusta tempo por mi koncentriĝi sur la papero, sed mi iom post iom malpacienciĝas. Tia kvieteco, kiel mano, malrapide alproksimiĝas al mia gorĝo. Mi sentas, ke mi ne povas spiri facile. Ĝi estas nenatura kvieteco. Ĝi estas malbona aŭguro, simila al sufoka kaj stagna aero tuj antaŭ alveno de pluvoŝtormo.

Mi ŝajne atendas ion. Mi ekhavas ian maltrankvilecon kaj mi ne povas kvietigi min. Certe mi atendas ion. Mi atendas alarmon pri aeratako aŭ bojadon de la hundo de mia domposedanto, t.e. la antaŭaverta alarmo estas jam nuligita kaj ne plu sonoros alarmo pri aeratako. Kaj estas nenecese por mi ŝlosi la pordon kaj eliri post kiam mi aŭdas la ŝrikajn siren-sonojn de alarmo pri aeratako. Dum serenaj tagoj de la lasta duonmonato jam preskaŭ fariĝis kutima rutino sonorigi alarmon pri aeratako.

Tamen mia atendo iras al neniam rezulto. Birdoj revenas kaj ree forflugas. Ankaŭ sciuroj alvenas ankoraŭfoje, sed ili ĉesas unu al la alia sur la tegmento kaj mi ne scias, kien ili malaperis. Alŝvebas grakado de korvoj sur la tegmento de la fronta domo, kiujn mi ne povas vidi. Ili ne scias, kio okazas en la homa mondo, kaj ili ne povas alporti informojn.

Kiam mi skribas la supran alineon, eksonoras la alarmo pri aeratako. Vere mi ne atendas vane. Mi eksentas moviĝon de la aero. Mi aŭdas hupadon de aŭtoj sur la stratoj. Mi ankaŭ aŭdas bruon de motoroj de civilaj aviadiloj, kiuj eble fuĝe elflugas por eviti aeratakon. Kelkfoje niaj ĉasaviadiloj elflugis en vicoj kaj sin pretigis ataki la malamikajn aviadilojn. Ne plu skribante, mi ekprenas libron, ŝlosas la pordon de la ĝardeno kaj rapideme eliras.

Post terura interpuŝiĝo ĉe la urba pordego mi finfine atingas ĉirkaŭurbon. Tie mi restas pli ol du horojn. Kun kelkaj amikoj mi manĝas lunĉon alportitan de ili. Post nuliĝo de la aerataka alarmo mi revenas kaj puŝmalfermas la pordon de la ĝardeno. Mian vizaĝon atakis ankoraŭ la kvieteco de la ĝardeno.

Mi eniras la ĉambron, aliras al la tablo, malfermas la vitran fenestron kaj rigardas

eksteren, antaŭ ol preni plumon por skribi. Sunlumo disĵetiĝas sur arbojn, sur la teron kaj en la tutan ĝardenon. Ĉe murangulo nana bambuo tremetigas siajn pintajn foliojn. Muŝego zumante flugas en mian ĉambron kaj ĉirkaŭflugas super mia kapo. Unu aŭ du korvoj grakadas en la loko, kiun mi ne povas vidi. Flava papilieto flirtas inter blankaj floretoj. Subite stranga sono aŭdiĝas el la tegmentaj tegoloj de la fronta domo. Kaj denove tiuj du sciuroj malsuprenĝlitas laŭ la ferlada defluejo de la alta muro. Ili kuras sur la lignan kradon, kiu estas uzata por subteni pinarbon, malsupren ĉe la piedoj de la krado kaj poste sub ŝtonan balustradon ĉirkaŭ laĝeto kun rokaĵo. Ili ĉasas unu la alian kaj pere de la ligna krado suprenkuras sur branĉojn, malantaŭ kies folioj ili sin kaŝas. Pinpingloj moviĝas kaj ankaŭ branĉetoj de laŭ-arbo, kie verda birdeto ĵus sidiĝis.

Ankoraŭ ne aŭdiĝas bojado. Kun flanko dekstren mi pririgardas la mallarĝan sensunan pasejon. La pordeto de la domo de mia domposedanto estas firme ŝlosita kaj de tie aŭdiĝas nenio. Povas esti, ke jam frumatene la tuta familio iris ekster la urbon antaŭ ol la aerataka alarmo sonoros kaj nun ili ankoraŭ ne revenas eble ĝis la tempo de sunsubiro. Tiu graso kaj fortika flava hundo ankaŭ evakuigis kune kun ili, alie la sonoj de la hunda gratado al la pordo albloviĝus al miaj oreloj.

Mi denove sidiĝas ĉe la fenestro kaj skribas multe da vortoj. Kiel antaŭe, min akompanas nur grakado de korvoj kaj pepado de birdoj. Zumado de la muŝego jam formortis. Nun sonas mordetado de rato. Tiuj sonoj jen aŭdiĝas dum kelka tempo jen silentiĝas dum alia tempo. En ĉi tiu urbo minacata de bombado mi sentas solecon. Tamen, kiel glavo tratanĉonta la lazuran vaston de la ĉielo, la altsona motormuĝado de aviadiloj subite aŭdiĝas. La tiel impona sono forbalaas la kvietecon de la ĝardeno. Mi volas demeti la plumon kaj iri en la korton pririgardi la ĉielon, kie flugas tiujn grizakoloraj libeletoj kun ora rebrilo de la sunlumo sur la lazura ĉielo. Kiel bela spektaklo ĝi estas!

la 11-an de oktobro, 1940,

Kunming

Pri Esperanto

La lasta peco de *Penseroj* estis verkita en malsanulejo. Nelonge post elhospitaliĝo, mi veturis al Norda Eŭropo. Antaŭ mia veturado eksterlanden, mi malvarmumiĝis, kaj kiam mi atingis Stokholmon, mi suferis de bronkito.

Por la malsana turmentado de lasta fojo, mi alparolis al la kamaradoj de la ĉina ambasadorejo en Svedio pri mia nuna malsano. Vespere ŝanhajano, kiu studis tie, venis por kuraci min. La sekvantan tagon, la kamaradoj de la ambasadorejo alportis kaĉon, nudelojn kaj fruktojn al mi. Mi sentis familian varmon eĉ en la hotelo. Antaŭan tagon, kiam mi elflugmaŝiniĝis, mi pensis, ke mi atingis landon tute

fremdan al mi. La duan tagon mi jam vidis tiom da karuloj. Kvankam mi loĝis malpli ol du semajnoj en la sveda ĉefurbo, mi vivis senzorge kaj plezure. Ĉe la momento, kiam mi forlasis la pitoreskan kaj pacan urbon konsistantan el sennombraj insuletoj kaj ligitan per pli ol sepdek pontoj, mi eĉ sentis, ke mi estas en bona sano.

Mi veturis tien por ĉeesti la 65-an UK. Nun mi ne estis tiel klara, kiam mi eklernis Esperanton, eble de 1918, la antaŭa jaro de la Movado de la Kvara de Majo (1919), aŭ eble de 1921. Tamen mia konstanta kaj serioza lernado de Esperanto okazis dum 1924 kaj 1925. Tiam mi lernis en Nankino. En mia postkursa tempo, mi legis unu post alia librojn poŝte aĉetitajn de Esperanta Librejo en Ŝanhajo, kaj finlegis ĉiujn aĉetebblajn, kvankam malmultajn. Kiel memlernanto, mi nur legis, nekutima al parolado en Esperanto. Poste mi korespondis kun du aŭ tri francaj amikoj. Je la komenco de decembro, 1928, kiam mi revenis al Ŝanhajo, en hotelo min vizitis Sofio, mia amiko, kiu siatempe servis kiel sekretario aŭ konsilanto de Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Li diris al mi, “La domo de la asocio estas vaka. Kial ne transloĝi tien por kelkaj tagoj?” Tion mi faris. Endome de la asocio situanta en strateto Hongxingfang, mi loĝis tie per kanvasa faldebla liteto por proksimume duonmonato. Post kiam mi luis domon en strateto Baoguang, mi forlasis strateton Hongxingfang. De tiam, mi fariĝis ano de la asocio, kaj iom poste ties konsilanto, kaj ankaŭ donis helpon al la asocio. Intertempe mi elesperantigis kelkajn librojn kiaj unuakta teatraĵo *La Floro de la Pasinto* de itala E. Amicis, dramo *Morto de Danton* de soveta A. Tolstoj, *Danco de Skeletoj* de japana Ujaku Akita, kaj originala romaneto *Printempo en Aŭtuno* de hungara Julio Baghy. Ĝis kiam, okaze de la evento “la 18-a de Januaro”, la kanonfajro cindrigis la strateton Hongxingfang, mi transloĝiĝis el Zhabei, norda distrikto de Ŝanhajo. Pro “forpereigo” de Ŝanhaja Esperanto-Asocio, mi forlasis la lokan E-Movadon.

Dum la dek-jara terura plago (Kultura Revolucio — tradukinto), “Kvarpersona Bando” pere de Ŝanhaja Kompartia Komitato kondamnis min kiel “kontraŭrevoluciulon” nominalan kaj senigis min je la rajto de verkado. Poste mi faris kelkajn tradukojn en sekreto kaj, neokupite, foliumis Esperantajn librojn troveblajn en mia hejmo. Kaj iom post iom la Esperantaj vortoj, kiuj mi jam forgesis, fariĝis konataj al mi. Ŝajnis, ke mi kvazaŭ troviĝis en miaj junaj tagoj, kaj pli grandiĝis denove mia intereso pri Esperanto. Pro tio, mi ĉeestis al ĉijara UK. Antaŭ dekoj da jaroj, mi aŭdis pri tia universala kongreso. Kaj kiam mi estis en la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, mi aŭdis okazajn babilojn en Esperanto. Sed nun en kaj ekster la kunvenejo ĉie vidiĝis intimaj kaj ridetantaj vizaĝoj, kaj ĉie aŭdiĝis amikaj babiladoj, tre fluaj kaj naturaj, en la sama lingvo, kvankam tiuj babilantoj devenis de kelkdekaj landoj. En la kongresejo, oni prelegis kaj diskutis Esperante tiel sperte kiel ili faris en siaj propraj lingvoj. Sidante tie, mi ŝajne sentis, ke mi partoprenas en harmonia

familia kuniĝo. Tio estis la unua fojo por mi, sed tio, kion mi sopiris kaj imagis por multaj jaroj, estis tia okazo. Mi sentis bedaŭron, ke mi ne povas libere uzi ĉi tiun lingvon. Iliaj paroloj en Esperanto kvazaŭ fluus senĉese el fonto aŭ eligus kantojn kaj ariojn, kio estis vere raviga. Tamen Esperantaj vortoj el mia buŝo senmoviĝis kvazaŭ nepoluritaj ŝtonetoj amasigitaj. Sed mi ne seniluziiĝis, ĉar la junuloj el la Ĉina Delegacio parolis flue kaj prete. Ili amikiĝis kun multaj homoj kaj babiladis harmonie kun tiuj. Nia espero surmetiĝis sur iln.

Antaŭ ol mi forveturis al Norda Eŭropo, amikoj deadmonis min partopreni la kongreson, kaj unu amiko eĉ detenis min, konsiderante, ke mi ne devu sin okupi tiamaniere pro mia granda aĝo. Tamen ili neniel imagis, ke dum ĉi tiuj jaroj mi donis konstantan atenton al la problemo de internaciaj lingvoj. Pere de ĉifoja kongreso, mia kredo pri Esperanto plifortiĝos. Esperanto certe fariĝos la universala lingvo por la tuta homaro.

Ĉinoj nomas Esperanton *Shi Jie Yu* (monda lingvo), kiu estas bona esprimo miaopinie. Post 93-jara provado, Esperanto kreita de polo Zamenhof jam fariĝis la sola *Shi Jie Yu* agnoskita de la tutmonda popolo. Ĝi senĉese riĉiĝas, disvolviĝas kaj fine postviviĝas kiel vivanta lingvo. Kiam mi eklernis ĝin, nur maldika vortaro kompilita de Kabe disponeblis, sed nun mi povas uzi *Plenan Ilustritan Vortaron de Esperanto* kun pli ol 1300 paĝoj. Ververe Esperanto disvolviĝas kaj ĝia aplikado pliampleksiĝas. La maljunuloj kiel mi okupis nur malmulton de pli ol 1700 partoprenantoj. La kongresejonoj regis vigleco kaj amikeco.

Por renkonti miajn svedajn amikojn en Stokholmo, mi devis partopreni en nemalmultaj aktivecoj ekster la kongresejo. Ĉe renkontiĝo, antaŭ ĉio ili demandis al mi pri Esperanto, dubante, ĉu ĝi povos fariĝi vera *Shi Jie Yu*. Pro tio, mi diskonigis ĝin kaj klarigis mian opinion, ke ĝi certe disvolviĝos en granda skalo, sed ĝi ne anstataŭos la lingvojn de ajnaj nacioj kaj popoloj kaj nur fariĝos ekster tiuj lingvoj la helpa lingvo komune uzata, kiun ĉiu nacio povos per ĝi komuniki kun la aliaj. Mi ofte pensas, ke se ĉiuj lernu ĝin, certe novaj situacio kaj stadio aperos. Se la tuta mondo estus la kongresejo de Esperanto! Kun multaj avantaĝoj kiel aliaj artefaritaj lingvoj, ĝi estas facile lernebla kaj komprenebla, ne nur por eŭropanoj, sed ankaŭ por ni azianoj kaj aliaj nacioj. Ĉar ĝi, kiel artefarita lingvo, vivas surbaze de uzado, ĝi certe evoluos kaj ŝanĝiĝos por ĉiam, de simpleco al komplikeco, de malriĉeco al riĉeco kaj plia riĉeco, tiel ke, ĝi povos akumuli sian kulturajn heredaĵojn...

Reveninte de la kongresejo de Esperanto al mia kabineto en la okcidenta ĉirkaŭurbo de Ŝanhajo, mi naskis multajn pensojn antaŭ la malfermita dika PIV en la kvietita nokto. Je la penso de reformado de ĉinaj ideografiaĵoj, mi ne povis ne elmeti kelkajn dubojn. Ĉu ni vere abolos nunajn ideografiaĵojn kaj adoptos la Hanlingvan Fonetikon anstataŭe? Ĉu ni povus deteni niajn junajn generaciojn de niaj brilaj kaj

riĉaj kulturaj heredaĵoj? Mi ne tute oponas kontraŭ la reformado de ĉinaj ideografiaĵoj. Tio, kio devas esti forigita, forigu! Tamen la reformado kaj disvolvigo de la lingvo celas precizan esprimadon de pli komplikaj pensoj de homoj, sed ne nur simplan kaj facilan lernadon. En Svedio, Eŭropo, Japanio..., oni havas du tagojn por ripozo, kaj ĉu ni ĉinoj eĉ ne havus tempeton por lernado pro okupiteco, ĉu ni eĉ ne havus tempeton por lerni unu aŭ du vortojn, ĉu ni eĉ ne kovus pli komplikajn pensojn pro okupiteco, ĉu ni nuntempe bezonas plialtigon de la popola klerigo aŭ troan plisimpligon de nia lingvo? Mi vere ne komprenas. En la lando kun pli ol naŭ cent milionoj da loĝantoj, la reformado de la lingvo devas esti farita de ĉiuj. Estas ne malbone, se ni diskrete aŭskultas al la opinioj de aliuloj.



24-08-1980

elĉinigis Ĉinhomo (Ĉinio)

Liu Cixin¹ (1963-)




Mikroskopa fino

aŭtoro, *Liu Cixin*, laŭreato de Hugo-premio, 2015

Ĉi-nokte, la homaro estis provonta pafrompi kvarkon.

Ĉi tiu heroa entrepreno estis plenumota en la Orienta Nukleoncentro, lokita en Lop Nor². La nukleoncentro ŝajnis nur kiel gracia konstruaĵaro en dezerto. La giganta akcelilo estis konstruita en tunelo profunde sub dezerta tero, kun perimetro 150 kilometrojn longa. Apude oni speciale konstruis atomcentralon de miliono da kilovatoj por provizi la nukleoncentron per elektro, sed tio tute ne sufiĉis por plenumi la hodiaŭan eksperimenton, tiel ke necesis portempe redirekti elektran energion el la nordokcidenta elektreto. Hodiaŭ la akcelilo estis akcelonta partiklojn ĝis 10^{20} gigaelektronvoltoj, kio estis la energio kiam la universa praeksplodo komenciĝis, la energio kiam ĉio naskiĝis. Per tia neimagebla energio, kvarko, la minimuma unuo de materio konata ĝis nun, estis frakasota, kaj la homaro estis ŝtelvidonta sekreton de la plej profunda tavolo en la materia universo.



En la regeja halo de nukleoncentro estis ne multaj homoj, inter kiuj troviĝis du el la plej eminentaj teorifizikistoj en la mondo nuntempe, kiuj reprezentis du diferencajn skolojn de la nuna esplorado pri profunda strukturo de materio. Unu el ili estis usonano Herman Jones⁴, kiu opiniis, ke kvarko estas la minimuma unuo de

materio, kiun oni ne povas pafrompi; la alia estis ĉino Ding Yi⁵, kies teorio asertis, ke materio estas senlime dividebla. En la regeja halo troviĝis ankaŭ la ĉefinĝeniero respondeca pri funkciado de la akcelilo kaj kelkaj ĵurnalistoj, dum aliaj multnombraj laboristoj estis en dek subregejoj profunde subteraj, kaj en la regeja halo oni povis vidi nur integritajn datumojn. Ĉi tie la plej miriga homo estis kazaĥa maljuna ŝafisto nomata Diĥiati, kies vilaĝo estis interne en la akcelila periferio de la nukleoncentro. Dum la hieraŭa pikniko, fizikistoj manĝis lian rostitan tutŝafaĵon, kaj insistis inviti lin. Ili opiniis, ke la plej granda momento de fiziko estas ankaŭ la plej granda momento de la tuta homaro, tial devas ĉeesti iu, kiu malplej konas fizikon.

La akcelilo jam startis. Energia kurbo sur la ekranego rampis pigre kiel lumbriko ĵus vekita, celante supren la ruĝan linion, kiu signifis la kritan energion necesan por frakasi kvarkon.

“Kial oni ne telesendas?” Ding Yi demandis, montrante televidilon ĉe angulo de la halo, kiu prezentis futbalan matĉon kun maro da spektantoj. Ekde Beijing⁶ ĝis ĉi tie, la fizikisto ĉiam sin vestis per blua supertuto, ke oni povis facile preni lin por help-laboristo.

“D-ro Ding, ni ne estas la centro de la mondo. Post kiam ni havos la eksperimentan rezulton, jam sufiĉos se oni elsendus novaĵeton de tridek sekundoj,” diris la ĉefinĝeniero.

“Sensenta, nekredeble sensenta,” Ding Yi komentis, skuante la kapon.

“Sed tio estas necesa por vivi,” Jones diris, kiu sin kostumis tute en la stilo de hipio, kun longa hararo, kaj fojfoje elprenis arĝentan flakonon por trinki iom da alkoholaĵo, “Malfeliĉe mi ne sensentas, do malfacilas pluvivi.”

Dirante tion, li eltiris paperon kaj svingis ĝin, “Sinjoroj, tio ĉi estas mia testamento.”

Tio ŝokis la ĉeestantojn, kaj ĵurnalistoj tuj ĉirkaŭis Jones.

“Post la finiĝo de ĉi tiu eksperimento, restos neniu esplorinda sekreto en la materia mondo, ke fiziko finiĝos en unu horo! Mi venis por renkonti la finon de mia mondo. Ho mia fiziko, vi senkompata amatino, kiel mi povos pluvivi post kiam vi neniigis!”

Ding Yi diris malkonsente: “Oni ankaŭ diris tiajn vortojn dum epokoj de Neŭtono kaj Ejnŝtejno, ekzemple, en la lasta jarcento, Max Born⁷ kaj Stephen Hawking⁸. Sed fiziko ne finiĝis, kaj ankoraŭ ne finiĝos. Vi tuj vidos, ke kvarko estas pafrompita, kaj ni surpaŝas ankoraŭ pluan ŝtupon sur la ŝtuparo al nenieco. Mi venis por renkonti la matenon de mia mondo!”

“Vi plagiatis la teorion de Mao Zedong⁹, D-ro Ding. En la 50-aj jaroj de la lasta jarcento li jam enkondukis la ideon, ke materio estas senlime dividebla,” Jones rebatis.

“Vi troe absorbiĝis en viaj pensoj,” La ĉefinĝeniero interrompis, “Pere de la malsamaj projekcioj de sunlumo je la sama momento en sekaj putoj de Egiptujo kaj Grekujo, oni povis konjekti, ke la tero estas ronda, kaj eĉ povis laŭ tio kalkuli ĝian diametron, sed nur la vojaĝo de Magelano¹⁰ estis vera ekscitaĵo. Vi teorifizikistoj

antaŭe nur restis en putoj, kaj nur hodiaŭ ni entreprenos veran globvojaĝon en mikrouniverso!”

Sur la ekrano, energia kurbo proksimiĝis al la ruĝa linio. La ekstera mondo ŝajne sensis la gigantan energion svarmantan profunde sub la dezerto. Aro de birdoj ekflugis alarmite el tamarika arbusto, kaj rondflugis en noktĉielo longtempe. Albloviĝis lupaj hurloj de malproksime... Finfine, la energia kurbo preterpasis la ruĝan linion. Partikloj en la akcelilo jam ricevis sufiĉan energion por kolizii kontraŭ kvarko. Ĉi tiuj estas la partikloj kun la plej potenca energio, kiujn akiris la homaro en la historio.

La komandanta komputilo tuj kondukis tiujn partiklojn el la 150 kilometrojn longa ringvojo de la akcelilo, kiuj eniris en branĉvojon, kaj flugis je rapido proksima al lumrapido al la celobjekto. Sub bombardo de tiu ĉi apudlima energio, la celobjekto tuj ekŝprucis pluvegon de partikla radiado. Sennombraj detektiloj gvatadis tiun pluvegon, kiuj dum momenteto povis distingi kelkajn pluverojn kun iom malsamaj koloroj el la pluvego. Ĝuste per la kombinaĵo de tiuj ĉi kelkaj pluveroj, superkomputilo estis povonta determini, ĉu paŭtrafado de kvarko okazis, kaj determini plue, ĉu kvarko estis rompita.

Superenergiaj partikloj estis produktataj senĉese. Koliziado en la akcelilo daŭris. Homoj atendis streĉite.

La ŝanco, ke superenergia partiklo trafas kvarkon, estis tre eta, tial oni ne sciis, kiom longe ili atendos.

“Nu, amikoj de malproksimo,” maljunulo Diĥiati rompis la silenton, “antaŭ dekkelkaj jaroj, kiam ĉi tiuj aĵoj estis ekkonstruataj, mi jam estis ĉi tie. Tiam en la konstruejo estis pli ol dek mil homoj, ŝtalaĵoj kaj cemento stakitaj montalte, kun ankaŭ centoj da bobenoj samaltaj kiel altkonstruaĵoj. Oni diris al mi, ke tiuj estas elektromagnetoj... Mi ne komprenas, tiom da mono kaj materialoj, tiom da homa laboro, kiom povus akvumi kiom da dezertoj, por ke tie plene kresku vitoj kaj hami-meloj¹¹, sed kion vi faras, neniuj komprenas.”

“Avĉjo Diĥiati, ni serĉas la plej profundan sekreton de la materia mondo, kio estas pli grava ol io ajn!” diris Ding Yi.

“Mi ne legis multajn librojn, sed mi scias, ke vi, la plej kleraj homoj de la mondo, serĉas la plej etan sableron de la mondo.”

La elstara difino de partiklofiziko fare de la maljuna kazaĥa ŝafisto ekscitis ĉiujn ĉeestantojn.

“Brave!” Jones kriis, aŭdinte la interpreton, “Li opinias,” li almontris Ding Yi, “ke oni havos tiom etan sableron, kiom ajn etan oni deziros; sed mi opinias, ke ekzistas minimuma sablero, kiu ne plu etigeblas, kaj ne rompeblas per la plej forta martelo. Estimata avĉjo Diĥiati, kiu el ni pravas, viaopinie?”

Diĥiati skuis la kapon post kiam li aŭdis la interpreton: “Mi ne scias, nek vi povas scii, kia ekzakte estas ĉio en mondo. Kiel mortemulo povus plenkoni tion?”

“Tio signifas, ke vi estas agnostikulo, ĉu ne?” demandis Ding Yi.

Okuloj de la maljuna ŝafisto, spertintaj multe da malfacilaĵoj, absorbiĝis en songeca rememoro: “La mondo estas vere ne komprenebla! Ekde junaĝo, mi jam paŝtigis ŝafaron en la senlima Gobio¹², serĉante verdajn herbojn. Kiom da noktoj pasis, dum kiuj mi kaj ŝafaro kuŝis en sovaĝejo, rigardante la ĉielon plenan de steloj. Tiuj steloj dense punktetis, kristale briletis, kvazaŭ juveloj en nigra hararo de knabino. Kiam nokto profundigis, Gobio sub la korpo estis ankoraŭ varma, dum venteto fojfoje blovis, kvazaŭ ĝia spiro... Tiam la mondo estis viva, kvazaŭ bebego profunde dormanta. Tiam aŭskultu ne per oreloj, sed per la koro, tiel ke vi povis aŭdi voĉon, kiu plenigis ĉion inter ĉielo kaj tero. Tio estis la voĉo de Alaho. Nur li scias kia ajn estas la mondo.”

Tiam, zumilo eksonis akre, kiu signalis, ke paŝtrafado de kvarko okazas. Homoj sin turnis al la ekranego. Jen la lasta juĝtago de fiziko. Tuj estis respondo al la demando, pri kiu la homaro interdisputadis tri mil jarojn.

Analizaj datumoj el la superkomputilo ekinundis la ekranon. La du fizikistoj, tuj trovinte malĝustaĵojn, ekskuis la kapojn perplekse.

La rezulto ne montris, ke kvarko estas frakasita, sed ankaŭ ne montris, ke ĝi estas integra. La eksperimentaj datumoj estis tute ne kompreneblaj.

Subite iu ekkriis, kiu estis Diĥiati. Ĉi tie nur li ne interesiĝis pri la datumoj de kvarko-paŝtrafado sur la ekranego, kaj ankoraŭ staris apud la fenestro: “Ho ĉielo, kio okazis ekstere? Rapidu por vidi!”

“Avĉjo Diĥiati, bonvolu ne distri nin!” Ĉefingenerio diris malpacience, sed alia frazo de Diĥiati deturnis ĉiujn.

“Ĉielo... Kio okazis al la ĉielo!”

Blanka lumo penetris la fenestron. Homoj en la halo ekrigardis eksteren, kaj ne povis kredi siajn okulojn: la tuta noktĉielo fariĝis laktoblanka! Homoj impetis el la halo. Ekstere, sur la vasta Gobio, laktoblanka firmamento eligis mildan blankan lumon, kiel lakta maro. La terglobo kvazaŭ troviĝis en la centro de giganta blanka ovŝelo!

Kiam okuloj de homoj adaptiĝis al tio, ili trovis, ke estas aroj de nigraj punktetoj sur la laktoblanka ĉielo. Atente observinte lokojn de tiuj nigraj punktetoj, ili preskaŭ ekfrenetiĝis.

“Ho Alaho, tiuj nigraj punktetoj ... estas steloj!!” Diĥiati elkriis la konkludon, kiun ĉiuj vidis sed ne aŭdacis kredi.

Ili rigardis la negativon de la universo.

Dum la konsterno, oni el ekster la fenestro rimarkis la televidilon en la halo, kiu prezentis futbalan matĉon. La bildo sur la ekrano pruvis, ke ili ne songas: blanka lumo envolvigis ankaŭ la stadionon kilometrojn for, kaj kelkdek mil homoj sur la spektado suprenrigardis la ĉielon terurite...

“Kiam ĉi tio okazis?” la ĉefingenerio demandis, kiu estis la unua trankviliĝis.

“Kiam ĵus la sono eksonis interne,” Diĥiati diris.

Homoj eksilentis. Ilia rigardo koncentriĝis sur Jones kaj Ding Yi, esperante ke tiuj du plej eminentaj fizikistoj ekde Ejnŝtejno povos fari eksplikojn pri la koŝmareca realo, eĉ se ajnan etan.

Tiam, la du fizikistoj ne plu rigardis la ĉielon. Ili ambaŭ meditis, mallevante la kapon. Post momento, Ding Yi la unua levis la kapon kaj suprenrigardis la laktoblankan universon, elspirante profunde.

“Ni devus antaŭe elpensi tion,” Li diris.

Ankaŭ Jones levis la kapon, rigardante Ding Yi: “Jes, tio ĉi estas la signifo de la variablo en la ekvacio de superunuiĝinta teorio!”

“Kion vi diras?” la ĉefingénieur kredis.

“Inĝeniero, nia globvojaĝo sukcesis!” Ding Yi ridante diris.

“Ĉu vi diras, ke nia eksperimento kaŭzis ĉi ĉion?”

“Jen la fakto!” Jones diris, samtempe eltirante la arĝentan flakonon de alkoholaĵo, “Nun Magelano ekscias, ke la tero estas ronda.”

“Ronda...” aliaj perplekse rigardis la du fizikistojn.

“La tero estas ronda, ke se oni ekiras ekde ajna loko sur ĝia surfaco kaj marŝas rekte antaŭen, li revenos al sia komenca loko. Nun ni komprenis la tempspacan formon de universo, kaj tre simile, se ni iras rekte profunden en mikroskopaj tavoloj, kiam ni atingas la mikroskopan finon, ni do revenas al la tuta makroskopo. La akcelilo ĵus trapafis la minimuman strukturon de materio, tiel la forto efikis sur la maksimuman strukturon, inversiginte la tutan universon,” Jones eksplikis.

Ding Yi diris: “D-ro Jones, vi povas pluvivi. Fiziko ne finiĝis, sed ĵus komenciĝis, samkiel kiam la homaro eksciis la formon de la terglobo, geografio ĵus komenciĝis. Ni ambaŭ eraris. Se ni juĝus, kies teorio plej proksimiĝas al la fakto, estas tio, kion avĉjo Diĥiati diris. Kvankam mi ne kredas je Alaho, la profundeco kaj mirakleco de la universo multege superis nian imagon.”

“Mi rememoris, ke en la lasta jarcento, anglo Arthur Clarke¹³ en sia sciencfikcio proponis la koncepton de universa negativo, sed kiu sciis, ke ĝi eĉ fariĝos fakto?”

“Sed kion fari nun?” la ĉefingénieur demandis.

“Estas bone nun. Tre plaĉas al mi vivi en negativa universo, kiu estas same bela kiel antaŭ sia inversiĝo, ĉu ne?”

Jones eltrinkis la alkoholaĵon en flakono kaj ebriete etendis ambaŭ brakojn, kvazaŭ brakumonte la tutan novan universon.

“Sed vidu...” ĉefingénieur montris tra fenestro la televidilon en la halo. La panika tumulto en la stadiono intensiĝis, kaj amasa histerio disvastiĝis en la homamaso. Imageblis laŭ tiu ĉi bildo, ke la tuta homara mondo sinkas en kaoson.

“Daŭrigu la bombardon al la celobjekto,” Ding Yi diris al la ĉefingénieur. Post kiam okazis la unua paŭtrafado kontraŭ kvarko, por analizi la rezulton, la komandanta komputilo jam ĉesigis la paŭradon al la celobjekto de superenergiaj partikloj.

“Ĉu vi frezeziĝas?! Nur diablo scias kio estos la efiko de la dua paŭtrafado kontraŭ kvarko. Tio eble kaŭzos la kunfalon¹⁴ aŭ eksplodegon de la universo!”

“Ne eblos! La antaŭa fenomeno jam pravigis la superunuigintan ekvacion. Ni scias kio okazos je la sekva paŭtrafado,” Jones diris.

Superenergiaj partikloj en la akcelilo estis refoje kondukata al la celobjekto. Homoj atendis la aperon de tiuj kelkaj malsamkoloraj pluveroj en partikla pluvego.

Pasis unu minuto, du minutoj... dek minutoj...

Diversaj kurboj kaj datumoj malvigle ruliĝis sur la ekranego, kaj nenio okazis. Sur la televidila ekrano, homamaso en la stadiono jam perdis sinregadon. Sub laktoblanka ĉielo, homoj sencele karambolis, stampedis unu la alian... La bildo ektremis, interrompiĝis la televida signalo, kaj restis nur neĝeroj sur la ekrano kvazaŭ dezerto. Subita ŝanĝo de la universo superis ĉiujn sciojn kaj imagon de la homaro, superis ilian mensan tolerecon, kaj la mondo troviĝis ĉe la rando de freneziĝo.

La zumilo eksonis la duan fojon, ke kvarko estas paf-frapita la duan fojon.

Sen kia ajn antaŭsigno, kaj pli rapide ol palpebrumado, la universo refoje inversiĝis. Kun peĉonigra noktĉielo kaj kristalaj stelaroj, la universo de la homaro revenis denove.

“Ho ĉielo, vi estis farantaj kion Alaho faras!” avĝio Diĥiati diris. Homoj de la nukleoncentro nun kolektiĝis ekstere sur Gobio-dezerto, sub ebriga stelplena ĉielo.

“Jes, senripoza esplorado pri la esenco de materio havigis al ni diecan povon, kion ni ja ne povus imagi eĉ en sonĝo,” Jones diris.

“Sed ni ankoraŭ restas homoj. Kiu sciis, kio okazos sekve?” Ding Yi diris.

Ĉiuj Homoj eksilentis, fiksrigardante la brilajn stelarojn sur noktĉielo, kvazaŭ atente aŭskultante la mirindan melodion, jen aŭdeblan jen neaŭdeblan, fluantan tra la tuta universo.

“Ho Alaho...” Diĥiati sin klinis al la stelplena ĉelo.

Piednotoj:

1 [Lju Ci-ŝin]

2 *Sekiĝinta lago en nordokcidenta Ĉinio, vd. Vikipedion.*

3 *La 20a potenco de 10.*

4 [Herman Ĝoŭs]

5 [Ding I]

6 [Bej Ĝing]

7 [Maks Born] *Germana fizikisto, vd. Vikipedion.*

8 [Stifen Hoking] *Brita fizikisto, vd. Vikipedion.*

9 [Maŭ Ze-dong]

10 *Portugala navigisto, kiu la unua vojaĝis ĉirkaŭ la terglobo, vd Vikipedion.*

11 *Speco de melono produktata en nordokcidenta Ĉinio.*

12 *Dezerto en norda Ĉinio kaj Mongolio, vd. Vikipedion.*

13 *Brita verkisto kaj inventisto, vd. Vikipedion.*

14 *Vd. Vikipedion pri nigra truo.*

elĉinigiĝis **GB2312**

Guy de Maupassant (1850-1893)



Kaptitoj

Ekzistis nenia bruo en la arbaro, nur la leĝera susurado de neĝeroj falantaj sur la folioj de arboj. Ekde la tagmezo falis la neĝeto, kies flokoj densiĝis sur la branĉoj kiel musksimila tavolo da glacio flosanta. La delikataj neĝflokoj surmetas sur velkintaj arbfolioj veston arĝente blankan kaj sternis sur la vojo senfinan kaj vastan tapiŝon, molan kaj blankan. En la vasta maro

aŭtoro, Guy de Maupassant

de arbaro regis eksterordinara silento.

Antaŭ la pordo de la kabano de arbaristo, juna virino hakis brullignon sur ŝtono per nudigitaj brakoj. Kiel virino plenkreskinta en la arbaro, ŝi estis altstatura, maldika kaj fortika, kaj ŝiaj patro kaj edzo estis arbaristoj.

Iu kriis en la domo:

“Ni ambaŭ estas solaj ĉi-vespere, Berthine. Estas tempo eniri domen, baldaŭ noktiĝos, eble troviĝas prusoj kaj lupoj kiuj ĉie gapvagas.”

La virino hakis stumpon de trunko per granda fortostreĉo. Je ĉiu hakado, ŝi elstarigis sian bruston por haki malsupren per alte levitaj brakoj. Ŝi respondis hakante brullignon:

“Mi finis, panjo. Mi venas, mi venas, ne timu, ankoraŭ ne noktiĝas.”

Poste ŝi enportis la brullignan faskon kaj brullignon en la domon kaj stakigis ilin laŭlonge de la kameno, ree eliris por fermi la markezojn. La grandegaj markezoj estis faritaj el koro de kverko. Fine, ŝi revenis en la domon kaj riglis la pordon per dika kaj peza riglilo.

Ŝia panjo ŝpinadis apud stovo, pro granda aĝo, ŝi, kun faltoplana vizaĝo, jam fariĝis timema. Ŝi diris:

“Kiam la patro ne estas hejme, mi ĉiam sentas min ne bona. Du virinoj ne estas fortaj.”

La juna virino respondis:

“Oĥ, mi tute povos mortigi tiel pruson, kiel lupon.”

Ŝia rigardo direktiĝis al la granda revolvero pendanta super la fajrujo.

Ŝia edzo aliĝis al la armeo je la komenco de la prusa invado, la patrino kaj filino ambaŭ loĝis kun ŝia patro, la maljuna arbaristo, Nicolas Pichon, ŝernomiĝis Longkrura Tringo, kiu obstine rifuzis forlasi sian loĝejon por reveni al la urbo.

La urbo tuj proksima de tie estis Rethel, antikva nedetruenda fortikaĵo situanta sur roko. Tieuloj estas patriotoj, la burĝoj decidis rezisti antaŭ agresantoj laŭ la tradicio de la antikva urbo-ŝtato, oni enfermis sin en sia hejmo, persiste defendis sieĝatan urbon. La loĝantoj de Rethel en Henri la Kvara kaj Louis la Dekkvara jam du fojojn estis fame konata per siaj heroaj defendoj. Ili faros kiel antaŭe ĉi-foje, kaj prenis decidon defendi la urbon ĝis morto.

Ili do aĉetis pafilojn kaj kanonojn, armis milicon, formis batalionojn kaj kompaniojn, kaj ili faris ekzercadon tuttage sur la placo Armes. Ĉiuj, panistoj, nutraĵkomercistoj, buĉistoj, notarioj, advokatoj, lignaĵistoj, libristoj kaj farmaciistoj, faris alterne ekzercadon, laŭ regulaj horoj, sub la ordonoj de sinjoro Lavigne, antaŭa suboficiro de dragonoj, hodiaŭa merceristo pro edziĝo al filino kaj la heredo de butikon de sinjoro Ravaudan, la plej aĝa filo.

Li prenis militan gardon de majoro-adjutanto. Ĉar junaj homoj varbiĝis en la armeon, li formis ĉiujn en trupojn, kiu faris ekzercon por la rezisto. La grasaj homoj marŝis nur per trotanta paŝo sur la strato por konsumi sian grason kaj etendi siajn muskolojn.

Oni batalprete atendis la malamikon. Sed la prusoj ne aperis. Ili estis proksime de ĉi tie tamen; ĉar iliaj skoltaj dufoje transiris arbaron puŝi ĝis la hejmo de la arbaristo, Stilzoj Nicolas Pichon.

La maljuna arbaristo, kiu kuris kiel vulpo, iris en urbon por raportoj. Oni celdirektis la kanonojn, sed la malamiko ne sin montris.

La loĝejo de la Longkrura Tringo estis servita kiel antaŭposteno en la arbaro Aveline. Stilzoj du fojojn en semajno iris en la urbon por aĉeti iom da manĝaĵoj kaj alportis al urbanoj iom da novaĵoj de la kamparo.

En tiu tago li eliris por raportoj, ke germana malgranda taĉmento restis en lia hejmo antaŭ du tagoj, ĉirkaŭ la dua horo posttagmeze, poste la taĉmento ree ekmarŝis senprokraste kaj ke la suboficiro, kiu gvidis grupon, parolis franclingve.

Kiam ajn la maljunulo tiel eliris, li ĉiam kondukis siajn du hundojn, du altajn kaj grandajn ĉashundojn kun buŝego kiel tiu de leono, ĉar li timis lupojn, kiuj komencis fariĝi kruelaj en tiu sezono. Antaŭ la momento de foriro li ĉiam ordonis al la du virinoj, ke ili tuj jam fermas la pordon ĉe eknoktiĝo.

La juna timis nenion, sed la maljuna ĉiam estis en stato de timo kaj maltrankvilo, ŝi ripete diris: “Oni kreos malordon, vi vidos, ke oni kreos malordon.”

Tiuvespere, ŝi estis pli maltrankvila ol kutime.

“Ĉu vi scias, kioma horo revenos via patro?” ŝi diris.

“Oh! estas certe, ke li ne revenos antaŭ la dekunua horo. Kiam li vespermanĝas ĉe la komandanto, li revenas ĉiam malfrue.”

Ŝi pendigis kuirpoton super forno por kuiru supon. En tiu ĉi momento, aŭdante malklaran bruon, kiu venis al ŝiaj oreloj tra la kamentubo de la forno, ŝi ĉesis movi.

Ŝi murmuris:

“Ha! oni marŝas en la arbaro, almenaŭ sep-ok homoj.”

La maljuna patrino konsternita haltis ŝpinradon, balbutis:

“Ho! mia Dio! la patro ne estas ĝuste en la hejmo!”

Antaŭ ol ŝi finis sian paroladon, ŝi aŭdis bruan frapadon sur la pordo.

Ĉar la virinoj ne respondis, raŭka voĉo laŭte kriis:

“Malfermu!”

Poste, post silento, sama voĉo ripete kriis:

“Malfermu aŭ mi rompos la pordon!”

En tiu ĉi momento, Berthine enŝovis grandan revolveron sur la forno en la poŝon de sia jupo, poste venante ĉe la pordo kaj gluante sian oreleon al la pordo, ŝi demandis:

“Kiu vi estas?”

La voĉo respondis:

“Ni estas ĝuste la malgranda taĉmento, kiu venis tiutage.”

La juna virino ree demandis:

“Kion vi volas?”

“Mi kun mia malgranda taĉmento perdis la vojon en la arbaro hodiaŭ matene. Malfermu, aŭ mi rompos la pordon.”

La arbaristino havis nenian elekton ol rapide eltiri grandan ferriglilon kaj tirmalfermi la pezan kaj grandan pordoklapon. Ŝi ekvidis en pala ombro de neĝoj ses homojn, ses prusajn soldatojn, ili estis ĝuste tiuj homoj, kiuj venis la antaŭan tagon. Ŝi diris per firma tono:

“Kion vi venas fari en tiu ĉi momento?”

La suboficiro ripetis:

“Mi perdis la vojon, tute perdis la vojon. Mi rekonas la domon. Mi manĝis nenion ekde hodiaŭ mateno, ankaŭ mia malgranda taĉmento manĝis nenion.”

Berthine deklaris:

“Sed ĉar nur mi kun mia panjo estas hejme ĉi-vespere.”

La soldato, kiu ŝajnis homo honesta, respondis:

“Ne gravas. Mi ne vundos vin, sed vi devas doni al ni iom da manĝaĵo. Ni estas kaj malsata kaj laca, fakte ne povas elteni.”

La arbaristino retroiris unu paŝon:

“Eniru do”, ŝi diris.

Ili eniris, estis tutkorpe kovritaj de neĝo, amasigante sur ilia kasko en ŝaŭman kremon de simila meringelo. Ili aspektis lacege.

La juna virino montris la benkon el ligno de la du flankoj de la granda tablo.

“Sidiĝu,” ŝi diris, “mi iris fari al vi supon. Ŝajnas, ke vi vere estas lacega.”

Baldaŭ poste ŝi refermis la pordon per riglilo.

Ŝi metis akvon en la kaldronon, aldonis denove iom da kremo kaj terpomo, kaj poste dekroĉante peco da lardo pendants en la kameno, ŝi detranĉis duonon de lardo, trempis ĝin en buljono.

Ses malsateguloj sekvis ĉiujn ŝiajn movojn per la okuloj. Ili jam longe metis siajn pafilojn kaj kaskojn en angulo, ili obeeme atendis, kiel lernantoj en elementa lernejo sur la benko.

La patrino rekomencis ŝpini, ĵetante de tempo al tempo maltrankviligitan rigardon al la soldatoj-invadantoj. Ĉi-momente oni aŭdis nenian alian bruon ol la mallaŭtan knaradon de ŝpinrado, la klakojn de brulligno kaj la murmuron de akvo kiu varmiĝis. Subite stranga bruoj tremigis ĉiujn homojn, ŝajnis, ke io raŭke blovis spiron sub la pordo, kaj ke forta kaj sonora spiro de sovaĝa besto.

La suboficiro de germanaj trupoj haste saltis al la pafiloj. La arbaristino lin haltigis per gesto kaj ridante diris:

“Tuj ĉi estas lupoj”, ŝi diris, “ili estas kiel vi, ili ĉirkaŭvagas, ankaŭ ili estas malsataj.”

La homo malkredis, li volis eliri por vidi. Tuj kiam li malfermis la pordon, li vidis du grandajn sovaĝajn grizajn bestojn flugrapide forkuri, farante paŝegon.

Reveninte, li sidiĝis kaj murmurante diris:

“Se mi ne eliras por vidi, mi ankoraŭ ne kredas!”

Li atendis, ke lia buljono estas kuirita.

Ili avide manĝis buljonon, por gluti pli multe, iliaj buŝoj fendiĝis ĝis oreloj, iliaj rondaj okuloj kun la malsupraj makzeloj samtempe malfermiĝis, kaj bruoj de gorĝo estis samaj kiel glugloj en tegmentodefluiloj.

La du virinoj ne diris eĉ unu vorton, rigardis iliajn barbojn grandajn kaj ruĝajn rapide moviĝi; ŝajnis, ke la terpomoj eniris en profundon de la densaj haroj movantaj. Ĉar ili soifis, la arbaristino descendis al la silo por tiri al ili cidron. Ŝi longe restis. Laŭdire tiu ĉi estis volba sileto, kiu, dum la revolucio, servis kiel prizono kaj kaŝejo. Oni alvenis al la silo tra irinte mallarĝan spiralan ŝtuparon fermita per klappordo en la fundo de la kuirejo.

Kiam Berthine ree aperis ŝi ridis, ŝi senemocie ridis sola. Ŝi donis sian poton de vino al la germanoj.

Baldaŭ poste ŝi manĝis noktan manĝeton kune kun sia patrino ĉe la alia fino de la kuirejo.

La soldatoj finis manĝadon, ili ses homoj endormiĝis ĉirkaŭ la tablo. De tempo al tempo iu frapiĝis per sia frunto al la tablo kun sono de ektamburado, baldaŭ poste ĉi tiu homo subite vekigis, rektigis denove sian talion.

Berthine diris al la suboficiro:

“Kuŝu antaŭ la hejtforno, por diri la veron, ĉi tie estas sufiĉa loko por ses homoj. Mi kun panjo grimpas en mian ĉambron por dormi.”

La du virinoj supreniris. Oni aŭdis ilin ŝlosi pordon, marŝi iom da tempo, baldaŭ poste ili ne eligis plu ian ajn sonon.

La prusoj kuŝis sur ŝtonplanko, la piedoj frontis kontraŭ hejtforno, la kapo estis subportita per iliaj rullevintaj manteloj, la ses homoj subite eksplodis de ronko, eligis ses tonojn malsamajn, akrajn aŭ laŭtajn, sed estis tute kontinuaj kaj timindaj.

Ili certe jam dormis tre longa tempo, subite unu intensa pafo, ŝajnis, ke oni pafis kontraŭ la muroj de la domo. La soldatoj tuj stariĝis. Poste du novaj pafoj eksplodis, poste estis ankoraŭ tri pafoj.

La pordo de unua etaĝo subite malfermiĝis, la arbaristino aperis, portinte ĉemizon kaj jupeton, nudapiede malsuprenirinte de la supra etaĝo, teninte vakskandelon en la mano, havinte tre timigitan mienon. Ŝi balbutis:

“Jen la francoj venis, ili almenaŭ estas ducent personoj. Se ili vin trovas ĉi tie, ili volos bruligi la domon. Rapidu descendi en la silon kaj ne eligu sonon. Se vi eligas sonon, ni ĉiuj estas perditaj.”

La suboficiro estis kaptita de paniko, murmuris:

“Bone, bone. De kie oni descendas?”

La juna virino rapide levis tiun mallarĝan kaj kvadratan klappordon, kaj la ses homoj unu post alia dorsdirekte descendis tra la zigzaga eskaletto por serĉi per piedoj la ŝtupojn.

Kiam la pinto de lasta kasko malaperis, Berthine demetis la pezan plankon el kverka ligno. La planko estis tiel dika, kiel muro, estis tiel solida, kiel ŝtalo, fiksita per ĉarniroj kaj seruro de karcero, kiu estis hermetike ŝlosita, poste ŝi ekridis, ĝoje kaj mute ridis. Ŝi havis tre fortan deziron, ke ŝi volis danci sur la kapo de la kaptitoj. Ili estis fermitaj interne, kiel en solida skatolo el ŝtono, ne eligis ian ajn sonojn, povis nur enspiri aerojn de vazistaso, garnita per stango el fero.

Berthine tuj ekbruligis fajron, sur kiu ree surmetis kuirpoton, kaj ree faris supon murmurante:

“La patro certe estis tre laca ĉi-vespere.”

Baldaŭ poste ŝi sidiĝis kaj atendis. En la silento nur la balancilo de horloĝo regule tiktakis.

De tempo al tempo la juna virino ĵetis rigardon sur la vitro de horloĝo, la malpacienca rigardo ŝajnis diri:

“Kiel malrapide pasas la tempo!”

Baldaŭ poste ŝajnis al ŝi, ke oni murmuris sub siaj piedoj. La konfuzaj paroloj venis ĝis ŝiaj oreloj tra la volbo masonita de la silo. La prusoj komencis travidi ŝian intrigon, kaj suboficiro tuj surgrimpis la malgrandan eskalon kaj frapis per pugno je la klappordo. Li kriis denove:

“Malfermu la pordon.”

Ŝi levigis, proksimiĝis kaj diris imitante sian akcenton:

“Kion vi deziras fari?”

“Malfermu la pordon.”

“Mi ne malfermas.”

La homo koleriĝis.

“Malfermu la pordon aŭ mi rompos la pordon.”

Ŝi ridis:

“Rompu, rompu, kia naivulo vi estas!”

Li ekfrapis per la kolbo de fusilo kontraŭ la klappordo el kverk-ligno fermita sur sia kapo. Sed la klappordo rezistis al frapadoj de la kolbo de fusilo.

La arbaristino aŭdis lin redescendi. Poste la soldatoj venis unu post alia provi siajn fortojn, kaj inspekti la fermilon sur la klappordo. Sed ili certe opiniis, ke iliaj provoj estis neutilaj. Ili redescendis en la silon kaj rekomencis paroli inter si.

La juna virino aŭskultis ilian parolon, kaj poste ŝi eliris por malfermi la eksteran pordon kaj ŝi klinis la oreleon por atente aŭskulti nokte.

Malproksima bojado venis ĝis ŝiaj oreloj. Ŝi ekfajfis kiel ĉasisto, du grandegaj hundoj preskaŭ tuj aperis en la ombro kaj ĵetis sin sur si eksaltante. Ŝi ilin kaptis je la kolo kaj ilin premis por malhelpigi ilin kuri. Poste ŝi kriis per ĉiuj siaj fortoj:

“He, patro!”

Ankoraŭ tre fora sono respondis:

“Ho, Berthine!”

Ŝi atendis kelkajn sekundojn, kaj poste ŝi ree kriis:

“He, patro!”

Pli proksima sono ripetis:

“Ho, Berthine!”

La arbaristino ree kriis:

“Ne pasu antaŭ la vazistaso, en la silo estas prusoj!”

Subite granda silueto de homo aperis maldekstre, kaj haltis inter du arbtrunkoj. La homo maltrankvile demandis:

“La prusoj estas en la silo. Kion ili faras?”

La juna virino ekridis kaj diris:

“Jen tiuj, kiuj venis hieraŭ. Ili voĵeraris en la arbaro. Mi ilin fermis en la silon.”

La maljunulo ĉiam estis tre serioza kaj demandis:

“Kion nun vi petas min fari?”

Ŝi respondis:

“Iru venigi s-ron Lavigne kun siaj trupoj. Li ilin arestos kiel kaptitojn. Li estos kontenta.”

Kaj la patro Pichon direktis:

“Estas vere, ke li estos kontenta.”

Lia filino pludiris:

“Via supo jam estas pretkuirita, rapide manĝu ĝin kaj poste iru.”

La maljuna arbaristo ĉetabliĝis kaj metis du plenajn telerojn sur teron, por ke liaj hundoj manĝu supon, poste li mem manĝis supon.

La prusoj silentis, aŭskultante la paroladon

La Stilzoj ree foriris post kvaronhoro. Berthine atendis kun la kapo en siaj manoj. La kaptitoj denove komencis tumultigi. Ili nun laŭte kriis, vokis, senĉese frapis furioze per kolbo de fusilo la klappordon, sed ĝi estis neŝancebla.

Poste ili komencis pafi tra la vazistaso, esperante, ke iu germana taĉmento pasanta en la proksimeco aŭdos iliajn pafojn.

La arbaristino ne moviĝis plu, sed ĉi tiuj pafoj ŝin nervozigis, ŝin kolerigis, ekscitis ŝian malican koleron. Por kvietigi ilin, ŝi volis tute simple mortigi ĉi tiuj malbonulojn.

Poste ŝi fariĝis pli kaj pli malpacienca. Ŝi rigardis al la horloĝo kaj kalkulis ĉiun momenton.

La patro foriris por unu horo kaj duono. Nun li jam longe alvenis al la urbo. Ŝi ŝajne vidus sian patron rakonti la aferon al s-ro Lavigne, kiu, pala pro eksciteco, kaj sonigis sonorilon al sia servistino por preni liajn uniformon kaj armilon, kaj ŝi ŝajne aŭdus milittamburisto bati tamburon irante sur la stratoj. La timigitaj vizaĝoj aperus ĉe la fenestroj. La popolaj milicanoj elirus senspire de siaj hejmoj, ĵus portinte vestojn, bukinte zonon, kaj trotante irus al la hejmo de komandanto.

Baldaŭ poste, gvidate de Stilzoj, la trupoj marŝus en neĝo al la arbaro.

Ŝi rigardis al la horloĝo kaj pensis: “Ili povos alveni ĉi tie post unu horo.”

Nervozaj malpaciencoj naskiĝis en ŝia koro. Ĉiu momento ŝajnis nefinebla, kiel longa!

Finfine hormontrilo sin montris sur la tempo, kiun ŝi determinis kaj ili povis alveni. Kaj ŝi malfermis denove la pordon por aŭskulti ĉu ili jam revenis. Ŝi ekvidis, ke ombro de homo marŝis kun granda singardemo. Ŝi estis konsternita, kaj eligis krimon. Estis ja ŝia patro.

Li diris:

“Ili sendas min vidi, ĉu la situacio ŝanĝas.”

“Ne, troviĝas neniom da ŝanĝiĝo.”

En tiu ĉi momento li eligis en la nokto akrasonan kaj longan fajfon. Oni tuj vidis bulon da brunaj, kiu malrapide eliris sub la arboj. Tiu ĉi estis avangardo konsistanta el dek homoj.

La Stilzoj ĉiutempe sin ripetis:

“Ne pasu antaŭ la vazistaso.”

Kaj la antaŭvenintaj homoj montris al la postvenintaj la teruran vazistason.

Fine la ĉefa forto de la trupoj alvenis, entute ducent homoj, kaj ĉiu portis po ducent kuglojn.

S-ro Lavigne tremis de emocio, dispoziciis ilin preni la metodon kiu ĉirkaŭsieĝis la domon, lasante larĝan spacon nur antaŭ eta nigra truo proksimiĝanta al tero, tra kie la silo prenis aeron.

Baldaŭ poste li eniris la loĝejon kaj informiĝis pri la armitaj fortoj kaj movoj de malamiko. Tiam la malamiko estis tiom muta, ke oni povis preskaŭ kredi, ke ili jam malaperis, svenis, forflugis tra vazistaso.

S-ro Lavigne frapis piede sur la klappordo kaj vokis:

“S-ro prusa oficiro?”

La germano ne respondis.

La komandanto ripetis:

“S-ro prusa oficiro?”

Tio estis vana. Dum dudek minutoj li minace ordonis tiun silentan oficiron kapitulaci, fordonis armilojn kaj ekipaĵojn, garantiant la sekurecon de vivo kaj la militantajn honorojn por li kaj liaj soldatoj. Sed la komandanto ne akiris ian ajn manifestiĝon de konsento aŭ malamikeco, kaj pro tio troviĝis neniuj elirejoj por ili.

La milicanoj stamfis en la neĝo, forte frapadis per brakoj la ŝultrojn tiel, kiel koĉeroj por sin varmigi kaj ili rigardis la vazistason kun pli kaj pli forta kaj naiveca deziro de pasi antaŭ la vazistaso.

Finfine unu el ili nomata Vinkruĉo, kiu estis tre facilmovia, volis spiti danĝeron. Li sin pasis kurante kiel cervo. Lia provo sukcesis. La kaptitoj ŝajnis mortaj.

Unu sono kriis:

“Troviĝas neniuj homoj.”

Poste alia soldato trapasis la malplenan spacon antaŭ la danĝera truo. Tio do fariĝis ludo. De tempo al tempo iu sin antaŭenjetis de unu trupo al la alia, kvazaŭ infanoj ludus kaptadon de homoj, kaj ĉar lia du piedoj rapidege kuris, li elŝprucis post si neĝerojn. Por sin varmigi ili ekbruligis per velksecaj branĉoj grandajn flamojn, la siluetoj de soldatoj de naciŝindenda armeo, kiuj ir-reire kuradis de la dekstra flanko al la maldekstra, klare riveliĝis de flamoj.

Iu kriis:

“Estas via vico, Maloison.”

Maloison estis grasa panisto kun ridindiga ventrego.

Li hezitis. Oni lin mokridis. Tiam, preninte decidon, li kuris per normala troto kaj senspire. Li skuis sian grasan ventron, kurante.

La tuta taĉmento eksplode ridis . Ili ĉiuj kriante kuraĝigis lin:

“Brave, brave, Maloison!”

Kiam li ĵus trakuris ĉirkaŭ du trionojn da spaco, longa, rapida kaj helruĝa flamo ĵetiĝis tra la vazistaso. Unu pafo sonis, kaj altstatura panisto falis teren, eligante teruran krimon.

Sin antaŭenĵetis neniuj por savi lin. En tiu ĉi momento oni vidis, ke li rampis per la kvar membroj en la neĝo, ĝemadante. Finrampinte la teruran vojiron, li svenis.

Kuglo penetriĝis en la grasan viandon de la supra parto de lia gambo.

En la komenco oni sentis sin subita kaj timigita, baldaŭ poste nova rido releviĝis. En tiu ĉi momento la komandanto Lavigne aperis ĉe la enirejo de la arbarista domo. Li ĵus ellaboris atakan planon. Li komandis per vibranta voĉo:

“La mastro de butikoj de zinkumita fero, Planchut kaj siaj komizoj.”

Tri homoj proksimiĝis.

“Forigu la defluilojn de la domo.”

En kvaronhoro ili portis dudek metrojn da defluiloj al la komandanto.

Tiam la komandanto sendis iun fosi kun plena singardo kaj diskreteco trueton ĉe la flanko de la klappordo, kaj poste enŝovi akvokonduktubon de la suĉpumpilo en la trueton. Li deklaris tre ĝoja:

“Ni volas regali per trinkaĵoj germanajn sinjorojn.”

Admira aplaŭdo eksplodis, poste ĝojaj krioj kaj frenezaj ridegoj. Kaj la komandanto organizis unu taĉmenteton de laboro, ĉiu ano el kiu ŝanĝis skipon en ĉiu kvin minutoj. Poste li komandis:

“Pumpu akvon!”

Kaj la ferplato de la suĉpumpilo turniĝis, tre malgranda sono fluis laŭlonge de la akvotubo kaj fluis malsupren ŝtupo post ŝtupo, tuj enfluis en la silon, eligis murmuron de rivereto kaj murmuron de fluakvo sur roko kun ora karaso.

Oni atendis.

Unu horo pasis, poste du horoj, poste tri horoj.

La komandanto estis maltrankvila, malrapide pasis tien kaj reen en la kuirejo, gluis sian oreilon al la tero de tempo al tempo, faris sian plejblon por konjekti, kion la malamiko faris, primeditis, ĉu ili kapitulacos tuj.

La malamiko nun ektumultis. Oni aŭdis ilin porti vinbarelojn, paroli, murmuri. Poste, ĉirkaŭ la oka matene, unu voĉo eliris de la vazustaso:

“Mi volas paroli kun s-ro oficiro franca.”

Lavigne respondis de la fenestro, li ne kuraĝis tro etendi la kapon tra fenestron:

“Ĉu vi kapitulacas aŭ ne?”

“Mi kapitulacas.”

“Ĵetu do la pafilojn eksteren.”

Oni tuj vidis, ke unu pafilo estis elĵetita tra la fenestro kaj falis en neĝon, poste du, tri, ĉiuj armiloj. Poste la sama voĉo deklaris:

“Mi ne havas plu armilon. Urgiĝu, mi estas dronigota.”

La komandanto komandis:

“Ĉesu.”

La turnoplato de suĉpumpilo estis senmova.

Aranĝinte la soldatojn kiuj atendas komandon, armitajn de la kapo ĝis la piedoj en la kuirejo, li malrapide levis la klappordon el kverkligno.

Kvar trempitaj kapoj aperis, kvar blondaj kapoj kun malhelaj haroj, poste oni vidis, ke ses germanoj, kiuj tremis de malvarmo, estis tute malsekaj, estis kaptitaj de paniko, unu post alia eliris.

Ili estis kaptitaj kaj estis ligitaj. Oni timis, ke okazos io neatendita, kaj tuj ekmarŝis dividinte en du vicoj. Maloison, kiu kuŝis sur matraco, estis metita sur trunkoj de arbo, unu el du vicoj lin forportis.

Ili triumfe revenis en la urbon Rethel.

S-ro Lavigne estis honorita per ordeno por kapti prusan antaŭan parton de soldatoj, kaj la grasa panisto akiris la militmeriton pro vundiĝo antaŭ la malamiko.



elfancigis Lin Leming (Ĉinio)

el CONTES CHOISIS DE MAIPASSANT

Zhao Weiqi

Glavfiŝo de amo

Lastatempe du junuloj samtempe petis la manon de la junulino Huanhuan. Unu el ili nomiĝis Zhong Ning, kaj la alia Wang Wei. Ŝi tre afliktiĝis, ne sciante, kiun elekti.

Tiutage ŝi legis artikolon, en kiu troviĝis frazo: “Se vi volas juĝi ies karakteron, sufiĉas ekkoni lin pere de kunmanĝado.” Ŝi nereteneble ekhavis ideon: kial ne lasi la ĉasantojn inviti ŝin por manĝo respektive, tiel ke ŝi povos veni al la decido, kiun elekti.

Kompreneble pro ina hontemo ŝi ne povis iniciati menciin la peton. Do ŝi aperigis mesaĝon en la grupo de Wechat (mesaĝilo): “Por longa tempo mi ne manĝas glavfiŝon.” Glavfiŝo, kies karno estas grasa kaj delikata, sen skvamoj kaj sen multo da ostoj, tre plaĉis al ŝi.

Tiu mesaĝo vere efikis. Post kelkaj minutoj Zhong Ning la unua sendis inviton al ŝi manĝi fiŝon semajnfine ĉe la riverbordo.

Semajnfine ili du iris al la riverbordo ludi laŭvole kaj laŭplaĉe. Proksime al la tagmezo li kondukis ŝin al roka kavo sub klifo kaj li etendis manon por palpi en la akvo. Post nelonga tempo li elakvigis fiŝreton, kiu entenis kelkajn saltetantajn sovaĝajn glavfiŝojn!

Nun la glavfiŝoj preskaŭ estas bredataj. Por ke Huanhuan manĝu la sovaĝajn glavfiŝojn, li speciale petis konsulton de la fiŝkapta lertulo kaj per la metodo donita de tiu kapablulo li ĵetis reton ĉe la roka kavo antaŭ aŭroro kaj prenis la kaptitajn fiŝojn en konvena tempo hodiaŭ.

Ŝi pensis, ke li donos tiujn fiŝojn al la vilaĝa restoracio kaj petos pretigi la fiŝojn, sed ŝi ne atendis, ke li trovis ordinaran vilaĝanan hejmon kaj paginte iom da mono al la vilaĝano, li persone kuiris la fiŝojn.

Forlasite, ŝi restis sola en la halo. Post duonhoru li alportis grandan varman pelvon da fiŝaĵo. Tamen ŝi jam kavis malĝojon: por ŝpari iom da mono, kial li faras tian penon? Li vere estas avarulo.

Feliĉe ĝuste tiam, kiam li per haŝioj prenis fiŝaĵon al ŝia bovlo, ŝi tuj eksentis varmon en la koro. Apenaŭ ŝi volis konsoli sin per “ne gravas, ke li estas avarema”, li eĉ metis du okulglobetojn de la fiŝo en ŝian bovlon, milde dirante, “Manĝu. Ili estas la plej bonaj aĵoj de la fiŝo.”

Kial li ne donas al mi fiŝaĵon, sed ĝiajn okulglobetojn? Avareco devas koni limon, ĉu ne? Rigardante la du blankajn aĵojn, ŝi ne plu havis apetiton. Pretekstante, ke ŝi

devas labori kromhore, ŝi diris adiaŭ kaj foriris. Hejmenirinte, ŝi forigis ĉiujn liajn kontaktkanalojn.



Post kiam Huanhuan ekskludis Zhong Ning, ŝi esperis, ke Wang Wei montru sian intencon inviti ŝin, sed ŝi ne sciis, kial Wang ankoraŭ ne reagis al ŝia mesaĝo preskaŭ dum unu semajno.

Kiam ŝi sentis, ke li ne plu reagis, li vokis ŝin telefone. Okazis, ke li afervojaĝis dum la semajno. Kaj li pardonpeteme invitis ŝin al manĝo en la restoracio Ora Sudlando.

Ŝi akceptis lian inviton. Kiam ŝi iris al la restoracio, ŝi trovis ĝin mezklasa restoracio kun bongusta stilo. Kiam ili pretis mendi pladojn laŭ la menuo, lia vizaĝo paliĝis kaj li senĉese permane frotis siajn femurojn. Sur lia frunto multe eliĝis subtilaj ŝviteroj. Videble podagro atakis lin. Pro okupiteco de la laboro li de tempo al tempo drinkis kun klientoj, tiel ke li suferis de podagro, kiu kaŭzis teruran doloron al ambaŭ liaj femuroj.

Vidinte tion, ŝi memvole iris al najbara apoteko aĉeti kelkajn tablojdojn da natria bikarbonato. Kiam ŝi revenis, ŝi trovis, ke pladoj jam estis metitaj sur la tablo. Perplekseco kirliĝis en ŝia cerbo: Kial li jam mendis la pladojn antaŭ ol ŝi revenas? Ŝajnas, ke la pladoj ne estas multaj... Ĝuste tiam aŭdiĝis krio malantaŭ ŝia dorso: "Venas la plado!" Kelnero alportis al la tablo pelvo da varme vaporumanta aĵo. Ŝi direktis sian rigardon al la plado: ha, ĝi estas la plej bona plado de la restoracio: glavfiŝo vaporumita!

Tiam Wang Wei donis al ŝi la menuon, dirante, "Ĉi tiu restoracio plenplenas de klientoj. Mi timas, ke ili ne povas alporti pladojn pli frue. Mi provizore mendis plurajn pladojn por manĝo. Se tiuj pladoj ne sufiĉas, mi plu faros mendojn."

Lia aranĝo trankviligis ŝin. Ŝi ne plu havis intencon fari pliajn mendojn. Kaj la plado de vaporumita glavfiŝo estas sufiĉe granda, eble kostanta je ne malpli ol cent juanoj. Dum manĝado Wang senĉese per hasioj prenis fiŝaĵon por ŝi kaj zorgoplene diradis, "Se vi ŝatas manĝi, do manĝu pli."

Ŝi kortuŝiĝis kaj fine akceptis la ampeton de Wang.

Post nelonge Huanhuan volis denove iris al la restoracio Ora Sudlando por manĝo de vaporumita glavfiŝo. Wang promesis konduki ŝin tien, sed la difinita tago estis prokrastita fojrefoje. Finfine venis la difinita tago. Ŝi iris al la restoracio kaj trovis, ke li refoje jam mendis pladojn antaŭtempe. Ĉirkaŭrigardinte, ŝi trovis, ke ĉifoje ne

multas la klientoj en la restoracio. Do kial Wang Wei ne atendis ŝin kaj hasteme faris mendojn?

Kiam ŝi pensis, la plado estis alportata. Tiu, kiu alportis la pladon, estis lernantino. Ŝi antaŭ nelonge venis ĉi tien labori dum la somera libertempo. Metante la pladon de vaporumita glavfiŝo, ŝi diris, “Sinjoro, jen estas vaporumita glavfiŝo, kiun vi mendis je speciale malalta prezo.”

Apenaŭ ŝi finis sian parolon, Wang multe paliĝis. Turninte la kapon, li mallaŭtigis la voĉon, “Kion vi deliras?” La lernantino stuporiĝis kaj tuj sin pravigis, “Mi ne malpravas. Ĝi vere estas la plado de vaporumita glavfiŝo, kiun vi mendis. La origina prezo estas cent kaj ok juanoj, kaj la speciala malalta prezo estas kvindek ok juanoj. Kaj la aliaj pladoj, kiujn vi mendis, ankaŭ estas je la speciala malalta prezo. Tiun ĉi bonŝancon de la speciala malalta prezo oni povas ĝui nur je la dek kvina de ĉiu monato...”

Aŭdinte tion, Huanhuan fine komprenis. Nemirinde, ke li prokrastis la daton senĉese, ĉar li volis renkonti la daton de rabatado de la restoracio. La pladoj, kiujn li mendis, sumiĝas je malpli ol cent juanoj.

Kiam la fakto raveliĝis, Wang estis tute ekster si de kolero kaj sakris al la lernantino, tiel ke aliaj klientoj turnis rigardon al li. Aŭdinte tion, la restoraciestro alrapidis kaj konsolis lin, sed li ne donis ajnan atenton. La estro koleriĝis, nereteneble dirante, “Sinjoro, lastfoje, kiam vi manĝis kun via koramikino ĉi tie, vi pretekste forigis ŝin kaj iris al la kontoro por konstati, ĉu la vaporumita glavfiŝo vere estas plado je speciala malalta prezo...”

Okazis, ke lastfoje li ŝajnis sin suferanta de podagro, por ke Huanhuan ne sciu, ke li regalos ŝin per la plado je speciala malalta prezo. Sciiginte pri tio, ŝi sentis, ke ŝia koro sinkas en abismon, kaj ŝi volis, ke li klarigu la aferon.

Neatendite Wang sin pravigis, “Mi faras tion por ŝpari monon. Ĉu ŝparado estas eraro? Vi virinoj en enamiĝo ŝatas manĝi en restoracio. Ĉiufoje mi devas elspezi kelkajn cent juanojn. Ĉu mi povus elteni, se vi manĝus en restoracio dek fojojn? Kaj poste ni devas vivi per mono, ĉu ne?”

“Ĉu mi diris, ke mi volas vivi kun vi?” dirinte tion, ŝi foriris sen returni la kapon. Wang ne sukcesis kuratingi ŝin.

Post disiĝo kun Wang, ŝi konsciiĝis, ke ŝi havas miskomprenon kontraŭ Zhong Ning. Ŝi kaptis ŝancon inviti Zhong kaj demandis, kial li prenis per haŝioj la okulglobetojn de la fiŝo kaj metis ilin en ŝian bovlon. Honteme malleviste la kapon, li diris, “Mia panjo ŝatas manĝi la fiŝajn okulglobetojn. Ĉiufoje kiam ni manĝis fiŝon, mia paĉjo emis unue metas ilin en ŝian bovlon. Kaj mi ellernis de li tion. Mia paĉjo ankoraŭ diris, ke kiam mi renkontas tiun, kiun mi profunde amas, mi devas unuafoje persone prepari manĝon por ŝi...”

Tuj du ruĝaj nuboj naĝis sur ŝiaj vangoj. Ŝi abrupte demandis, “Do... ĉu vi ankoraŭ kuiros fiŝon por mi?” Li ekscitite jese ekbalancis la kapon. *

*elĉinigi **Mandio** (Ĉinio)*

Wang Youyuan

Unu rozo

Brako en brako, li kaj sia amikino pasumis en la nokta bazaro ĉe la stratkruciĝo. Alpaŝis florvendistino, kaj tre timeme petis, "Ĉu aĉeti rozon, sinjoro?"

"Kiom kostas unu rozo?" li demandis.

"Dek juanojn," ŝi respondis.

Rigardante al la florvendistino, li plue demandis, "De kie vi venas?"

"Mi venas de kamparo de Hubei-provinco*. Okazis inundo en mia hejmloko," ŝi respondis.

"Do mi aĉetos unu."

Lia amikino eltiris sian brakon el lia brako. "Ĉu vi ne opinias ĝin tro altapreza?"

"Ĉar malfeliĉo trafis ŝin, ni aĉetu unu," li diris.

Li aĉetis unu.

"Dankon, frato!" diris la florvendistino.

Kun la rozo en ambaŭ manoj, li pretis solene prezenti ĝin al sia amikino, sed tamen tiu ĉi lasta diris, "Vi celas helpi la florvendistinon!"

Ĉe la lastaj vortoj, lia amikino sin turnis kaj iris for.

Unu jaron poste, li havis alian amikininon.

Flanko ĉe flanko, li kaj sia amikino promenis ĉe la vojkruciĝo. Kiam ili eniris la noktan bazon, li volis teni ŝin je la mano, tamen ŝi enŝovis sian manon en sian poŝon.

Aliris florvendistino, kaj diris per softa kaj timema voĉo, "Aĉetu floron, sinjoro!"

"Kiom kostas unu rozo?" li demandis.

"Dek kvin juanojn."

Rigardante la florvendistinon, li ree demandis, "De kie vi venas?"

"Mi venas de ruro de Guizhou-provinco**. Ĉar mia familio estas malriĉa, mi estas devigita perlabori honestan vivrimedon per flora vendado," ŝi respondis.

"Do mi aĉetos unu," li prompte diris.

Lia amikino tiretis lin je la maniko kaj demandis, "Ĉu vi ne sentas ĝin tro multekosta?"

"Ĉar ŝi trenas sian mizeran vivon, ni aĉetu unu," li respondis.

Li aĉetis unu.

"Dankon, frato!" diris la florvendistino.

Direktante signifoplenan rigardon al la rozo en lia mano, lia amikino diris, "Kiel bela ĝi estas!"

Li donis la rozon al sia amikino.

Lia amikino ambaŭmane prenis ĝin kaj premis al sia nazpinto, dirante, "Kiel dolĉe ĝi aromas!"

Ĉe tio, ŝi enbrakigis lian brakon, kaj tenere flustris al li en la orelon, "Vi estas vere bonkora!"

* Hubei-provinco situas en la centra parto de Ĉinio.

** Guizhou-provinco situas en la sudokcidenta parto de Ĉinio.



*elĉinigis **Pipi** (Ĉinio)*



*esperantigita de **Paula Adúriz** (Hispanio)*

Iljet Alička (Albanio)



aŭtoro, Iljet Alička


La malgranda viro

Iun tagon la magreta Gjini Tosku, el la kvina klaso de la malgranda lernejo en montara vilaĝo, faris eraron, vokita al la tabulo dum la leciono de geografio *La kontinento Azio*, kaj anstataŭ diri:

„Sovetunio estas reviziisma lando”, li respondis „Ĉinio estas reviziisma lando”. Tio okazis en la

unua duono de la sepdekaj jaroj. Tiutempe la amikeco inter Ĉinio kaj Albanio atingis sian pinton.

La instruisto de geografio, bonkora maljunulo nomiganta Kujtim, rigardis la knabon mirigite, kaj la deknunajara Gjini, vestita pli malbone ol mizere, tuj korektis sian respondon: „Ne, mi petas vian pardonon, sinjoro instruisto, mi volis diri, ke Sovetunio estas reviziisma lando”. La instruisto kajesis.



Krom ĉi tiu eraro la aliajn informojn pri Azio Gjini ripetis kvazaŭ gurde (tio signifas same kiel en la lernolibro). La instruisto donis al li la noton „tre bone”. Gjini,

kontenta, revenis al sia benko, kaj kiam li iris, el la ŝuotruo elstaris la granda piedfingro.

Sekvatage, post la mallonga kunsido de la pedagoga konsilio, la sekretario de la partia organizaĵo en la lernejo, Sabafi, triumfe sin turnis al la instruisto de geografio:

– Nu, Kujtim, finfine vi kaptis ĉi hundidon de la Toskuoj?

– Kion vi diras? – demandis Kujtim distrite.

– Nu, kion? Mi atendis, ke post la hieraŭa incidento vi rakontos al ni tion kiel la unua.

– Pri kiu incidento, kamarado Sabafi? – demandis Kujtim serioze.

– Des pli malbone por vi, kamarado Kujtim, ke vi ludas naivulon.

Kaj li klarigis al la surprizita instruistaro:

– Ĉar Kujtim povas nenion rememori, do mi rakontos, kio okazis dum la leciono de geografio en la kvina klaso. Gjini Tosku, infano el la familio de Preng Tosku, pri kiu vi bone scias, ke ĝi estas la plej malprogresema familio en la regiono – do Gjini diris publike ĉe la tabulo, ke „Ĉinio estas reviziisma lando”.

La instruistoj senspiriĝis.

Kujtim, rememorinte tiun lecionon, ekridis kaj diris:

– Nun mi jam scias, pri kio vi parolas, kamarado Sabafi. Bedaŭrinde vi estas misinformita. Mi rememoras tiun okazaĵon aŭ incidenton (nomu ĝin kiel vi volas) kaj ĝi sekvis el tio, ke Gjini, kiu estas unu el la plej bonaj lernantoj en la klaso kaj ĉiam bone konas ĉiujn temojn de la lecionoj, vokita al la respondo kutime parolas unuspire kaj pro hastemo perdas vortojn. Do, anstataŭ respondi „Sovetunio estas reviziisma lando” li diris erare, ke Ĉinio. Kompreneble li tuj korektis sian respondon. Mi ankaŭ scias, ke li apartenas al la familio de elklasigitaj kulakoj, sed mi ripetas ankoraŭfoje, ke tiu faro estis nek planita, nek intenca.

– Unue – eksplodis Sabafi – povas esti, ke vi havas – kiel vi diras – dum viaj lecionoj miraaaaklajn lernantojn (ĉi tie Sabafi plilongigis moke la sonon „aaaa”), sed dum miaj lecionoj ial mi ne vidas ilin, ĉe mi Gjini Tosku havas la notojn „tri”, ĉar li ne scias pli multe. Due kaj plej grave, mirigas min la maniero, laŭ kiu vi, kamarado Kujtim, simpligas la aferon. Ĉi tie, en nia lernejo, okazis io eksterordinara, pri kio mi devas tuj sciigi la Partian Komitaton en la regiono kaj la Fakon de Edukado, dume vi sidas indifere, kvankam vi devus tion prezenti kiel la unua. Pli malbone, mi vidas en vi la klopodon defendi ĉi merdulon! – En la voĉo de Sabafi aŭdeblis la minaca tono.

– Nu, kiu defendas lin ĉi tie! – Kujtim eksentis sin ofendita. – Mi ripetas ankoraŭfoje: estis nur misdiro. Eraro, pri kiu ne estas necese politikumi. Ni povas ja iri al la klaso kaj demandi la lernantojn.

– Ni faros ankaŭ tion! – krias Sabafi. – Sed unue ni aŭskultos, kion Gjini diros al ni. La infanoj, kiel vi scias, estas pli sinceraj ol iliaj gepatroj aŭ hipokritaj plenkreskuloj – li mokis pri la ŝokita Kujtim.

– Bone – enstrudiĝis la direktoro, kiu silentis ĝis tiu momento. – Al vi, kamarado Sabafi, mi konsilus esplori ĉi aferon precize. Ne ĉar mi opinias, ke vi malpravas. Sed vi mem vidas, ke instruisto Kujtim nenion konfirmis, kaj ni povas fari nenian decidon sen unuanimeco. Do, unue ni preparolos la aferon de Gjini Tosku en nia rondo, kaj poste mi sciigos la Fakon de Edukado en la distrikto, ĉu bone?

– Mi apogas tion plene – respondis obstine Sabafi.

– Ankaŭ mi konsentas – diris Kujtim kaj eliris terurigaŭte, ĉar li imagis, kio povus okazi, se la afero estus pritraktita tiel, kiel volis Sabafi. Ĉiuj sciis, ke Sabafi malamas la Toskuojn ne nur pro politikaj kaŭzoj, sed ankaŭ pro sia kampula furiozo. Oni diradis, ke li perfortis fratinojn de la Toskuoj. Poste ŝi akuzis lin antaŭ la tribunalo, sed li ne estis kondamnita pro „manko de pruvoj”. La familio de Preng Tosku oni traktis en la vilaĝo kiel eble plej malbone. Unu frato de Preng mortis en malliberejo, la alia forkuris eksterlanden. Preng estis la plej silentema vilaĝano. Ofte li staradis en la vico antaŭ la vilaĝa bakejo, kie homoj atendadis panon dum horoj. Longe restis en la memoro lia vizaĝo sen esprimo, kiam li rigidiĝis en torentoj da malvarma pluvo, kun akvogutoj falantaj de la okulharoj. Fine, kiam li antaŭeniĝis, kutime la vendistino – unu el la plej fervoraj kaj malicaj komunistinoj en la vilaĝo – diradis triumfe: „La pano elĉerpiĝis, Preng. Venu morgaŭ!” Kaj tiam, sen montri sian elreviĝon, silente li revenadis hejmen, kun malplenaj manoj, kaj la sekvan tagon same kviete li staris denove en la vico sub pluvogutoj falantaj de la tegmento. Kaj kiam finfine li ricevis panbulton, lia vizaĝo esprimis nenian senton.

Preng estis dungita en la lignotenejo. Dum la laboro ofte helpis lin Gjini. Kune ili portadis trabojn, kaj estis io varma kaj mirinda en tio, kiel silente kaj interkompreniga nur per gestoj ili zorgadis, ke unu ne metu pli grandan pezaĵon sur la dorson de la alia.

Iun fojon, antaŭ la komenco de la malferma popolkunsido, la partia sekretario atente rigardis en la ĉambro-fino kaj montrante per fingro la starantan tie Prengon li kredis: „Rigardu, kamaradoj, kiu honoras per sia ĉesto nian popolkunsidon – Preng Tosku!”

La homoj turnis la kapon kaj miregante rigardis la patron kaj la filon. Preng staris muta kiel roko, Gjini, al kiu brilis la okuloj, tenis la manon de la patro. Ili atendis, kio okazos. Kiel ŝajnis, Preng ne komprenis la aludon de la sekretario.

– Nu, kion vi serĉas, estimata sinjoro, ĉi tie? – mokis la sekretario. – Ĉu vi ne komprenis, ke la popolo de nia vilaĝo kunsidis por decidi, kiel ni dividos la kampojn de la vilaĝaj kulakoj?!

La partia sekretario, kontenta pri tia spritaĵo, ekridis laŭte. Post momento aliĝis ĉiuj en la ĉambro. Nur nun Preng vidis klare, ke ili forpelas lin el la kunsido kaj li eliris en la pluvon, tenante la manon de sia filo.

Ĉio okazis semajnon antaŭ la kunsido de la pedagoga konsilio „pri la incidento kun Ĉinio”. Enirinte post la kunsido en la klasĉambron, Kujtim tuj rememoris pri la okazaĵo. Li rigardis kaŝe Gjinon, kiel li elprenas librojn el la tola sako, kaj suspiris en la animo: „Por kompletigi vian malfeliĉon, povra knabo, ankoraŭ mankis al vi Ĉinio”.

Kujtim sentis, ke li ne havos sufiĉe da forto por defendi Gjinon antaŭ la atakoj de Sabafi. Li komprenis, ke ĉi tiu infano distingiĝas inter la aliaj per „malinda deveno” – du malbonaŭguraj vortoj, nekompreneblaj al la infana menso. En la profundo de la animo li sentis, ke neniu ŝatas Gjinon, nek lian familion, ke ĉiuj timas ilin.

Do, ĝuste tial la knabo ne ludis kun siaj kolegoj sur la korto, en la lernejo li evitadis la aliajn knabojn, kaj posttagmeze li iris paŝti bovinon, kun lernolibro en la mano.

Post la leciono, irante tra la koridoro, kvazaŭ hazarde, Kujtim demandis Gjinon:

– Vidu, mi estas surprizita, ke en la klaslibro vi havas tiom da malbonaj notoj ĉe sinjoro Sabafi. Nu, kial?

Rigardante infane, Gjini respondis:

– Mi klopodas, sed al mi ŝajnas, ke vane.

– Ĉu vere? – malcedis Kujtim. – Post la aliaj lecionoj vi havas nur tre bonajn notojn. Kaj eble sinjoro Sabafi havas ion kontraŭ vi aŭ via patro, aŭ iu alia?

– Ne, sinjoro. Mi ne scias pri tio.

Kujtim povis nenion diveni laŭ tiu senkulpa vizaĝeto de la knabo.

– Diru, vi ne estas malsaĝa... Parolante sincere, mi havas la impreson, ke sinjoro Sabafi malŝatas vin.

– Eble, sed mi ne scias pri tio – respondis Gjini kviete.

La sekvan tagon dum la longa paŭzo Sabafi informis la instruistaron pri „malgranda konfronto”. Li enkuris la direktoran ĉambron, posttirante je la mano la vakspalan Gjinon.

La knabo ŝajnis tiel infaneca.

– Eniru, Gjini, eniru – Sabafi ekpuŝis lin antaŭen, por ke li stariĝu vidalvide de la instruistoj. La timigita Gjini similis leporeton meze de la grego de lupoj. Sabafi impresis ĝoja.

– Gjini, timu nenion, hodiaŭ ni ne kunvenis por doni al vi punon pro ia krimeto. Nur rakontu, kio okazis dum la leciono de geografio kun instruisto Kujtim, kaj poste vi iros ludi pilkon, ĉu bone?

La vizaĝeto de Gjini esprimis nenion. Senĉese li estis singardema, rigardis jen Sabafion, jen aliajn instruistojn. Li provis kompreni, pro kio li estis venigita.

– Nu, diru al ni, kiu hejme ordonis al vi respondi ĉe la tabulo: „Ĉinio estas reviziisma lando”.

– Neniu, sinjoro. Mi ne diris tion, neniu diris tion al mi hejme, nek ie.

Ĉi-tage Sabafi estis pacienca.

– Gjini, vi ja vidas, ke ni volas fari al vi nenion malbonan, kaj mi traktas vin delikate kiel ovon, multe pli bone ol kutime, ĉu ne?

Gjini kapjesis.

– Kaj nenio okazos – daŭrigis milde Sabafi – nek al vi, nek al via patro, nur diru, kiu petis vin pri tio, kaj estos fino. Vi ne estas sufiĉe aĝa, por kompreni, kiu en la mondo gvidas la socialisman politikon, kaj kiu postulas la revizion de la principoj de marksismo-leninismo.

– Aĥ, ne, sinjoro, mi diris nur tion, kion mi trovis en la lernolibro, kaj mi scias, ke Ĉinio estas socialisma lando.

– Ne estas necese, ke vi memorigu nin pri tio, kia lando estas Ĉinio – Sabafi perdis la fridan sangon. – Nur diru al ni, kiu instruis al vi paroli tion, kion vi diris en la klasĉambro.

Neniu povis devigi tiun malgrandan knabon al la konfeso, ke iam ajn li diris tion, sed Sabafi pliseverigis la demandadon:

– Nu, bone, sed kial instruisto Kujtim konfirmas, ke vi diris tion?

Gjini rigardis timigite Kujtimon kaj obstiniĝis tremvoĉe:

– Ne, sinjoro instruisto Sabafi, mi ne diris tion, mi nur diris...

Li komencis cedi. Sabafi povis finfine malbridi sian ĉasistan kapablon:

– Nu, Gjini, mi vidas, ke vi jam kondutas tiel, kiel estas dece. Mi diras malkaŝe, mi havas nenion kontraŭ vi kaj via patro. Nur kontraŭ tiu, kiu instruis vian patron, ke Sovetunio estas lando socialisma, mi volis diri kapitalisma – perdiĝis Sabafi.

La direktoro – silenta ĝis nun – interrompis afable: – Reviziisma, kamarado Sabafi.

– Jes, jes, reviziisma, estis misdiro, dankon – respondis malmilde Sabafi, ne vidante, ke ĉio miksiĝis por la aliaj, kaj li daŭrigis: – Nu, Gjini, kiel vi pensas, kial Sovetunio estas reviziisma lando?

– Ne, sinjoro instruisto, neniu diris tion al mi – Gjini ploris.

Estis necese havi ŝtalajn nervojn por ekkredi, ke la knabo diros, ke iu hejme instruis al li paroli: „Ĉinio estas reviziisma lando”.

La manoj de Sabafi tremegis pro furiozo.

La instruistoj komencis interflustri, sed neniu kuraĝis enstrudiĝi.

– Ni jam lasu ĉi aferon, kamarado Sabafi. Vi vidas, ke li konfesis nenion kaj ni vane perdas tempon ĉi tie – diris fine la juna instruistino de la angla lingvo.

– Hola, fraŭlino – interrompis ŝiajn vortojn Sabafi. – Ni kapablas paroli ankaŭ en alia lingvo! Tiu kulaka bubaĉo jam ne mokos! – kaj furioza li atakis Gjinson:

– Gjini Tosku! Pripensu ĉion! Vi kaj via patro bonege scias, kiu estas Sabafi Keci kaj la Partio, kiuj eĉ el la faŭko de serpento kapablas elpreni la tutan veron. Aŭ vi tuj diros, kiu instruis al vi tiajn parolojn, aŭ mi turmentegos vin kaj vian familion tiel, ke ne eltenos vi, nek via patro, kiu per tiaj sloganoj venenas pensojn en via kapo. Tre bone vi scias, ke mi ne cedos. Kaj se vi ne scias, do mi scias, kiamaniere pereigi vin. Mi pensas, ke en la familio... mi volis diri: gento Tosku – estas bone konata la ĵipo de la sekurservo, kiu veturadas al la vilaĝo?

Gjini, kun la okuloj senĉese larmoplenaj, rigardis jen Sabafion, jen la aliajn instruistojn.

La kampula instinkto diris finfine al Sabafi, ke en la mondo ne estas tia potenco, kiu devigus la knabon al la kulpokonfeso. Li flustris subnaze „Ankoraŭfoje ni pritraktos ĉi aferon...” kaj li turnis sin denove al Gjini:

– Sed morgaŭ, ci reviziista demagogo, bonvolu konduki vian patron al la lernejo. Kaj nun jam malaperu! For de miaj okuloj! – kaj sen vorto de klarigo li eliris kiel la unua el la direktora ĉambro, kaj post li ĉiuj instruistoj.

Gjini forlasis ĝin kiel la lasta. Li iris preni sian sakon kun libroj.

Sur la ludejo proksimiĝis al li klaskolego:

– Nu, Gjini, kion ili volis?

– Aĥ, nenion gravan.

– Ĉu vere, do kial vi ploras?

– Aĥ, estas nenio, vere nenio – kaj li foriris, plaŭdante en flakoj per siaj piedoj, kun tola sako ĵetita sur la ŝultron.



elalbanigis **Bardhyl Selimi** (Albanio)

Ai Wu (1904-1992)



aŭtoro, Ai Wu

Vintra Nokto

Estis frosta vintra nokto. La strato estis senbrue obskura. Mi sola staris sub arbo kun interplektitaj senfoliaj branĉoj ĉesupre kaj atendis la lastan buson. Kelkajn paŝojn for de mi en la mallumo kaŭris ombra figuro ĉe la muro, sed li estis nur trampo. Ambaŭflanke de la strato staris luksaj domoj, kies lumigitaj fenestroj brilis kviete en la sombre-bluan ĉielon. En la strato regis frosto kun blovoj da forta vento. Kelkaj velkitaj folioj, kiuj ankoraŭ pendis sur la branĉoj, de tempo al tempo susure ĝemis.

La kaŭranta figuro, preninte kupreron de mi kun danko, ĝoje stariĝis kaj intencis interparoli kun mi. “Vere malvarme ĉi tie,” li plendis pri la vetero. “Nenie estas pli malvarme ol ĉi tie! ... Kiel vi pensas pri tio, sinjoro?”

Juĝante, ke li estas oldulo nenaŭza, mi respondis kun plezuro, “Devas esti multe pli malvarme en la kamparo, mi supozas.”

“Ne, ne,” li malkonsentis kaj ektusis, kun la vortoj ŝtopitaj en sia gorĝo.

“Kial?” mi demandis. “En la kamparo, kiam falas prujno, la tegmentoj kaj kampoj iĝas blankaj en la mateno, sed tian oni ne povas vidi sur la stratoj.”

Frapetinte sin sur la bruston, li ekscitite daŭrigis, “Jes, vere... estas malvarme en la vilaĝoj, sed estas denove varme tuj kiam vi enŝoviĝas en la pajlostakon antaŭ ies domo... Sed en tiu ĉi strato, humm, kia terura loko! ... Tie en la montoj estas eĉ pli froste ol en la kamparo. Sed kiam oni ekbruligas fajron endome kaj la tuta familio ĉirkaŭe sidas, kia harmoniaĵo tio estas!”

Poste li ekrakontis pri la aventuroj dum siaj fortaĝaj tagoj: vojaĝi sola dum

vintraj noktoj tra la montoj en la sudo. Ĉar min interesis rakontoj pri vagantoj kaj tiam la buso ankoraŭ ne venis, mi instigis lin daŭrigi sian babiladon.

“Kiam finiĝas la tago en la montoj,” li diris, “kaj se vi estas homo honesta, vi povas ĉiam iri al la domo, kie olelampoj flagras kaj hundoj bojas. Vi povas perpuŝe malfermi la rubusan pordon sub la arbo kaj senhezite endomiĝi. Disigu la homojn ĉirkaŭ la fajro, ĉu virojn ĉu virinojn, per viaj manoj, kaj vi, malvarma kaj malseka kun roso, enŝoviĝos senĝene inter la amason. Via nazo tuj pleniĝos de aromo de rostitaj batatoj kaj de varma teo. Ĉirkaŭe ridetas bonvenaj okuloj, en kiuj montriĝas neniun mienon kulpigi vian abruptecon. Apenaŭ vi komencas diri al ili de kie vi venis, tason da varma kaj forta teo oni al vi donas. Avino diras al sia nepino, ke ŝi alimentu la fajron per pli da hejtligno, ĉar la gasto bezonas varmigi sian korpon.

“Kiam vi retrovas viajn korpvarmon kaj forton, vi povas plezurigi la infanojn, karesante al ili la mentonon, delikate pinĉante ilin je la vango kaj eĉ grimacante por ilin ĝoje glugligi. La ravita juna patrino tiam kuraĝigos sian infanon dividi kun vi la manĝotan bataton. Tenante duonon de la batato, la infano metos la alian duonon en vian manon.

“Se vi decidas tranokti en ilia domo, vi ricevos de ili pli afablan gastigon. Se vi volas nur iomete ripozi por vin varmigi kaj poste daŭrigi vian vojaĝon, la domanoj ĉiuj venos diri al vi adiaŭ ĉe la pordo. ‘Vizitu nin ankoraŭfoje kiam vi revenos!’”

Dum lia babilado, ankoraŭa malvarma vento ekblovigis kaj la oldulo denove ektusis. Mi estis tiel allogita, ke mi tute neglektis la froston. Spite ke ni estas fremdaj unu al alia, la oldulo subite prenis min je la mano kaj demandis,

“Kial do, sinjoro, ĉi tie oni ne lasas alilokanon eniri por varmigi liajn manojn? Ili devas bruligi pli gajan fajron. Rigardu al iliaj brilaj fenestroj.”

La buso muĝe alproksimiĝis. Rapide retirinte mian manon el liaj, mi laŭte diris al li,

“Ĉar ili estas homoj pli civilizitaj ol tiuj en la montoj...”

Tion dirinte mi saltis en la lumigitan buson, kiu tuj ekmoviĝis kaj postlasis la oldulon tie. Tamen la dometoj kun flagrantaj lampoj en la malproksimaj montoj kaj la ebriiga gastamo de la montaranoj — ĉio, kion mi spertis en tiu vintra nokto, restigis profundan impreson en mia memoro.



elĉinigi **Liu Hongyuan** (Ĉinio)

Yang Shuo (1913-1968)



aŭtoro, Yang Shuo

Liĉia Mielo

Floroj, birdoj, herboj kaj insektoj, kiuj povas esti prezentataj sur pentraĵoj, ĝenerale plaĉas al homoj. Abeloj estas la objektoj ŝatataj de pentristoj, sed mi ne tre ŝatas ilin. Mia travivaĵo estas ridinda. Iufoje, kiam

mi, kiel infano, surgrimpis arbon por pluki begoniflorojn, neatendite mi estis pikita de abelo kaj pro dolorego preskaŭ falis de sur la arbo. Plenkreskuloj diris al mi, ke abelo ne facile pikas homon kaj, kiam ĝi sentas sin vunde minacata de homo, ĝi pikas, sed per sia pikado, ĝi konsumas sian vivon kaj ne plu vivas longe. Aŭdintion, mi ekhavis kompaton al la abelo kaj indulgis ĝin. Tamen ekde tiam, kiam mi vidas abelojn, mi ĉiam sentas iom da korpremiĝo kaj malkomforteco.

En aprilo ĉi-jare mi loĝis kelkajn tagojn ĉe la termofonto de Conghua, Guangdong-provinco. Ĉirkaŭe troviĝas montoj kaj la laĝeto da printempa akvo nestas en ilia brakumo. La dense verda pejzaĝo ja similas al ĉina tradicia pentraĵo de verdaj montoj kaj riveroj. Tiun vesperon, kiam mi iris tien, estis malserene. Mi ĵetis okazan rigardon tra la fenestro de etaĝdomo, mi sentis tion stranga, ke antaŭ la etaĝdomo abrupte aperas el nenie tiom da nigraj montetoj, tavolon super tavolo kaj ondumantaj. Mi memoris, ke etendiĝas ebena vastaĵo da fruktoarbaro, sed ne montetoj. Kia miraĝo tio estas? Kiam mi pririgardis la sekvan tagon, mi ne povis reteni mian ridon. En mia vido plenis liĉiarboj ĉie, starantaj unu apud alia kaj la folioj kaj branĉoj de ĉiu arbo estis tiel densaj, ke eĉ vento ne povas penetriĝi. Vidate en malhela nokto, ili kompreneble similis al montetoj.

Eble liĉioj estas la plej freŝaj kaj belaj fruktoj en la mondo. Poeto Su Dongpo* priskribis ilin verse: “Se mi povus frandi liĉiberojn jen tri cent, loĝus longe mi kiel lokano kun kontent’.” El tio ni povas vidi la bonecon de liĉioj. Tamen mi iris tien ne en konvena tempo. La arboj plene portis flavetajn florojn, ne tiom okulfrapajn, kaj la delikataj ŝosoj nove elŝovitaj kun pala ruĝeco pli plaĉis al la okuloj ol tiuj floroj. Ĉirkaŭ tri monatoj estis bezonataj de disflorado al maturiĝo de liĉiberoj. Kaj pro tio mi ne havis sufiĉan tempon por atendi kaj frandi freŝajn liĉiberojn tie.

Tamen estis la ĝusta tempo por manĝi mielon de liĉioj. Eble kelkaj ne aŭdas pri

tiu frandaĵo, ĉu? En Conghua liĉiarboj mare multas, kaj dum disflorado abeloj zumadas ĉie, okupiĝante pri kolektado de poleno kaj elfarado de mielo la tutan tagon, eĉ sub lunlumo. La liĉia mielo karakteriziĝas per pureco kaj nutreco. Tiuj, kiuj loĝas ĉe la termofonto de Conghua ŝatas frandi tiun ĉi specon de mielo. Varmkora kamarado havigis al mi du botelojn da mielo. Kiam mi eltiris la ŝtopilon de la botelo, dolĉa bonodoro atakis min. Mi miksis ĝin kun duonglaso da akvo kaj la miksajo elspiris bonodoron kun dolĉeco kaj saponon de freŝaj liĉiberoj. Manĝante tiuspecan mielon, vi certe trovas ankaŭ la vivon dolĉa.

Emociite, mi volis pririgardi tiujn abelojn, kiujn mi ĉiam ne tre ŝatas.

En profundeco de liĉiarbaro malklare videblis angulo de blanka domo, kiu estis la abelbredejo de la termofonta komunumo, kun amuza nomo “Abelbreda Domego”. Tiam printempo prosperis kaj floroj pompe disfloris. Alproksime al la abelbredejo vidiĝis aroj kaj aroj da abeloj flugantaj ir-reire. Tia bolanta multeokupiteco supozigis al vi, ke abeloj hasteme kreas sian novan vivon.



Abelisto Maljuna Liang kondukis min en la abelbredejon. Maljuna Liang fakte estis junulo, kiu laboris tre zorgeme. Eble li volis, ke mi pli profunde sciiĝu pri la vivo de abeloj, kaj li levmalfermis kovrilon de abelujo el ligno. Ene staris vicoj da lignaj septoj, kiuj plenplenis je abeloj rampantaj tien kaj tien. Abelreĝino estas brunkolora kun longa kaj maldika korpo, kaj

ĉiuj abeloj voluntas manĝigi ĝin per la nektaro, kiun ili kolektas.

Maljuna Liang suspire diris: “Jen vidu. Tiuj vivestaĵetoj estas tre obeemaj.”

Mi demandis: “Kiom da mielo oni povas akiri ĉiujare el tia abelujo?”

Li respondis: “Kelkdek kilogramojn. Abeloj estas tre laboremaj. La klimato de Guangdong estas tre favora kaj plie multas diversaj floroj. Dum la kvar sezonoj de la jaro abeloj troviĝas en multeokupiteco. Ili produktas multe da mielo, sed ili mem konsumas limigitan kvanton. Ĉiufoje, kiam oni kolektas mielon, oni restigas joton da mielo sufiĉan por ilia konsumado. Ili neniam konkuras pri manĝado nek zorgas pri si mem. Ili daŭre laboras, daŭre elfaras mielon kaj ŝparas neniajn penojn...”

Mi demandis: “Ĉu oni timas, ke aliaj insektoj damaĝas tiel bonan mielon?”

Li respondis: “Kial ne? Oni devas gardi kontraŭ enstrudiĝo de aliaj insektoj, precipe la vespoj. La plej malicaj estas vespoj, kiuj ofte faras malbonojn ĉe la enirejo de abelujoj.”

Mi nereteneble ekridetis: “Ho, troviĝas ankaŭ invadantoj en la naturo. Kiel oni traktas la vespojn?”

Li diris: “Dispelu ilin! Se ili ne dispeliĝas, oni batmortigas ilin. Se oni lasas ilin

resti tie, ili mordmortigas abelojn.”

Mi metis alian demandon: “Kiel longe abelo povas vivi, do?”

Li respondis: “La abelreĝino povas vivi pli ol tri jarojn kaj laborabelo nur ses monatojn.”

“Ilia vivdaŭro estas tiel mallonga, ke vi devas plejofte elbalai la mortintajn abelojn, ĉu ne?”

Ekskuinte la kapon, li diris: “Neniam. Abeloj scias pri sia vivdaŭro. Kiam ilia lasta tago alvenas, ili forflugas eksteren kaj mortas kaŝite, neniam reflugante.”

Mian koron kaptis ekstremo. Kiel amindaj vivestaĵetoj! Ili postulas nenion de la homoj, sed prezentas al la homoj la plej bonan aĵon. Abeloj ne nur elfaras mielon, sed ankaŭ kreas la vivon. Kaj ili kreas la plej dolĉan vivon ne por si mem, sed por la homoj. Kvankam ili estas malgrandaj, tamen ili estas tre noblaj!

Tra densaj liĉiarbaroj mi enpenŝiĝante rigardas al malproksimaj kampoj, kie kampuloj, starante en rizkampoj, diligente transplantas rizplandidojn. Ili konstruas sian vivon per siaj laboroj, fakte elfaras mielon de la vivo, por si mem, por aliaj kaj por siaj posteuloj.

Tiun nokton mi sonĝis, ke mi fariĝis malgranda abelo.

**Su Dongpo (1037-1101): ĉina fama poeto*

Odo al kamelfloroj

Dum longa restado en fremdlando mi neeviteble naskas sopiremon al la patrio. Kiam min kaptis forta sopiremo, mi ekhavis ideon: kiel bona estos tio, se mi bildigos la fizionomion kaj trajtojn de la patrio kaj prezentos ĝin antaŭ miaj okuloj ĉiumomente! Mi konsiliĝis pri tia ideo kun kamaradino, kiu lertas en pentrado de ĉinaj tradiciaj pentraĵoj, kaj petis ŝin fari tian pentraĵon por mi. Ŝi tamen diris: “Tio estas malfacila. Kion mi pentru? Ne taŭgus, se mi nur pentrus fragmentojn de montoj kaj riveroj. Kaj plie estus malfacile disponigi diversajn kolorojn. Eĉ se oni elfarus diversajn kolorojn kaj utiligus ilin ĉiujn, ĉu oni povus per ili bone prezenti la fizionomion de la patrio?” Pensante, ke ŝi estas prava, mi flankenmetis la ideon.

Februare de la kuranta jaro mi revenis de fremdlando. Kiam mi surpaŝis la teron de Kunming, mi sentis min ebria. Mi estas nordano. Laŭ sezono, tiam la nordo eble dronas en flirtanta neĝado kaj ĝiaj riveroj kaj montoj aspektas mizere malgrasaj, dum en Yunnan la printempo rapidigas siajn paŝojn kaj urĝas disfloradon, kiel akuŝakcelistino.

La loko en la plej prospera disflorado estas la templo Huating sur la okcidenta monto. Ankoraŭ ne atinginte la pordon de la templo, mi jam flaris strion da delikata bonodoro, kiu rekte penetris en mian internon. Ili estas umefloroj, kiu konsistas el ruĝaj, blankaj, verdaj kaj cinabraj umefloroj, plenigante ĉiujn arbojn. Ĉiu arbo plena

je umefloroj elspiras poezian etoson. Blankaj magnolifloroj aspektas iome velkintaj, kaj helflavaj floroj de vintraj jasmenoj ĝuste troviĝas en pompeco. La printempa pejzaĝo estas multoble pli bela ol la sorĉa akvo en la lago Dianchi.

Fakte ĝi ne estas la plejbelajo de la printempo. Jen vidu la arbon, kiu altas ĝis la ĉirkaŭrando de la tegmento de la templo Huating. El inter ĝiaj oleecaj junverdaĵoj folioj elŝoviĝas centoj da floregoj kun grasaj petaloj, tiel brile ruĝaj, kiel ardantaj fajroj. Ili estas famkonataj kamelifloroj. Sen vidi tiujn florojn vi ne komprenus la belecon de la verso “Printempo profundas kiel maro”.

Estis ĝusta tempo aprezi kameliflorojn. Mi vizitis la templon Huating kaj vojaĝis al la lago Heilong spite al delikata pluveto. Tiuj du lokoj estas la pitoreskejoj kun pompantaj kamelifloroj. Mi pensis, ke kamelifloroj certe videblas rare, sed dum mia vojaĝo mi vidis de tempo al tempo skarlatajn florojn apud bambubariloj aŭ pajlokabanoj. Amiko diris al mi: “Tio ne estas mirinda. En Dali preskaŭ ĉiuj familioj kultivas kameliflorojn. Kiam la sezono de disflorado alvenas, la floroj de diversaj specoj konkuras inter si per sia ĉarmeco. Jen vere bela pejzaĝo!”

Mi nevole enpensiĝis vizaĝe al la kamelifloroj. Jes, ili estas belaj. Ĉiuj belaj aferoj en la vivo estas elkreitaj per laboro. Kiuj akvumas tiujn florojn per sia ŝvito kaj flegas florplantidojn kiel siajn infanojn, tagnokte kaj de jaro al jaro, tiel ke ili elkulturas tiom belajn florojn? Ni devas ŝuldi nian dankemon al tiuj, kiuj beligas nian vivon.

Pu Zhiren estas unu el tiuj lertaj majstroj, kiun mi renkontis ĉe la bordo de la lago Verda, kie multas kamelifloroj en prospero kaj ruĝe kovras vastajon, kvazaŭ kolorriĉa nubo falanta sur la lagbordo. Li kondukis min tra kamelifloroj kaj konigis al mi la alinomojn de tiuj floroj, kiaj Granda Agato, Neĝa Leono, Papilia Flugilo, Purpura Robego... kaj multaj similaj. Poste surgrimpinte la trunkon de kameliarbo, li diris: “Tiu ĉi estas nomata Infana Vizaĝo, kiu havas malfruan disfloradon kaj ekportas florburĝonojn antaŭ nelonge. Ĝiaj floroj estas helruĝaj, la plej belaj el kamelifloroj.”

Mi demandis: “Kiel antikvuloj diris, facilas spekti florojn, sed malfacilas kultivi florojn. Certe tre malfacilas kultivi kameliflorojn, ĉu ne?”

Li respondis: “Ne tre malfacile, nek facile. Kamelifloroj havas siajn karakterizojn. Oni devas doni grandan atenton al la grundo kaj klimato, en kiuj ili kreskas. Ili timas ventblovojn kaj sunumadon. Ili tre ŝatas la medion duonmalluman kaj duonluman. La plej abomenindaj estas insektoj. Troviĝas speco de insektoj, kiuj povas enŝoviĝi en la koron de floroj. Se tia insekto enbrudiĝos, la floroj mortos. Oni devas pene trakti multajn ĝenaĵojn dum la tuta jaro.”

“Kameliarbo ne povas vivi longe, ĉu?” mi metis alian demandon.

Li respondis: “Tre longe. Ĉe la templo Huating staras kameliarbo nomata Pina

Skvamo, kiu jam vivas pli ol kvin cent jarojn ekde la Ming-dinastio. Kiam ĝi disfloras, ĝi povas doni pli ol mil florojn.”

Mi aŭtomate eligis surprizitan ekkrion. Mi vere ne imagis, ke la kameliarbo, kiun mi vidis ĉe la templo Huating, havas tiel longan historion.

Miskomprenante, kion mi pensas, li tuj klarigis: “Ĉu vi ne kredas? En la tereno de Dali kreskas pli maljuna arbo de pli ol mil jaroj, laŭ eldiro de maljunuloj. Kiam ĝi disfloras, ĝi portas sennombrajn florojn. Pro tio oni nomas ĝin Kameliarbo kun Dek Mil Floroj. Ĝia trunko tiom dikas, ke kelkaj homoj ne povas kune ĉirkaŭpreni ĝin.” Dirante, li faris la pozon de ĉirkaŭpreno per ambaŭ brakoj.

Mi entuziasme rigardis liajn manojn kaloplenajn kaj algluitajn per freŝa grundo. Poste mi direktis mian rigardon al lia vizaĝo. Ĉe liaj okulanguloj ĉiziĝis profundaj faltoj, de kio, sen demandi, oni facile divenas, ke li estas spertoriĉa kaj sufertravivinta mezaĝulo. Se li foriros de vi kaj eniros en homamason, li tuj malaperos senspure kaj oni neniel facile trovos lin. Jen li estas tiel ordinara laborulo. Tamen ĝuste tiuspecaj laboruloj penadas kultivi florojn kaj arbojn per ĉiuj siaj energioj dum la tuta jaro por beligi nian vivon. Beleco estas elkreita tiamaniere.

Ĝuste tiam grupo da infanoj venis spekti kameliflorojn. Levante la ruĝetan vizaĝeton, ili dolĉe ridis kaj senĉese pepadis.

“La floroj de Infana Vizaĝo ekdisfloras,” mi diris.


Post iom da stuporiĝo li tuj venis al la kompreno kaj li ridetante diris: “Ja vere. Neniaj floroj estas pli okulplaĉaj ol tiuj ĉi floroj de Infana Vizaĝo.”

Ideo subite saltis en mian cerbon kaj prezentis skizon de bildo. Se oni pentros grandan floron de Infana Vizaĝo ĵus disflorantan kun roseroj per la plej densa kaj plej freŝa cinabra ruĝo, ĉu ĝi simbolos la fizionomion de la patrio? Se mi surpaperigos tiun ĉi simplan skizon kaj sendos ĝin al la pentristino en fremdlando, eble ŝi volontos fari konsideron kaj elbaki tiun ĉi pentraĵon, ĉu ne?

elĉinigas Le Le (Ĉinio)



Fratoj Grimm



Fratoj Grimm

Fraĉjo kaj Fratinjo

Fraĉjo manprenis sian fratineton kaj diris: „De kiam la patrino estas morta, ni havas eĉ ne unu bonan horon plu, la duonpatrino batas nin ĉiutage, kaj kiam ni proksimiĝas al ŝi, ŝi forpuŝas nin perpiede. La malmolaj pankrustoj, kiuj postrestas, estas nia manĝo, kaj la hundeto sub la tablo pli bone fartas ol ni, al ĝi ŝi ja ĵetas de tempo al tempo ion bongustan. Dio kompatu, se tion sciis nia patrino! Venu kun mi, ni foriru kune en la vastan mondon.“

Ili iris dum la tuta tago trans herbejojn, kampojn kaj ŝtonojn. Kaj, se pluvigis, diris Fratinjo: „Dio kaj niaj koroj larmas kune!“

Vespere ili venis en grandan arbaron kaj estis tiom lacaj pro malgajo, malsato kaj la longa vojo, ke ili sidiĝis en kavan arbon kaj endormiĝis.

Je la alia mateno, kiam ili vekigis, la suno jam troviĝis alte sur la ĉielo kaj sendis varmegajn radiojn en la arbon.

Jen diris Fraĉjo: „Fratinjo, mi soifas, se mi sciis pri puteto, mi irus tien kaj trinkus, mi opinias, ke mi aŭdis iun.“

Fraĉjo ekstaris kaj manprenis Fratinjon, kaj ili volis serĉi la puton. Sed la malica duonpatrino estis sorĉistino kaj certe vidis, kiel ambaŭ infanoj foriris, ŝi ŝtelire sekvis ilin sekrete, tiel, kiel ŝteliradas la sorĉistinoj, kaj ŝi ensorĉis ĉiujn putojn en la arbaro. Kiam ili trovis puteton, kiu briltreme saltadis trans la ŝtonojn, Fraĉjo volis trinki el ĝi. Sed Fratinjo aŭskultis, kiel la puteto diris murmurante: „Kiu trinkas el mi, tiu fariĝos tigro, kiu trinkas el mi, tiu fariĝos tigro.“

Jen vokis Fratinjo: „Mi petas vin, Fraĉjo, ne trinku el ĝi, alie vi fariĝos sovaĝa besto kaj disŝiros min.“

Fraĉjo ne trinkis, kvankam li tre soifis. Kaj li diris: „Mi atendos ĝis la sekva fonto.“

Kiam ili atingis la duan puton, aŭskultis Fratinjo, kiel diris ankaŭ tiu ĉi: „Kiu trinkas el mi, tiu fariĝos lupo. Kiu trinkas el mi, tiu fariĝos lupo.“

Jen vokis Fratinjo: „Fraĉjo, mi petas vin, ne trinku, alie vi fariĝos lupoj kaj manĝos min.“

Fraĉjo ne trinkis kaj diris: „Mi atendos, ĝis kiam ni atingos la sekvan fonton, sed

tie mi devos trinki, vi povos diri ion ajn, mia soifo estas tro granda.“

Kaj kiam ili atingis trian puton, aŭskultis Fratinjo, kie la puto diris murmurante: „Kiu trinkos el mi, tiu fariĝos kapreolo, kiu trinkos el mi, tiu fariĝos kapreolo.“

Fratinjo diris: „Ve, Fraĉjo, mi petas vin, ne trinku, alie vi fariĝos kapreolo kaj forkuros de mi.“

Sed Fraĉjo tuj surgenuiĝis ĉe la puteto. Li kliniĝis kaj trinkis de la akvo. Kaj tuj, kiam la unuaj gutoj tuŝis liajn lipojn, tie kuŝis Fraĉjo kiel kapreolido.

Fratinjo ploris nun pri la kompatinda ensorĉita Fraĉjo kaj ankaŭ la kapreoleto larmis kaj sidis tre malgaja apud la knabino.

Jen fine diris la knabino: „Estu kvieta, kara kapreoleto, mi forlasos vin ja neniam.“

Poste ŝi malligis sian oran ŝtrumpligilon kaj ligis ĝin ĉirkaŭ la kolo de kapreoleto. Poste ŝi kolektis junkojn kaj plektis molan ŝnuron el ili. Al tiu ĝi ligis la besteton kaj kondukis ŝin per ĝi. Kaj ili iris pli kaj pli arbaren. Kaj irinte dum tre longa tempo, ili fine atingis dometon. La knabino rigardis en ĝin, kaj ĉar ĝi estis nepriloĝata, ŝi pensis: „Ĉi tie ni povos resti kaj loĝi.“

Ŝi serĉis por la kapreoleto foliojn kaj muskon por mola ripozejo. Ĉiumatene ŝi eliris kaj kolektis por si mem radikojn, berojn kaj nuksojn. Kaj por la kapreoleto ŝi alportis delikatajn herbojn, kaj tiujn la kapreoleto manĝis de ŝiaj manoj, ĝi plezuriĝis kaj ludadis antaŭ ŝi. Vespere, kiam Fratinjo estis laca kaj diris sian preĝon, ŝi metis sian kapon sur la dorson de la kapreoleto, kiu estis ŝia kuseno, kaj tiel ŝi ekdormis delikate. Kaj se Fraĉjo havus sian homan figuron, ĝi estus vivo grandioza.

Tiel ili vivis dum iom da tempo en la sovaĝejo. Okazis iam, ke la reĝo de la lando entreprenis grandan ĉasadon en la arbaro. Jen eksonis la kornblovado, la hundobojado kaj la gaja kriadado de la ĉasistoj inter la arboj, kaj la kapreolo aŭskultis tion kaj partoprenus tre volonte.

„Ah“, ĝi diris al Fratinjo, „permesu al mi iri al la ĉasado. Mi ne longe povos elteni tion plu. Kaj li petis ŝin tiom longe, ĝis kiam ŝi konsentis.

„Sed“, ŝi diris: „Sed nepre revenu vespere, pro la sovaĝaj ĉasistoj mi riglos la pordeton, kaj por ke mi ekkonu vin, frapu kaj parolu: „Fratinjo mia, enlasu min, kaj se vi ne parolos tiel, mi ne malriglos mian pordeton.“

Poste la kapreoleto elsaltis, kaj ĝi bonfartis kaj estis gaja en la libera aero. La reĝo kaj liaj ĉasistoj vidis la belan beston kaj persekutis ĝin, sed ili ne povis atingi la kapreoleton. Kaj se ili supozis, ke ili havas ĝin certe, ĝi forsaltis trans arbustojn kaj malaperis. Kiam estis malhele, ĝi iris al la dometo, frapis kaj diris: „Fratinjo mia, enlasu min.“

Jen ŝi malriglis la pordeton, la kapreoleto ensaltis kaj ripozis dum la tuta nokto sur sia mola ripozejo. Je la alia mateno la ĉasado komenciĝis denove, kaj kiam la kapreoleto denove aŭskultis la signalojn de la korno kaj la ho-ho-on de la ĉasistoj,

ĝi ne restis trankvila kaj diris: „Fratinjo, malfermu, mi devos eliri.“

Fratinjo malriglis la pordon kaj diris: „Sed vespere vi devos esti denove ĉi tie kaj diri vian diraĵon.“

Kiam la reĝo kaj liaj ĉasistoj denove ekvidis la kapreoleton kun la ora kolligilo, ili ĉiuj persekutis ĝin, sed ĝi estis tro rapida kaj tro lerta por ili. Tio daŭris la tutan tagon, sed fine la ĉasistoj vespere ĉirkaŭis ĝin kaj iu vundetis la beston je piedo, tiel, ke ĝi ekklamis kaj malrapide foriris. Jen ĉasisto ŝtelire sekvis ĝin ĝis la dometo kaj aŭdis, kiel ĝi vokis: „Fratinjo mia, enlasu min“, kaj li vidis, ke la pordeto malfermiĝis kaj baldaŭ refermiĝis. La ĉasisto memortenis ĉion tion bone, iris al la reĝo kaj rakontis al li, kion li vidis kaj aŭskultis. Jen la reĝo diris: „Morgaŭ ankoraŭfoje estu ĉasado.“

Fratinjo tre terurigiĝis, kiam ŝi vidis, ke la kapreoleto estas vundita. Ŝi forlavis ĝian sangon, surmetis herbojn kaj diris: „Iru al via ripozejo, kara kapreoleto, por ke vi resaniĝu.“



Sed la vundo estis tiel negrava, ke la kapreoleto sentis neniun doloron plu je la sekva mateno. Kaj kiam ĝi denove aŭskultis la ĉasan ĝojon ekstere, ĝi diris: „Mi ne povos elteni tion, mi devos ĉeesti, rapide kaptos min neniun.“

Fratinjo ploris kaj diris: „Ili mortigos vin, kaj mi estos ĉi tie sola en la arbaro kaj forlasita de la tuta mondo. Mi ne permesos, ke vi eliru.“

„Tiel mi do nun mortu ĉi tie pro malgajo kaj ĉagreno“, respondis la kapreoleto, „se mi aŭdas la signalkornon, mi opinias, ke mi devus salti el miaj ŝuoj!“

Tial Fratinjo ne povis agi alie kaj malriglis kun peza koro la pordeton kaj la kapreoleto saltis sana kaj ĝoja en la arbaron. Ekvidinte tion, diris la reĝo al siaj ĉasistoj: „Ek, persekutu ĝin dum la tuta tago ĝis kiam noktiĝos, sed neniun suferigu ĝin.“

Tuj, kiam la suno malaperis, diris la reĝo al la ĉasisto, kiu informis lin: „Ek do, montru al mi la arbaran dometon.“

Estante antaŭ la pordeto, li frapis kaj vokis: „Fratinjo kara, enlasu min.“

Jen malfermiĝis la pordo kaj la reĝo enpaŝis. Kaj tie staris knabino, kiu estis tiel bela, kiel li ankoraŭ neniam vidis iun. La knabino ektimis, kiam ŝi vidis, ke ne envenis la kapreoleto, sed viro, kiu havas oran kronon sur la kapo. Sed la reĝo rigardis ŝin afable, etendis la salutmanon kaj diris: Ĉu vi volas iri kun mi en mian kastelon kaj esti mia kara edzino?“

„Aĥ, jes“, respondis la knabino, „sed la kapreoleto devos kuniri, tiun mi ne forlasos.“

La reĝo diris: „Ĝi restadu ĉe vi, tiom longe, kiom vi vivos, kaj manku nenio al ĝi.“

Dum tio ensaltis la kapreoleto. Fratinjo ligis ĝin denove al la junkoŝnuro, kondukis ĝin per ĝi kaj foriris kun la kapreoleto el la arbara dometo.

La reĝo levis la belan knabinon sur sian ĉevalon kaj kondukis ŝin en sian kastelon, kie oni festis la nupton kun granda pompo. De tiam ŝi estis moŝta reĝino. Kaj ili vivis dum longa tempo feliĉe kune. La kapreoleton oni ŝirmis kaj flegis, ĝi saltadis en la kastela ĝardeno. Sed la malica duonpatrino, pro kiu la infanoj devis iri en la mondon, opiniis, ke Fratinjon disŝiris la sovaĝaj bestoj en la arbaro, kaj ke Fraĉjon, la kapreolidon, mortpafis la ĉasistoj. Kiam ŝi aŭdis, ke ili ambaŭ estas tre feliĉaj, kaj ke ili tre bonfartas, ekmoviĝis envio kaj malfavoro ŝiakore kaj ne lasis pacon al ŝi, ŝi havis nenian alian penson krom tiun, kiel ŝi tamen ankoraŭ povus malfeliĉigi ilin ambaŭ. Ŝia propra filino, kiu esti malbela kiel la nokto kaj havis nur unu okulon, riproĉis ŝin kaj diris: „Fariĝi reĝino, tiun feliĉon meritis ja mi.“

„Silentu“, diris la maljunulino kaj kontentigis ŝin trankvilige, „se estos la ĝusta tempo, mi ja estos ĉemane.“

Kiam tiu tempo venis kaj la reĝino naskis belan princidon kaj la reĝo forestis por ĉasi, la maljuna sorĉistino transfiguriĝis en la ĉambristino, ŝi paŝis en la loĝoĉambron, kie kuŝis la reĝidino kaj diris al la malsanema reĝino: „Venu, la banejo estas preta por vi. Tio bonfartigos kaj freŝige refortigos vin. Rapidu, antaŭ ol ĝi estos malvarma.“

Ankaŭ ŝia filino ĉeestis, ili portis la malfortan reĝinon en la banĉambron kaj metis ŝin en la kuvon. Poste ili riglis la pordon kaj forkuris. Sed en la banĉambro ili ekbruligis inferecan fajron, tian, ke la bela juna reĝidino baldaŭ devis morti.

Kiam tio estis plenumita, la maljunulino prenis sian filinon, surmetis kufon al ŝi kaj metis ŝin en la liton, sur la lokon de la reĝino. Ŝi ankaŭ donis al ŝi la figuron kaj la aspekton de la reĝino, nur la perditan okulon ŝi ne povis redoni. Sed, por ke la reĝo ne rimarku tion, ŝi devis kuŝigi sin sur tiun flankon, kie ŝi ne havis okulon. Vespere, kiam la reĝo venis hejmen kaj aŭdis, ke principeto estas naskita, li ĝojis elkre kaj volis paŝi al la lito de sia kara edzino kaj rigardi, kion ŝi faras. Jen la maljunulino vokis rapide: „Je ŝia vivo, lasu la kurtenojn fermitaj, la reĝino ankoraŭ ne rigardu en la lumon, ŝi bezonas trankvilon.“

La reĝo retiriĝis kaj ne sciis, ke la malĝusta reĝino kuŝas en la lito.

Sed kiam estis noktomezo kaj ĉiuj dormis, vidis la vartistino sidanta en la infanĉambro apud la lulilo kaj kiel ununura ankoraŭ ne dormanta, kiel malfermiĝis la pordo kaj enpaŝis la ĝusta reĝino. Ŝi prenis la infanon el la lulilo, metis ĝin sur brakon kaj mamnutris ĝin. Poste ŝi skuadis la kuseneton, remetis la bebon en ĝin kaj kovris ĝin per la kovrotuketo. Sed ankaŭ la kapreoleton ŝi ne forgesis. Ŝi iris en la angulon, kie ĝi kuŝas kaj mankaresis ĝian dorson. Poste ŝi eliris tute silente el la pordo kaj la vartistino demandis je la alia mateno la gardistojn, ĉu iu en la nokto iris en la kastelon. Sed ili diris, ke ne, ke ili ne vidis iun.

Tiel ŝi envenis multajn noktojn kaj neniam diris vorton dum tio; la vartistino vidis ŝin ĉiam, sed ŝi ne kuraĝis rakonti tion al iu alia.

Kiam pasis certa tempo, la reĝino komencis paroli en la nokto kaj diris:

„Kion faras mia infano, kion faras mia kapreolo?“

Nun mi ankoraŭ revenos dufoje kaj poste neniam plu.“

La vartistino ne respondis al ŝi, sed kiam ŝi denove estis malaperinta, ŝi iris al la reĝo kaj rakontis ĉi tion al li.

Jen diris la reĝo: „Ve, dio, kio estas tio! En la sekva nokto mi gardos la infanon.“
Vespere li iris en la infanĉambron, kaj noktomeze la reĝino revenis kaj diris:
„Kion faras mia infano, kion faras mia kapreolo? Nun mi revenos ankoraŭ unufoje kaj poste neniam plu.“

Kaj tiam ŝi vartis la infanon tiel, kiel ŝi kutime faris, antaŭ sia malapero.

La reĝo ne kuraĝis paroli al ŝi, sed li gardis la infanon ankaŭ en la sekva nokto.

Ŝi parolis denove:

„Kion faras mia infano, kion faras mia kapreolo? Nun mi ankoraŭ revenis lastan fojon, sed poste neniam plu.“

Jen la reĝo ne plu povis reteni sin kaj saltis al ŝi kaj diris:

„Vi povas esti neniuj aliaj krom mia kara edzino.“

Kaj ŝi respondis: „Jes ja, mi estas via kara edzino kaj rericevis en tiu ĉi momento la vivon pro la graco de Dio.“

Kaj ŝi estis freŝa, ruĝvanga kaj sana.

Poste ŝi rakontis al la reĝo pri la fiago, kiun la malica sorĉistino kaj ŝia filino krimis je ŝi.

La reĝo ordonis konduki ilin ambaŭ antaŭ la tribunalon, kie oni eldiris la verdikton al ili. La filinon oni kondukis en la arbaron, kie sovaĝaj bestoj disŝiris ŝin. Sed la sorĉistino oni metis en fajron kaj ŝi devis mizere forbruli. Kaj kiam ŝi jam fariĝis cindro, transformiĝis la kapreolido, rericevante sian homan figuron. Kaj Fraĉjo kaj Fratinjo denove kunis kaj vivis feliĉe ĝis ilia fino.

Originalo: Brüderchen und Schwesterchen

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, el donejo Reclam, „Brüderchen und Schwesterchen“



elgermanigis Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser (Germanio)

lingve kontrolis Vladimir Türk

Chiung Yao (1938-)



*Chiung Yao estas moderna verkisto de
Tajvano, Ĉinio*

En profunda korto (8)

(esperantigis **Vejdo**)

aŭtorino, Chiung Yao

Ĉirkaŭ 15-a aŭ 16-a de monato laŭ luna kalendaro. La luno estis kaj ronda kaj granda. La tuta kaduka ĝardeno, la ruino, la fera pordo kaj la rompitaĵoj estis farbitaj arĝente kaj vualitaj per nereala nebulsimila gazo. Sub la lunlumo la ruino de disfalta domo similis al pentraĵo, al tiu en sonĝo aŭ al nereala vizio. Tamen ĉio tio estis klare videbla. Ĉiu briko, ĉiu tegolo, ĉiu herbo kaj ĉiu arbo tute eksponiĝis en la lunlumo.

Fang Siying malpeze eniris la ĝardenon kun rampantaj herboj en nebula vualo. Ŝi sciis, ke ŝi ne devas ĉi tien veni ankoraŭfoje, sed ŝi venis, denove venis, kvazaŭ senforma forto altirus, puŝus kaj manipulus ŝin, tiel ke ŝi ne povis regi sin. En lunlumo, ŝi tretis sur noktajn roserojn, kaj sur la misteran noktan aeron, kaj ankoraŭfoje eniris la lokon plenan je magio. La malplena ŝelo de la domo staris en lunlumo, pecoj kaj pecoj da rompitaĵoj sieĝataj de sovaĝaj herboj ĵetis siajn ombrojn tie kaj ĉi tie. La rampantaĵoj, kiuj etendis siajn branĉetojn kaj ĉirojn tra fenestroj, similis al la manoj soifantaj al pluvo kaj roso. La du rozoj ankoraŭ disfloris inter sovaĝaj herboj kaj la brila koloro de iliaj floroj, kontraste kun la lunlumo, similis al du gutoj da freŝa kaj ruĝa sango.

Kun molplandumaj ŝuoj sur piedoj, Fang sensone aliris kaj deŝiris rozon kaj enŝovis en botontruon de sia ventmantelo. Surportante kremkoloran longan vestmantelon kaj kun belaj longaj haroj pendantaj, ŝi ne surhavis okulvitrojn, ĉar en tia malluma nokto, okulvitroj utilis neniom. Laŭ la cementa pado en la ĝardeno, ŝi iris rekte antaŭ la ruinon, kie troviĝis kelke da ŝtupoj plene kovrataj de musko. Du dikpezaj kaj antikv-stilaj pordklapoj el sabina ligno nun estis duonmalfermitaj oblikve. Kiam ŝi eniris, ŝi renkontis fridan aeron, tenebran kaj humidan. Farinte

profundan enspiron, ŝi transpasis la rompitaĵajn brikojn, tegolojn kaj trabojn sur la tero. La luno rekte ĵetis la lumon surteren tra la sentegmenta domo. Ŝi rigardis sian ombron sur la rubo, kun flirtantaj longaj haroj kaj vestaĵoj en brizo.

Preterpasinte plurajn rompitaĵajn murojn kaj meblajn kadavrojn, ŝi eniris la estintan ĉambron, kie jam nun la muroj estis falintaj, pordo kaj fenestroj forbruligitaj, planko malaperinta, kaj sovaĝaj herboj senbride kreskis el la fendoj de tiuj meblaj kadavroj. Levante sian kapon, ŝi povis vidi parton de la duaetaĝa planko kaj senpere la brilan lunon sur la ĉielo tra la detruita loko de la etaĝ-planko. Mallevante sian kapon, ŝi vidis duonon da skribtablo forbruligita ĉe fenestro, la skribtablo, kies skulptita rando videbligis ĝian antaŭan luksan rafinitecon. Ŝi aliris kaj subkonscie etendis sian manon por eltiri la tirkeston. Ĉu ŝi volis trovi, kio troviĝis en ĝi? Ŝi mem ankaŭ ne sciis pri tio. Pro longtempa neuziteco, ĝi ne cedis, sed ŝia eltiro faligis la tutan skribtablon, eligante laŭtan sonon, pro kiu ŝi desaltis timigita. Kiam ĉio ĉirkaŭ ŝi ree kvietiĝis, ŝi reprenis trankvilon el la timo. Subite ŝi trovis, ke kuŝas malgranda kajero sur la brikoj malantaŭ la falinta skribtablo. Ŝi aliris kaj levprenis ĝin, kies angulo estis forbruligita kaj restaĵo ŝimiĝis pro humideco. Ĝia nigra kovrilo montris, ke ĝi estis notlibro. En lunlumo, malfermite ĝin, ŝi ne povis ĉifri tiujn vortojn skribitajn per plumo, kiuj dissolviĝis pro humideco, por ne paroli pri delikata malgrandeco de tiuj vortoj. Ŝi enmetis la kajeron en la poŝon de sia ventmantelo, kaj turninte sin, volis foriri, sed subite ŝi haltis.

Ŝi aŭdis klarajn paŝojn direktiĝi renkonte al ŝi. Kun pli rapidiĝantaj korbatoj, ŝi volis forkuri de ĉi tie, sed ŝi ne povis moviĝi, kvazaŭ firme najlita sur la tero. Starante, ŝi apogis sin al la muro kaj kaŝis sin en la ombron ĉe murangulo. Ŝi aŭdis sonojn de stumblado kaj murmuradon de monologo. Tuj poste ŝi vidis lin, kies maldika kaj longa figuro staris en lunlumo, kiu briligis la oraĵon tegitan sur lia lambastono. Ŝi eligis faciligitan elspiron. Tio ne estis monstro nek fantomo. Tio estis li — Bai Peiwen, kiu denove venis por serĉi la spiriton de sia edzino. Ŝi nereteneble longe elspiris, kio lin surprizis. Li rapide faris du paŝojn antaŭen kaj vane etendis siajn manojn, urĝeme kriante, “Kie vi estas, Hanyan?”

Ne, ne, mi ne ludas tian rolon! Pripensante, ŝi moviĝis al alia rompita muro. Mi devas foriri, tuj foriri, kaj mi ne povas ludi la rolon de spirito.

“Respondu al mi, Hanyan!” li ordone kriis mallaŭte. Li daŭrigis antaŭeniron kaj per la mano, kiu ne tenis lambastonon, palpis la aeron ĉirkaŭe. Lia voĉo estis urĝema kaj varmplena. “Mi jam aŭdis vin, Hanyan. Mi scias, ke vi estas ĉi tie. Vi neniel povas forkuri. Respondu al mi, Hanyan, mi petas.”

Fang retenis siajn spirojn kaj restis silenta. Ŝi ne kuraĝis eligi iom da sono kaj nur fikse rigardis la blindulon antaŭ si. En lunlumo, tre klare riveliĝis lia vizaĝo, bruligita de lia fanatika sopiremo kaj turmentita de forta sufero. Pro nerespondo, li

daŭrigis moviĝon antaŭen en ĝusta direkto. Fang trovis, ke ŝi estas jam alpremita al murangulo kaj ke estas tre malfacile por ŝi foriri sensone.

“Parolu, Hanyan, mi petas! Mi scias, ke tio absolute ne estas mia halucino. Vi estas ĉi tie! Hanyan, mia ĉiu nervo scias, ke vi estas ĉi tie! Hanyan, ne estu tiom kruela! Iam vi estis tiom milda kaj bonkora, Hanyan. Mi serĉadas kaj atendadas vin tagnoke, ĉu vi ne domaĝas tion?”

Li alpremis sin pli proksimen. Fang penis moviĝi. Ŝi tretis sur tegolon kaj eliĝis sono de krevado. Pro tio, Bai tuj ekkaptis per mano kaj Fang haste elturniĝis. Li maltrafis. Li haltis, spiregante rapideme kaj neregule. Lia vizaĝo tordiĝis pro sufero. “Ĉu vi evitas min, Hanyan?” Lia voĉo aŭdiĝis ĉagrene kaj triste. “Mi scias, ke vi certe min malamas, ĝisoste malamas. Kion mi povas diri, Hanyan? Kiamaniere mi povus akiri vian pardonon? Dum ĉi tiuj dek jaroj, mi jam sufiĉe suferas, ĉu vi scias? Mia koro, same kiel ĉi tiu forbruligita domo, jam fariĝis ruino, ĉu vi scias? Mi rifuzis operacion al miaj okuloj, ĝuste pro tio, ke mi volas puni min mem kaj mi devas meriti blindecon! Pro kio mi fariĝis blinda antaŭ dek jaroj? Ĉu vi komprenas, Hanyan?” Lia tono aŭdiĝis pli triste. “Pensu, Hanyan, kiel firma kaj memfida mi iam estis. Sed kiel nun? Mi havas nenian volon, sed nur unu deziron kaj unu peton, oĥ, Hanyan!”

Li jam haltis tuj antaŭ ŝi, tiel proksime, ke eĉ lia varma elspiro sentigis ŝian vizaĝon. Ŝi ne povis moviĝi kaj neniel povis moviĝi, kvazaŭ ŝi estus hipnotigita de lia petema kaj suferplena voĉo kaj de lia turmentata mieno. Stupore gapante, ŝi aŭskultis al lia neinterrompanta korverŝiĝo, “Hanyan, se vi volus puni min, ĉi tiuj dek jaroj jam sufiĉas, ĉu ne? Vi estis bonvirta, bonkora kaj fervora, kaj neniam lasis min esti maljuste traktita, sed nun donu pardonon al mi! Mi estas malkaŝe montranta la plej fieran kaj memfidan koron ĉe viaj piedoj, ĉu vi scias? Hanyan, kio ajn vi estas, ĉu fantomo ĉu animo, mi ne plu lasu vin forgliti, neniel!”

Li abrupte etendis sian manon kaj ŝin kaptis. Fang eligis softan ekkriion. Ŝi volis forkuri, sed lia forta mano ŝin tenis. Dejetinte sian lambastonon, li altiris ŝin en sian sinon kaj tuj firme tenajlis ŝin per ambaŭ manoj. Ŝi baraktis el lia virseksa potenca brakumo, sed vane. Ŝi do ĉesis moviĝi kaj pasive staris tie, rigardante lian ferocan, ekstazan kaj masklan vizaĝon.

“Oho, Hanyan!” li kriis mire, karesante ŝiajn vangojn kaj harojn per la mano. “Vi estas varma, sed ne frida kiel la spiritoj. Vi ankoraŭ havas tiajn longajn harojn, via tuta korpo ankoraŭ elspiras la aromon de rozoj, ho!” li voke kriis. Lia voko vringiĝis el lia interno, tiom varma kaj suferplena. La okuloj de Fang estis nebule malsekigitaj de larmoj kaj sur ŝiaj vangoj rulis du larmgutegoj, kiujn li jam tuŝis. Li sonĝece murmuris, “Vi ploras, Hanyan, ĉu? Vi ploru, Hanyan, vi rajtas plori. Estas mia kulpo. Mi lasis vin havi sufiĉe da suferoj kaj ofenditeco. Hanyan, ploru laŭ via volo, laŭ via

volo!”

Fang vere plorsingultis. Ŝi ne povis elteni ĉion ĉi tion, kio tuŝis ŝiajn inksan kaj plej malfortajn nervojn. Ŝi vere ploris, ĉagrene kaj afliktite.

“Ho, ploru, mia etulineto! Hanyan, mia etulineto, ploru!” Li daŭrigis, “Mi nur petas, ke vi ne fumece malaperu el mia brakumo. Se tiel, mi mortos. Aĥ! Aĥ, Hanyan!” Li ŝovis siajn lipojn al ŝia vango kaj komencis suĉi ŝiajn larmerojn. Lia tremanta, retenita kaj malklara voĉo daŭre sonis, “Ĉu vi ne malaperos, Hanyan? Ĉu ne? Vi ne fariĝos tiom kruela. Ho, ĉielo! Kian ĝojegon mi havas nun, kian ĝojegon!” Tuj poste liaj lipoj subite glitis al la ŝiaj. Li firme alpremis sin al ŝi kaj firme ĉirkaŭprenis ŝin. Liaj lipoj fajre varmaj kaj furioze insistaj prezentis lian postulemon el la tuta animo. Ŝi ne povis spiri nek pensi nek rezisti... Ŝi sentis molecon kaj malfortecon tra la korpo; ŝia penso vagis malproksimen; ŝiaj piedoj ŝajnis treti sur nuboj, senforte kaj leĝere. Aŭtomate ŝiaj brakoj ĉirkaŭprenis lin je la kolo. Kun fermitaj okuloj, ŝi lasis larmojn flui sur ŝiaj vangoj. Ŝi mallaŭte ĝemis, fandiĝante en vizian kaj sonĝecan senton. Subite ŝi surprizite reprenis sian konscion kaj sentis atakon de frosta tremo tra sia spino. Kion ŝi faras nun? Kial ŝi lasas lin preni ŝin por la spirito de Hanyan? Kun ekstremo, ŝi abrupte rektigis sin kaj tuj forpuŝis lin plenforte. Anhelante, ŝi retiris sin flanken kaj palpis sian vojon al breĉo de rompita muro. Vidante, ke li sin alĵetas al ŝi, ŝi tuj transgrimpis la breĉon kaj, eliginte mallaŭtan ekkriion, ŝi per ĉiuj siaj fortoj forrapidis, kvazaŭ forfuĝante de la plago, eksteren de la ĝardeno. Ŝi aŭdis lin freneze kii malantaŭ ŝi, “Hanyan! Hanyan! Hanyan!”

Ŝi kuradis per ĉiu siaj fortoj tre malproksimen kaj ankoraŭ aŭdis lin disŝire kriegi, “Hanyan, revenu! Hanyan, revenu! Hanyan, revenu!”

Kurinte ĝis la ĉefa pordo de Domo Bai, ŝi elpoŝigis ŝlosilon al la flanko pordo kaj malfermis ĝin, kun tremantaj manoj, furiozaj korbatoj kaj konfuzita kapo. Enirinte, ŝi rapidis al sia ĉambro tiel hasteme, ke ŝi preskaŭ frapis sin kontraŭ viro. Ŝi haltis kaj levinte sian kapon vidis maljunan You, kiu estis levprenanta la ruĝan rozon falintan de sur ŝi.

“Fraŭlino Fang, via rozo!”

Dirante, li transdonis al Fang la rozon. Ŝi ĵetis rigardon al li, kies rigardo estis akra kaj eslorema. Hasteme preninte la rozon, ŝi demandis, kvazaŭ kaŝante ion, “Ĉu vi ankoraŭ ne enlitiĝis?”

“Mi atendas sinjoron Bai. Li ankoraŭ ne revenas.”

“Ho,” ŝi eĥis. Kun la rozo en la mano, ŝi rapidis en la domon, ankoraŭ sentante, ke la akra rigardo de maljuna You longe fiksiĝas sur ŝia dorso.

Suprenirinte, kiam ŝi eniris sian ĉambron, ŝi eksentis sin senforta kaj emis kolapsi. Ferminte la pordon, ŝi faligis sin peze sur la liton kaj kuŝis senmove longan

tempon. Poste ŝi sidiĝis kaj malrapide demetis siajn ventmantelon kaj ŝuojn. Sur ŝiaj vestoj kaj ŝuoj ankoraŭ algluiĝis herberoj el Hanyan Bieno, kaj la rozo jam ĉifiĝis en eretojn. Surhavige la piĝamon, ŝi sin kuŝigis, sed ŝi ne povis trankviligi sin pro konfuzita koro. La kiso, kiun li lasis sur ŝiajn lipojn, ankoraŭ klare sentebliis. Krome, ŝi eĉ trovis, ke ŝi ne abomenas tiun kison, sed male ke ŝi konstante havas ravitan, suferplenan kaj suplan senton. Ŝi ne ŝatis tiun senton, ĉar ĉiu nervo de ŝia animo havis pikdoloron—subpremitan, kontraŭdiran kaj afliktan pikdoloron. Ŝi ne aŭdis la sonojn de lia reveno al lia ĉambro. Ĉu li ankoraŭ faras vanan priseĉadon sur la ruino? Sur la tenebra, trista kaj malhele frida ruino! Ŝi ŝajne viziis lian figuron kaj malgrasajn kaj petemajn manojn etenditajn al la ĉielo. Palpado kaj palpado, vokado kaj vokado, priserĉado kaj priserĉado... Sed, kie estas lia Hanyan? Kie finfine?

Ŝi algluis sian vizaĝon al siaj manplatoj. Kiel suferplena kaj aflikta sopiremo! Kial li ankoraŭ ne revenas? Tie malvarmas la rosoj sur la verda musko kaj atake blovas nokta vento. Kial ankoraŭ ne reveni? Ŝi subite memoris pri la nigra kajero. Ŝi elprenis ĝin el la poŝo de sia ventmantelo kaj ĝin malfermis. La vortoj en ĝi estis apenaŭ rekoneblaj. En la lamplumo, ŝi zorgeme ĝin pririgardis. Ĝi estis simpla notlibro, en kiu skribiĝis sporadaj aferoj kaj hazardaj pensoj:

La 5-an de junio

Hodiaŭ ni komencis pluki tefoliojn. Tiuj kolektantaj knabinoj kantis belvoĉe ekster la fenestro.

La 8-an de junio

“Ŝi” denove venis ĝeni min. Mi sentas suferojn en la koro. Mi ne scias, kion fari. Mi absolute ne lasas Peiwen sciigi pri tio. Mi pensas, ke mi... (La sekva parto estis forbruligita.)

La 11-an de junio

Mi decidis skribi iom. Ofte mi havas malbonaŭguran senton. Mi devas noti multajn aferojn.

La 12-an de junio

Tutage Peiwen laboris en la fabriko. “Ŝi” puŝas mian spiriton al la rando de disrompiĝo. Gao propraokule vidis ĉion. Li diris, ke li volas sciigi ĉion al Peiwen, sed post mia petema persvado, li promesis ne fari tion.

La 15-an de junio

Tutage Peiwen restis hejme, kaj mi helpis al li ordigi la kontojn de la fabriko. Mi ne volas, ke li forlasu min. Mi amas lin! Mi amas lin! Mi amas lin!

La 17-an de junio

Mi devas noti tion. Mi devas... (La sekva parto estis forbruligita.)

La 18-an de junio

Gao insistis, ke mi ne vivu tiel. Li ekscitite diris, ke Peiwen estas stultulo kaj

blindulo.

La 22-an de junio

Mi emas freneziĝi. Mi pensas, ke mi certe freneziĝos. Hodiaŭ “ŝi” pridemandis min pri informoj de miaj prapatroj, sed mi ne povis parkere citi. Ah!

La 24-an de junio

Mi esperas, ke Peiwen ne estu tiom okupita, mi ja esperas! Por Peiwen, mi povas oferi ĉion, ĉion!

La 25-an de junio

Kiaj tagoj! Peiwen, vi ne devus riproĉi min. Mi jam suferis tiom multe, ĉu vi ankoraŭ min riproĉas? Peiwen, kiel kruela vi estas, kiel kruela, kiel kruela! Mi ploradis la tutan tagon. “Ŝi” diris al mi... (La sekva parto estis forbruligita.)

La 26-an de junio

Gao akompanis min la tutan tagon, timante, ke mi volas mortigi min.

La 29-an de junio

Mi decidis verki iom, kiel etan libron. Mi volas noti ĉion pri mi kaj Peiwen.

La 30-an de junio

Mi komencis verki. Ĉio iras glate.

La 5-an de julio

Mi sentas min tre laca, kaj mi iom febras hodiaŭ.

La 8-an de julio

Mi povas senti, ke tempesto estas alvenonta, kaj krome Peiwen forestas de la hejmo. Mi okupiĝas pri verkado super la tablo tuttage. Ĉe vesperiĝo, subite... (La sekva parto estas forbruligita.)

La 9-an de julio

Vere! “Ŝi” faris ĝenon denove... Ho, la ĉielo! Hodiaŭ torentas pluvo. Ke Peiwen iris al la fabriko, mi ne povis elteni tion. Mi kuris eksteren en pluvo kaj malsekiĝis. Gao revenigis min hejmen.

La 20-an de julio

Post malsaniĝo, mi aspektas enue kaj mallaboreme. Peiwen ne estas tiom komprenema al mi, kaj pro tio mi ekhavas rompitan koron.

La 22-an de julio

Malforta tra la tuta korpo, mi havas nek klaran vidon nek koncentrigeman atenton. Kvankam mi volas verki, mi tamen ne havas forton por fari tio, kion mi volas. Gao persvadis min al ripozo, asertante, ke mi estas morte pala kaj marasma.

La 25-an de julio

Mi daŭrigis verkadon. Tre laca.

La 26-an de julio

La bebo estas naskota dum la dua tagdeko. Mi sentas doloron en la tuta dorso

tuttago. La kuracisto diris al mi, ke mi havos malfacilan akuŝon pro mia malforta korpo.

La 27-an de julio

Estas varmege kaj la suno brulas. “Ŝi” ordonis al mi legi al ŝi la libron *Historio de Sinjorino Diao*. Mi ne scias, kion ŝi volas (La sekva parto estas forbruligita.)

La 28-an de julio

Mi svenis kelkfoje. Gao venigis kuraciston. Mi petis, ke li ne diru tion al Peiwen, ĉar tiu vere estas okupita. Tio ne estas lia kulpo.

La 30-an de julio

Febru kaj soifa, mi staras ĉe la sojlo de morto. Mi devas finverki la libron. Ho, la ĉielo! Mi ne volas morti.

La 31-an de julio

Peiwen kaj Gao kverelegis. Ĉu Peiwen kredas tiujn vortojn? Mi penis ellitiĝi por verki, sed mi falis pro mia malforteco.

La 1-an de aŭgusto

Kiajn vertiĝon kaj vizion mi havas! Peiwen, ne forlasu min! Peiwen, mia amo, mia koro, mia mondo!

...

Ŝi abrupte fermis la notlibron kaj ne volis legi plu. Tiuj fragmentoj kaj nekompletaj notoj dolore tordis ŝian koron kaj vringis larmojn el ŝiaj okuloj. Enŝlosinte la notlibron en tirkeston de la lit-tableto, ŝi reiris al la lito kaj kuŝigis sin. Ŝi aŭskultis kun streĉitaj oreloj, kaj Bai ankoraŭ ne revenis. Nur la pinoj kaj bambuoj sur la deklivo eligis softan kaj plendeman murmuradon.



(daŭrigota)

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



Por la trikvaronjarcenta naskiĝtago

*(Kun sincera danko al ĉiuj geamikoj, kiuj kortuŝis min
per sinceraj gratuloj kaj bondeziroj.)*

poeto, Mikaelo Bronŝtejn

La datoj de mia vivo estas por mi unikaj.
La gravajn mi ja atendas, revante ĝisvivi.
Memoras ilin parencoj kaj vi, la bonaj amikoj,
samkiel mi en la kapo gardas memoron pri vi.

Sed, damne, galopas jaroj de l'vivo tute senbride,
hieraŭ mi havis kvindek, hodiaŭ – jam sepdek kvin!
Mi ne ploretu pro tio, renkontu mi l'daton ride,
ĉar ĉiu tag' donacita de l'sorto ĝojigas min.

Mi trotu plu laŭ la pado, kiun mi iam elektis,
eĉ se ĝi estas danĝera, laciga, serpente kurba.
Mi faru plu la aferojn kiujn mi mem enplektis
en revojn de mia vivo, bonŝance ja, ne tro kurta.

Mi levu hodiaŭ glaseton kun bona vino je bona sano
kaj la bondezirojn amikajn akceptu kun kora danko,
ĉar ĉiam sentante subtenon de varma amika mano,
komprenas mi, ke la viv' estus mava ĉe ties manko.

La vivo
Novjara aranĝo.
Rigard-interŝanĝo.
Subita stultiĝo.

Interkonatiĝo.
Parolo pri l' ŝato.
Tostad'. Bruderŝafto.
Invito. Hezito.
Anima kolito.
Bukedoj. Bombonoj.
Ofendoj. Pardonoj.
Promen'. Diskoteko.
Kunkuŝo. Kunveko.
Vojaĝo. Foiro.
Kverelo. Foriro.
Fejsbuko. Paciĝo.
Renkonto. Kuniĝo.
Ĝemeloj. Kredito.
Rutino. Kolito.
Riproĉoj. Tolerero.
Disput'. Ekkolero.
Kokrad'. Reciproko.
Kunvivo. Kunmoko.
Dum jaroj la samo.

La vivo
Novjara aranĝo.
Rigard-interŝanĝo.
Subita stultiĝo.
Interkonatiĝo.
Parolo pri l' ŝato.
Tostad'. Bruderŝafto.
Invito. Hezito.
Anima kolito.
Bukedoj. Bombonoj.
Ofendoj. Pardonoj.
Promen'. Diskoteko.
Kunkuŝo. Kunveko.
Vojaĝo. Foiro.
Kverelo. Foriro.
Fejsbuko. Paciĝo.
Renkonto. Kuniĝo.

Ĝemeloj. Kredito.
Rutino. Kolito.
Riproĉoj. Tolerero.
Disput'. Ekkolero.
Kokrad'. Reciproko.
Kunvivo. Kunmoko.
Dum jaroj la samo.
Ĉu amo?

Ĝibiĝanta enĝardene
inter ajloj, cepoj, fragoj,
loniceraj kaj brasikoj,
plure mi bedaŭras ke ne
venas pluv' dum pluraj tagoj
kaj la bedoj ĝemas sekaj.

Soifanta, ĉevespere
min suferas vokas ter', do
en ĝardenon mi impetas,
ĉar necesas dumsomere
preni hoson por aspergo -
miaj plantoj akvon petas.

Iam fajfis mi pri plantoj,
vojaĝante kun gitaro
en Eŭropo, en Azio...
Ne plu nun naskiĝas kantoj,
pene pelas jaron jaro,
ŝajnas ke ŝanĝiĝis ĉio:

ne la venkon de la lingvo,
la elvivon oni traktas
pesimisme kaj senpene,
kvazaŭ la fraŭlina lino
kontraŭ maljuniĝ' baraktas
spite la komprenon ke ne

ŝminko gravas, sed humoro
vivdeziro, optimismo,
kaj impet' al ĝusta pado...
En varmego mia koro
taksas ĉion tra la prismo
de ĝardena aspergado. ※

Eto (Ĉinio)

Mi havas propran liberecon

mi kaŝas min
en la koro
mi dancas
en mia koro
mi ĝuas diboĉan vivon
la plej senĝenan
sendepende de
beleco kaj hideco
nur mi sola
aprezas la florojn
pompajn en mia cerbo
diverspozajn kaj buntajn
la maro vasta
kaj senlima
ondadas bele
kaj pretas sinki
kune kun la suno
en mia koro
libere irante tra
mia tuta korpo
al la loko
je nur unu colo
al mia koro
la arbaro nebulas
en nuboj kovrantaj
la stepo estas
mia lasta
ripozejo

Vento en majo

konata gusto
konata voĉo

maturiĝas la semoj
en ŝvito
donu venton
al la sunlumo
la lingvaĵo de
malsato plendas
pri la labora peno

la vento ellernis
belajn versojn
ĝi montras sin
paradema
antaŭ niaj okuloj
mi neniel
forĝegas la fuguron
en la vento
kun disverŝitaj
ŝviteroj
mi klinas min
por levpreni spikojn
kiuj estas feliĉo
de espero
la vivo komencas
tiamaniere
ni amu do
nian vivon

malgraŭ la tempo
forpasinta longe
ni prenas penikon
ĉiam en nia mano
por pentri
iomon kaj iomon
en nia vivo
sunlumo vekigās
ĉiam de nia voko

kun cigaredo bruligita

ĉe la buŝo
 mi spektas
 la venton kuri
 super la tritikaj ondoj
 en la sunlumo
 malhele orflava
 kiu similas al
 belaj dancĉuoj
 premante kurbe
 la kapojn
 alte levitajn
 ridsonoj de feliĉo
 en la kampoj
 disvastiĝas lante
 lante...



VENTO EN MAJO LA KONTRA VENTO LA SEMO LA VENTO
 VENTO EN MAJO KONATA GUSTO MANJURA LA SEMO LA SE SEMO
 A LINGVAJO DE MALVAPATO DO PLENDAS PRI LA LABORA PEN

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



poetino, Rita Mkrtĉjan

Aŭtuno

1.

Sopiras ni, ke akompanis aŭtunon,
“Ŝi” forveturis por la tuta jar',
La nuboj grizaj kaj ĉielo larmas,
Pro la folioj ene lignofajr'.

Ni ne bruligu la foliojn aŭtunajn,
Folioj oraj - signo de la temp',
Ni gardu en memoro karajn bildojn,
-Ĝis la revido- audiĝas en la vent'.

2.

Ne estas aŭtun' ĉagreno,
Ne estas aŭtun' silent'.
Kun vento kantas aŭtun' vespere,
Fenestron batas per la pluvo en maten'.

Ĝojigas la rigardon buntaj farboj,
Rondiĝas folietoj en aer'.
Subskribas aŭtuno per literoj oraj:
Disiĝo, renkontiĝo kaj esper'!

3.

Brakumu min, la aŭtuno,
Ni ofte iĝas tre malfortaj,
Vi kantu vian tristan kanton
Kaj diru poezian vorton.

Vi ploru per la pluv' abunda
Vi krii per la brua vento,
Anim' vundita vin alvokas

Vi kvietigu miajn sentojn.

Sur vangoj - via frosta spiro,
Aromo de sopiraj floroj,
Brakumu min, la aŭtuno,
Ne lasu en soleco koron.

Kiel amiko el juneco
Vi fremda estas kaj la sama
Vi helpu min, la aŭtuno
Espero lasta, lasta amo.

4.

Somero "pakas la valizojn",
Senforta varmo de aŭgusta suno,
Somero estas nia "eta vivo",
Sed mi atendas aŭtunon!

Ĉielo blua, ter' floranta,
La mar' karesa, la ripoz', sunbruno,
Feliĉaj kaj liberaj tagoj,
Sed mi atendas aŭtunon!

Esperoj dum la tuta jaro,
Someraj rondoj, dancoj kune,
Pardonu min, somero gaja,
Sed mi pli ŝatas aŭtunon!

La vento, tondro, uraganoj,
Diluvo - kiel Dia puno,
Sopiro, senreviĝo, larmoj,
Sed mi tre ŝatas aŭtunon!

5.

La pluv', silento kaj sopiro
Senmovaj arboj enpensiĝis,
Pri kio pensas la folioj
La spuroj oraj antaŭ foriro?

Kaj iu fotas sub la pluvo
Belecon de natur' magia,
Ĉu aŭtun' trapasas, aŭ vivo?
Esperoj, revoj, atendado nia.

En regno vintra - montojn neĝajn
Nebulo kovris, sed ĉi-tie
La adiaŭ' de aŭtuno
Sur mano kuŝas la folio.

Pasanto daŭrigas foti
Pro pluvo frostas, pro malvarmo,
Neni' komprenas, kion fotas
Ĉu aŭtunajn aŭ siajn larmojn...

6.

Ni iomete pli ŝanĝiĝas aŭtune,
La ĝojo kaj malĝojo pro forir',
Folioj buntaj ion memorigas,
En la aero kaj animo - la demandoj kaj sopir'.
Folio ĉiu "kolorigas" niajn sentojn,
Promesas bonon aŭtuna kant',
Invitas danci arbojn, aŭtuna vento,
La vento de espero, de feliĉ', de atendad'!

Aŭtuna folieto

memorante amatan novelon de O. Henri

Folio verda sur la branĉ' de arbo
Ekĝojis pro la lasta suna bril',
Naturo kvietiĝis en atendo,
Sentebla estis norda spir'.

Folion ne timigis frosta vento
Ĝi revis resti dum monatoj, ĝis somer',
Ekvidi vintron, kapti blankan neĝon,


Ne morti kun aliaj sur la ter'.

Nerimarkeble pasis tempo,
Silento neĝa regis en ĝarden',
Solecon sentis folieto,
Ĝi rememoris kun ĉagren'

La trilon, gajan, viglan de birdetoj
La farbojn de somera mond',
Amuzan bruon de folioj,
La dancon de petoloj en belega rond'.

Folio malvarmiĝis sur la branĉo,
Neĝeroj brilaj valsis en aer',
Dormetis arboj sub kovril' lanuga,
Malhela iĝis suno en ĉiel'.

Kaj ne rimarkis eble piedirantoj,
Ke preterflugis eta siluet'
Malsupreniĝis kun glaciaj larmoj
De aŭtuno lasta foliet'.



Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



poetino, Maria Nazaré Laroca

Trairado

Dum la vojaĝo de l' vivo
multaj estas trompitaj
de la ruzeco de l' pado,

Ĉar la vojo estas longa:
ĉiam transiranta supren,
ĉu oni volas aŭ ne.

Tamen, vojeto mallonga
estas negrava detalo,
kvazaŭ tranĉo de l' sorto.

Oni bezonas trairi
la tutajon de la vojo;
ĉu en sonĝoj de flugo,
aŭ eble inter la dornoj,
kiuj minacas l' irejon.

Pasaĝeroj de l' eterno,
ni estas vagantaj lumoj,
al ĉiel' aŭ infer' strebe.

Karnavaligo

Malkvieta palimpsesto
iras mi sur plac' publika .
Sur mia korpo tramarŝas
ebriaj pridubaj vortoj
liberigitaj el vortaro.

Versoj skribatas silente
ĉe l' necerteco de l' horoj;
jen liturgio kristnaska
senkonsidere al bardo:
pergamen' melankolia.

Tago de l' Negra Konscienco

Imite al Nietzsche, malhumanas,
tro malhumanas, sklaviganta homo
ekde l' prahistoriaj tempoj
de la krudfreneza homaro.

Nin hontigas sklavig', kaj ĝi
Brazilon fratan humiligas.
Ĉu kompensas pardonpeti?

Penso

Novembras kaj mi pensas,
ke l'estad' en la mondo
ekziston ne signifas.

La senco de la vivo
estas la viv' de l' senco,
kiu loĝas en ni,
nin subtenas kaj movas.

Nepleneco

Kvankam en la dia menso,
kompleta jam estas mi,
mia konstruata anim'
malnet' ankoraŭ fariĝas
ja en mia nuna tempo.

Skizo el ŝtono kaj lumo,

ĉiutaga maltrankvil',
konstruas pacon serĉatan
ĉe l' poezio de l' vivo.

Sankta Francisko

En la ĉi-egocentra mondo
ĉu humileco vereblas?
Lumo, el la humo de l' tero,
grandeco de l' maro sub
la fluej' de l' riveroj?
Do ni memoru Franciskon,
La poverello el Asizo.

Thérèse de Lisieux

Antaŭ cent dudek jaroj,
la 30-an de septembro,
Thérèse de Lisieux,
nia Sankta Terezinjo,
24 - jara knabino,
transloĝiĝis Ĉielen.

Violo el lumo,
portante la majestatan
transcendecon de l' rozo,
ŝi instruis l' amon al Dio
per etaj neniaĵoj,
teksitaj per la parfumo
de sia simpleco.

Ho, anĝelo feliĉega,
ankaŭ al ni lernigu
kompreni kaj akcepti
nian homecon dian!

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



poeto, Yi Qiao

Aforismoj

La korpon vundas
ekscesa ekstazo kaj
penson inundas.

L' anim' serenas
ĉe regula meditat'
kaj viglo plenas.

Koro infana
ne ankoraŭ vulgaras
kun anim' sana.

Signifon vidas
ni de la vivo, se ni
veron avidas.

Ne daŭras virto,
se oni arogantas
kun fier-flirto.

Tuja retreto
en senelirejo 'stas
saĝa dekreto.

La donacemo
estas karmplena kiel
kultiva semo.

La verda stepo

La verdstepo en nordokcidento,
por juneco nia jen deĵoras.
Tie ĉiam flosas freŝa vento,
mi pasinton ofte rememoras.

Fore staras alte blua monto,
birdoj sor flugilojn gaje svingas.
Tra kamparo lirlas klara fonto,
florarmaro al ĉiel' atingas.

Tie ŝvebis via milda kvero,
mia kor' batadis jam ekstaze.
Korinklinaj tiam kun sincero,
ni pasie kisis laŭokaze.

Tuj jardekoj estas jam pasintaj,
sed resonas ĉiam ridoj tintaj.

Flugiloj de printempa vento

Perflugiloj de printempa vento,
tra l' ĉiel' mi vagas kun novsento.
La arbaro vastas jen susure,
dum zefiro flirtas nun murmure.

Rojoj lirlas en valo zigzage,
kaj kukoloj trilas ĉiutage.
Henas ĉevaloj sur fora stepo,
ŝafoj migras kiel nuba ŝvebo.

Jen la dista maro onde muĝas,
dum levanta l' suno glorie ruĝas.
Al lontana monto mi tuj soras,
kaj l' junecon oran rememoras.

Brizo ŝvebas lante idilia,
mia koro trancas jam ebria.
Sekve d' armistico laŭracie,
flugos packolomboj sunradie.

La plej proksima al paradizo

Jen Tibeto, tegmento de l' mondo,
Everesta krutas la neĝmonto.
Tibetanoj vivas laŭ antikva voko,
kaj estas fieraj pri sia hejmloko.

Ili fartas simple sen riĉeco,
tamen kredas je budhisma deco.
Morto ne estas timinda efektive,
reenkarniĝ' okazas definitive.

Jen platform' de Entombig' Ĉiela,
korpstumpoj iĝas almoz' modela.
Vulturaro plonĝas al festeno,
l' animoj savitas en soleno.

Soras al ĉiel' anim' libere,
tuj reenkariniĝas laŭprefere.
Kun memoroj de antaŭa vivo,
komenciĝas nova cikl' en drivo.

Jen la plej proksima lok' al paradizo,
oni kondukas laŭ Budha organizo.

Stelplena ĉielo

Mi rigardas alten la ĉielon
rememore la Eden-fabelon.
Palpebrumas steloj jen mistere
dum la lun' serenas nun tenere.
Briz' susuras flirte tra vespero
kvazaŭ flustro ame en etero.

Vasta la spacego ja senlimas

kaj eterna lumo glorie glimas.
Serĉas mi arkanon d' universo
kun konscio sankte en disperso.
Batas nun flugilojn la anĝeloj
inspirante nin kun di-rivelejoj.
Mia koro batos plue

Ĉiun nokton en la sonĝoj
mi vin vidas kaj vin sentas,
tiel scias mi, ke vi ĉeestas.

Transpasinte la distancon
kaj vast-spacojn inter ni jam,
vi venintas montri, ke vi ja alestas.

Diste aŭ proksime, kie ajn vi estas,
kredas mi, ke l' koro batas ja plu.
Vi denove jen malfermas pordon,
kaj en mia koro vi ĉi tie estas,
kaj la koro mia batos plu kaj plu.

Amo povas tuŝi nin jam unufoje
kaj dum tuta vivo plue restas,
kaj neniam velkas nur ĝis ni foriros.

Amo estis kiam mi vin amis
ĉe la ĝusta tempo, kiun mi kaptintis,
mia-vive ĉiam ni antaŭen iros.

Timas mi nenion, dum vi apudestas,
scias mi, ke l' koro mia batos plu.
Ni por ĉiam kune restos tiel,
en la koro mia vi sekura estas,
dume mia koro batos plu kaj plu.

— *Liriko „My heart will go on“ de Will Jennings, melodio de James Horner,
prezentado de Celine Dion, esperantigis Yi Qiao.*

Erika Godó (Hungario)



poetino, Erika Godó

Ke vi ĉiam restu kiel infano

Ke vi ĉiam restu por infano,
kiu havas senkulpan animon.
Kiu ankoraŭ kredas je viaj revoj,
kaj ne konas la kruelan realon.
Kiam la suno brilas aŭ vi vidas belon,

miru pri ĉio bela kaj bona en la vivo.
Ke vi ĉiam restu por infano en via koro,
kiu vidas la mondon feliĉo kaj paco.
Konservu ĉi tiun miraklon en vi mem,
tiel longe kiel vi vivas sur ĉi tiu mondo.

Koloraj inkoj

Buntaj inkaj gutoj dancas sur la papero,
ili ŝprucigis inkon subite iĝis belaj bildoj.
Ili brilas kiel veraj perloj en perlamoto,
ili flugas sur la flugiloj de niaj pensoj.
Blua inko pentras la altan ĉielon blua,
kaj ĝi kolorigas senfinajn oceanojn kaj marojn.
La vento pentras sonĝojn per ruĝa inko,
al la magia unika tolo de la ĉielo.
Niaj plumoj kaj brosoj estas magiaj,
ili enspiras vivon al la malsamaj koloroj.
La riĉeco de iliaj koloroj kreas miraklojn,
la pinto de plumo aŭ peniko estas kiel sorĉisto.

Literoj

La danco de literoj kaj vortludoj sur papero.
Kaŝitaj mesaĝoj priskribas la magion de lingvo.
Simplaj literoj parolas pri multaj aferoj.

Ili formas penson kaj esprimas belecon.
Sen literoj, pensoj forflugus kiel birdoj.
Nova poemo ne estus farita el kirlantaj pensoj.

La vortoj skribitaj per inko brilas kiel perloj.
La vortoj povas formi signifoplenajn frazojn.
Nova mondo farita el literoj kaj strangaj sentoj.
Tiel ili disvastigas sian mesaĝon en la mondo.
Ili estas gvidlumoj por ni sur nia vojo al scio.
Ŝvebu kun ili sur la ondoj de racio kaj emocio.

La somero

La hela lumo de somero brilas sur la pejzaĝo,
varmiga sunlumo dancas super la tero.
La herbo estas verda, la birdo pepas,
la floroj estas vestitaj per belegaj koloroj.
Estas bone ripozi en la malvarmeta ombro,
malvarmiga spiro de freŝa venteto blovas.

Flosantaj ŝafnuboj en la blua ĉielo,
brilanta spegulo de lagoj en sunlumo.
Ni ĝuu la magiajn momentojn de somero,
la ĝojaj sonoj de libereco flugas en la vento.
La ĉarmo de someraj tagoj kaj noktoj allogas nin,
ili alportas la mesaĝon de feliĉo al niaj koroj kaj animoj.

La tondro

La arko de lumo inter ĉielo kaj tero,
ĝia brilanta energio traperas ĉion.
Tondro ligas ĉielon kaj teron por momento,
ĝi montras la potencon de la krea forto.
Ĉi tiu momento estas brila kaj bela kaj majesta,
timiga vidaĵo, tamen tiel fascina.
La danco de fulmo en la ĉielo estas belo,
memorigas nin pri la potenco de la naturo. ※

Bedo de Ĉinesko

Vejdo (Ĉinio)



*La jenaj kvar poemoj estas verkitaj laŭ
Sopir-al-sudo, ĉinstila fiksforma skemo el
kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ
rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Saĝa ŝafido

(fablo)

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo

Iutage
ŝafid' sencele
vagadas en arbaro.
Lupo eliras ŝtele
ĝin kaptas pele.

La ŝafid'
kvankam timtrema
tamen saĝa ja estas.
Ĝi montras sin pensema
en kriz' dilema.

Ĝi diras:
"Volu, onklo Lup',
antaŭ ol min formanĝi,
amuzi min jen per flut',
la ĝojiga tub'."

"Kial do?

Kial devas mi
ludi fluton ĉihore?"
"Laŭ via fluta ari',
antaŭ l' agoni'

de morto,
mi dancos ĝue
je kora kontentiĝo.
Poste mi jen senbrue
ne petos plue."

"Vi volas
eskapi ruze
per tia artifiko?"
"Ne, mi ludas amuze
do nerifuze!"

"Nu, bone,
fluton ludu mi!"
Lupo ekblovas fluton,
dancas ŝafid' laŭ ari'
ĝue en ebri'.

Je flutson'
ŝafist' rapide
alkuras, vidas lupon,
kaptas ĝin senhezite,
triumfas ride.

La lupo
tre pentas en gal':
"Mi ja tute trompiĝas.
Vokas homojn al batal'
flutson' — la signal'!"

Bovo kaj rano

(fablo)

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo

Ĉe lago
ludis ĝojplene
du ranetoj kaj tiam
alvenis bov' promene
trinki senĝene.

Pro mispaŝ'
mortigis la bov'
unu raneton per huf'.
Alia rano, sen pov',
kuris je ekmov'.

Enhejme
li al ran-patrin'
balbutis spiregante,
"La morto trafis lin,
jen mava destin',

panjo, ve!
Estas la frato
tretmortigita de best'
giganta per hufbato
jen sen kompato!"

Neniam
vidis patrin-ran'
bovon de sia naskiĝ'.
Ŝi do al sia infan'
mimis kun rikan':

"Ĉu tiom
ĝi grandas ronde?"
Ŝi montris sian ventron

la pufigitan onde
kvazaŭ etmonte.

"Ne. Granda
ol via plie!"
Ŝi blovis sian ventron
pli pufa energie
kun brila radi'.

"Ĉu tiom
granda kiel mi?"
"Ne, ne, ne, eĉ pli granda!"
Panjo kvazaŭ kun magi'
faris ventron pli

balone
ronde ĝislime.
Antaŭ ol ŝi demandis,
Pum! krevis ventro fine
kaj rompe kline.

Forto de kampuloj

rakonto pri Afanti
—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo

La reĝo
iĝis scivola
kaj alvokis Afanti
por demando petola
kaj ŝajne fola.

"Vi ĉien
migris tra la mond'.
Ĉu vi eltrovis iun
pli forta ol mi per sond'
en la pleba rond'?"

Afanti

diris mokride
“Tre multajn, via moŝto!”
Reĝ’ kapneis malfide
ĉuis rapide:

“Ho, kiuj
estas personoj
pli fortaj ol mi fakte?”
reĝo ĉuis en tono
duba sur trono.

“Ili ja—
kampuloj vere!”
Afanti jen respondis.
“Fi!” la reĝo kolere
diris, “Sufere

ja ili
vivas kaj nure
povas plugi. Do kiel
pli fortus ili sure
de mi nature!”

Afanti
refutis moke,
“Vi eraras, reĝa moŝt’!
Ili ja fortas roke
kaj viglas boke.

Se ili
ne nutradus vin,
kian forton vi havus
por domini kun sangvin’
stari sen kapklin’?”

Bonege!

rakonto pri Afanti

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo

Afanti

portis ĝojplene
melonojn al la reĝo,
kiujn li plantis pene,
jen surazene.

La reĝo

kun laŭdo bona
akceptis ilin ĉiujn
sed sen pagado mona,
jes, nenioma!

La reĝo

trifoje nure
ride diris, “Bonege!”
Afanti jen murmure
foriris kure.

Pro malsat’

li eniris en
manĝbutikon por manĝi.
Bulkojn englutis sen ĝen’
li kun ridmien’.

Li tamen

ne pagis tute
kaj nur diris trifoje
“Bonege!” senbalbute,
foriris mute.

La mastro

flame kolera
akuzis lin antaŭ l’ reĝ’

pro la kondukt' fiera
kaj malsincera.

Al la reĝ'
li diris rore,
"Afanti ja ne pagis
por manĝaĵo ignore
jen ĵusa-hore."

La reĝo
riproĉis tondre,
"Afanti, ĉu vi rajtas
ne pagi vagabonde
kaj ja senhonte?"

Afanti
diris mokride,
"Via moŝt', mi jam pagis
per laŭdoj tuj rapide
kaj senhezite.

Trifoĵaj
'Bonege!' diris
mi kiel vi jam faris,
kiam vi ja trankvilis
kaj vi foriris

preninte
melonojn miajn."
La reĝ' ne povis diri,
frotante manojn siajn
vortojn aliajn.



Rovere Emanŭele (Italio)



Kisu min multe

(kantteksto)

Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)

Muziko / vortoj: C. Velasquez

tradukinto, Rovere Emanŭele

Kisu min, kisu min multe, kvazaŭ ĉi nokte por ni estus la lasta foj'.
Kisu min, kisu min multe, ĉar timas mi, ke mi perdos vin: kia malĝoj'!

Volas mi teni vin strikte, en viaj okuloj nun speguliĝi.
Pensu, ke morgaŭ mi estos, je ĉi sama horo, lontana de vi.

Kisu min, kisu min multe, kvazaŭ ĉi nokte por ni estus la lasta foj'.
Kisu min, kisu min multe, ĉar timas mi, ke mi perdos vin: kia malĝoj'!
Nun mia haŭto deziras ensorbi karesojn de lipoj de man'.
Pensu, ke morgaŭ mi estos, je ĉi sama horo, sen vi en lontan'.

Kisu min, kisu min multe, kvazaŭ ĉi nokte por ni estus la lasta foj'.
Kisu min, kisu min multe, ĉar timas mi, ke mi perdos vin: kia malĝoj'!
Ĉar timas mi, ke mi perdos vin: kia malĝoj'!

La amatino de amiko mia

(kantteksto)

Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)

Muziko / vortoj: R. Carlos

Ho, kial mi enamiĝis al la amatino de amiko mia?
Kun mi loĝas inoj en mondo, ĝuste l'amatino de amiko mia.
Ja, estas vere, ke kondutas amo tiel: envizaĝen rigardas ĝi al neniuj.
Mi enamiĝis ĝuste al la amatino de amiko mia.
Sed tiajn okulojn belajn dum mia tuta vivo vidis mi neniam.
La mondo grandas sed fariĝas eta, se renkontiĝas vi kun simila virin'.

Nenion diri al li, nek al aliaj, neniam!

Mi ne volas diri al la mondo, ke mi amas l' amatinon de amiko mia.

Mi ne volas diri al la mondo, ke mi amas l' amatinon de amiko mia.

Kaj kion nun mi faru? Pli bone mi rezignu kaj ne pensu plu.

Se estas mi amiko vera, suferu mi silente kaj ne revu plu.

Ĉar estas vere, ke necesas plori kaj adiaŭi la feliĉon post nun.

Nenion diru al li, nek al aliaj, neniam!

Mi ne volas diri al la mondo, ke mi amas l' amatinon de amiko mia.

Mi ne volas, ke la mondo sciu, ke mi amas l' amatinon de amiko mia!

La nokto

(kantteksto)

Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)

Muziko / vortoj: S. Adamo

Pri vi ne pensas mi dumtage, sed nokte mi malbenas vin

kaj, kiam fine matenruĝas, ĉirkaŭas nur malpleno min.

La bildo via grandas nokte, sed vane strebas mi ĝin kapti,

vi amuziĝas min turmenti: vi, nokte, frenezigas min.

La nokto frenezigas min, frenezigas min.

Pervoĉe ŝiras vi l' mallumon, kie vin serĉi mi ne scias,

mi aŭdas vin, l'esper' revivas kaj vin mi amas ĉiam pli.

Vi reaperas dum tempero, flugtuŝas min, etendas manon,

sed mia sango glaciigas kiam ridante vi forfuĝas.

La nokto frenezigas min, frenezigas min.

La tago brilas pacoplana, kaj via bildo vaporiĝas.

Ĉu vi atingas iun alian? La duboj frenezigas min.

La nokto frenezigas min, frenezigas min, frenezigas min!

La fremdulo

(kantteksto)

Esperantigo: Michel Dereyger kaj Rovere Emanuele (Manŭel)

Muziko / vortoj: Georges Moustaki

Kun vizaĝ' mia de fremdul', greka paŝtist', migranta jud',
kun harar' mia en la vent', helblua estas la okul',
ĉiam aspektas mi revul', elrevigita en real'.

Kun mia mano de ŝtelist', de senhejmul', de muzikist'
mi ofte rabis en ĝarden'. Multege trinkis mia buŝ',
kisis kaj mordis mi per dent', ĝis la malsat' nenia venk'.

Kun vizaĝ' mia de fremdul', greka paŝtist', vaganta jud',
eta ŝtelist' kaj vagabond' multe sin banis mia haŭt'
en la somera, varma sun', en lito dolĉa de fraŭlin'.

Mirinde sciis mia kor' tre suferigi post dolor'
sed ĉio sen revoluci', sen ia sav' por la anim',
sen ŝanco al la paradiz' kaj eĉ al la purgatori'.

Kun vizaĝ' mia de fremdul', greka paŝtist', migranta jud',
kun harar' mia en la vent', mi venos, mia kaptitin',
vivplena font', ĝemelanim' kaj trinkos je via junec'.

Ja estos mi via revul', aŭ via princ', adoleskul',
laŭ via plaĉo kaj elekt'. El ĉiu tago faros ni
tutan eternecon da am', kiun ĝismorte vivos ni.

Mirindaĵo

(kantteksto)

Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)

Muziko / vortoj: R. Pazzaglia-D. Modugno

La veron mi diras, ke okazis al mi, nokte, sur ponto dum mi rigardis l'akvon

kun malbenita emo min ĵeti suben tuj. Subite alproksimiĝis iu.
Ĉu anĝelo? Tamen ŝajne nur pasanto
manprenis min dirante tion ĉi:

“Ho mirindaĵo! Kaj kial ne rimarkas vi, ke nia mondo estas mirindaĵo?
Ho mirindaĵo! Eĉ la doloro via por vi fariĝi povos mirindaĵo.
Rigardu ĉirkaŭ vin: amason da donacoj! Oni inventis por vi la maron!
Ne estas vi malriĉa, posedas vi la sunon, la vivon, la Amon.

Ho Mirindaĵo! La koro de virino pulsanta nur por vi, ho mirindaĵo!
La lumo de l'mateno, la helpo de amiko, l'rideto de infano:
mirindaĵo, ho mirindaĵo”.

La nokto jam finiĝis kaj mi pli dolĉa sentis la guston de la vivo:
mirindaĵo, ho mirindaĵo. Ho mirindaĵo, ho mirindaĵo!

La nokto jam finiĝis kaj mi pli dolĉa sentis la guston de la vivo.
Mirindaĵo, ho mirindaĵo, ho mirindaĵo, ho mirindaĵo!



Jean de LA FONTAINE (1621-1695)



Jean de LA FONTAINE estis franca verkisto, kiu famiĝis danke al siaj fabloj, plejparte inspiritaj de la antikva greklingva fablisto Ezopo (7-a kaj 6-a jarcentoj A. K.)

Jean de LA FONTAINE

La grilo kaj la formiko

Kantis Gril' tutan someron
ĝis ŝanĝiĝis la vetero.
Tiam en ĝia kamero
ĝi ne havis eĉ paneron,
mankis al ĝi eĉ peceto
de vermo aŭ de muŝeto.
Do, ĝi iris al Formiko,
sia najbar' kaj amiko,
por pruntepreni nutraĵon:
kelkajn grajnojn aŭ muŝaĵon.
Grilo diris al Formiko:
“Ĝis aŭgust' mi pagos prezon,
kaj aldonos interezon.”
Formik' estis malhelpema,
certe ne prutedonema.
Do, la Grilon ĝi demandis:
“Dum somer', kion vi faris?”
Grilo diris: “Mi kantadis”.

Kaj respondis la Formiko:

“Nu, vi dancu nun, amiko.”

La korvo kaj la vulpo

Mastro Korv’ sur branĉo staris

kaj en bek’ fromaĝon tenis.

Mastro Vulp’ fromaĝon flaris

kaj pro la odor’ alvenis.

Diris li: *“Saluton kara,*

estimata birdo rara!

Se la voĉo via ŝajnus

bela kiel la plumaro,

certe mi vin jam proklamus

la Fenikso de l’ arbaro!”*

Tiam Korvo ekĝojegis

kaj ekkanti deziregis;

sian bekon li malfermis

kaj fromaĝon li jam perdis.

Vulpo la fromaĝon manĝis

kaj la paroladon ŝanĝis:

“Lernu nun ke la flatuloj

profitas de la vantuloj.

Akiri tian saĝecon

ja valoras fromaĝpecon.”

Korbo jam komprenis tiam.

Hontigita, konfuzita,

Korbo ĵuris ke neniam

plu ne lasos sin trompita.

* *“Fenikso” — Mitologia birdo, kiu ĉiucentjare mortas en flamoj kaj renaskiĝas el sia propra cindro. Figurasence: Supera persono, unika en sia speco.*

Elfrancisgis: **Luiza CAROL**

Bai Juyi (772-846)



poeto, Bai Juyi

Rakonto pri bivludistino

En la 815-a jaro, la deka jaro de Yuanhe-erao de Tang-dinastio, mi estis degradita kaj forsendita al Jiujiang-prefektujo, kie mi funkciis kiel konsilisto de la prefekto. La sekvan aŭtunon, kiam mi diris adiaŭ al amiko ĉe la pramejo Penpu, mi aŭdis ludadon de bivo el la boato dum nokto. La sonoj de bivplektrado tintis kun gusto de ludmaniero en metropolo. Mi demandis kaj sciigis, ke la bivludistino estas hetajro de Chang'an. Ŝi lernis ludarton ĉe la famaj ludlertuloj Mu kaj Cao. Pro tio, ke ŝia beleco fadis kun aĝo pliiĝanta, ŝi edziniĝis al komercisto. Mi do postulis pli da alkoholon kaj petis ŝin ludi plurajn ariojn. Post ludado ŝi emociplene rakontis pri sia ĝoja juneco, kaj lamentis pri sia mizerplena vivo vaganta de loko al la alia. Mi estis degradita du jarojn, sed mi ĝuis trankvilan kaj memkontentan vivon. Aŭdinte ŝian rakontadon, mi eksentis morozon de degradito. Do mi komponis ĉi tiun longan poemon kun 616 ideogramoj, titolitan Bivludistino, kaj donacis ĝin al ŝi.

Nokte mi forsendis gaston ĉe Xunyang-rivero,
jen susuris fragmitfloroj en aŭtun-vetero.
Ni deĉevaliĝis kaj enboatiĝis solaj,
ni vintasojn levis sen muzika atmosfero.

La disiĝo tristis, ve, sen ĝoj' sed kun ebrio,
la bedaŭr' elfluis sub nebula lunradio.
Jen aŭdiĝis tintoj de bivludo sur rivero,
ni restadis por aŭskulti jen kun emocio.

“Kiu estas la ludisto?” ĉuis mi dubeme,

la ludado haltis, kaj respondis ŝi retene.
La boat' alproksimiĝis por intervidiĝi,
rearanĝis vinon kaj manĝaĵojn ni festene.

Post plurfojaj vokoĵ ŝi elvenis malrapide,
kovris unu vangon per la bivo ŝi rigide.
Ŝi agordis kordojn eligante kelkajn sonojn,
la hakitaj tonoj jame naskis sentojn glite.

Kordoj vibris jen per melodio kun ĉagreno,
ŝajne rakontante pri tutviva trista spleno.
Kun klinita kapo ŝi arpeĝis per fingretoj,
elverŝante sian koron kun la suferpleno .

Kordojn ŝi kuntiris, pinĉis, levis fingrolerte,
ŝi serion da arioj ludis ja tutcerte.
Dikaj kordoj sonorbruis kiel pluvobatoj,
la maldikaj flustris duonvoĉe kaj tonperde.

Tintojn kaj gratsonojn ŝi kunmiksitis jen varie:
jen faladis perloj sur jadpladon kolizie,
jen triladis oriolejo inter floroj ŝvebe,
jen fontakvo malfacile fluis subglacie.

Sub frostiga la fontakvo ne plu vibris kordoj,
dume ĉesis pro frostiĝo fingraj la pluktordoj.
Ŝi ĉagrenon kaŝan naskis en la korprofundo,
nun son-mank' superis muziksonojn en akordoj.

Nun ekkrevis l' arĝent-vaz' kaj akvo ŝprucis flue,
ferĉevaloj sturmis, glavoj, lancoj tintis brue.
Ĉe la fin' de lud' ŝi plukis meze de bivkordoj,
la kvar kordoj ĥoris kvaz' ŝiriĝus tol' detrue.

En boatoj regis nun silento dum momento,
nur vidiĝis super flu' l' aŭtuna lun-arĝento,
Ŝi senvorta l'plektron jen enŝovis inter kordojn,
kaj ordigis veston kun vizaĝ'de ĉagren-sento.

Ŝi naskiĝis loke en ĉefurb' laŭ ŝia diro,
ŝia hejm' troviĝis ĉe Hamaling en trankvilo.
Ŝi dektria-jara jam ellernis bivoludadon,
kaj de tiam servis en palac' en art-defilo.

Post bivoludad' ŝin multe laŭdis majstroj vere,
kaj envias ŝian ĉarmon hetajrar' megere.
Dandoj en palaco vete pro prezento ŝia
ruĝajn silkubandojn jen donacis memprefere.

Harpingloj, kombilo disrompiĝis pro takt-bato,
vin-makuloj plenas sur la jupo de skarlato.
Ĝojo kaj rideto alportiĝis jar' post jaro,
glitis aŭtun-lun' kaj printemp-vent'al ŝia ŝato.



Frato ŝia iris al milit', l'onklin' pereis,
en temppaso pri beleca malaper' ŝi veis.
Raris gastoj kaj kaleŝoj jen ĉe ŝia pordo,
do, al edziniĝ' al komercisto ŝi obeis.

Monavida li disiĝis ofte sen bedaŭro,
iris li por te-negoco antaŭ monataŭro,
kaj ŝin lasis tute sola en boat' malplena
ĉirkaŭita de la frosta akv' sub luna klaro.

Nokte ŝi prisonĝis la paseon dum junaĝo,
larmoj fuŝdetruis ŝian ŝminkon sur vizaĝo.
Pri bivoludo ŝia mi suspiris jam admire,
mi des pli lamentis pri l' rakonto kun domaĝo.

Ambaŭ ni vagantaj same kun mizera sorto,
nekonataj, sed ni renkontiĝas en komforto.
Mi lastjare degradite forlasis ĉefurbon
kaj en Xunyang-urbo dume loĝas jen pro morbo.

Pro forec' sovaĝa mankas muzik-distr' plezura,
dum la jar' aŭdiĝas eĉ ne flutolud' sent-lula.
Loĝas mi en ĉerivera loko kun humido,
ĉe bambuoj kaj fragmitoj en la vent' ulula.

Kion mi aŭskulti povas nokte kaj matene?
Nur kukolan kaj simian kriojn tristajn ĝene.
Ĉu ĉe la river' printempa, ĉu sub aŭtun-luno,
mi solece verŝas vinon, drinkas kunĉagrene.

Ĉu aŭdiĝi povas la montkantoj kaj flutsonoj?
Jes, nur raspaj, krudaj flutludado kaj kanzonoj.
Mi ĉi-nokte aŭdis belajn notojn de bivoludo,
kvazaŭ plaĉan fe-arion jen sen monotonoj.

“Ne disiĝu tuj kaj ludu pecon ĉe la fino,
mi komponu versojn jen por vi bivoludistino.”
Kortuŝite longe staris ŝi pro miaj vortoj,
kaj sidiĝis, plukis kordojn urĝe kun kapklino.

Sonis tuj ario trista malkiel lastfoje,
ĉiuj aŭskultantoj plorsuspiris jen malĝoje.
Kiu el la ĉeestantoj larmis pleje multe?
Larmoj de mi, la prefekt' ĉi-loka, fluis roje. ※

Ni Ming (Ĉinio)

Vi estas mia okulparo

ses-akta dramo

Personoj:

Liu Dong, 23-jara, diplomito de fama universitato en Pekino

Linda, 21-jara, studentino de fama universitato en Pekino

Fan, 24-jara, amiko de Liu Dong

Patrino, 50-jara, la patrino de Liu Dong

Fratino, 16-jara, la fratino de Liu Dong

Chen, 21-jara, la ĉambrano de Linda

Hu, amiko de Liu Dong

Kuracisto, okulkuracisto, 55-jara

Jang, 50-jara, la ĉefredaktoro de gazeto

Flanka parolo: Liu Dong, kiu diplomiĝis el la fama universitato, estas vere inda talentulo. Kiam li malfermis la unuan paĝon de sia bela vivo, lia lumo perdiĝis. Ĝis la tago, kiam ŝi eniris lian vivon...

La unua akto: la bonŝanco de la talentulo

Liu Dong (*ĝoje parolas al telefonilo, iome ekscite*): Dankon al vi, ĉefredaktoro Jang, pro tio, ke vi donas al mi tiel bonan ŝancon labori en la redaktejo. Mi pene laboros bone.

Jang (*ridegas al telefonilo*): Liu Dong, vi estas vere inda junulo. Mi tre aprezas vian talenton.

Liu Dong (*honteme kaj modeste*): Ho, ho, dankon pro via laŭdo. Mi laboros pli pene kaj senĝene.

Jang (*bruligas cigaredon*): Haha, penu do. Venu labori ĉi tie la venontan lundon.

Liu Dong (*gestas ĝoje*): Bone. Mi akurate min anoncos. Dankon!

Jang (*malrapide elvomis cigaredfumon kun afabla rideto*): Kian ĝojon vi havas! Nun mi elŝaltu la telefonilon.

Liu Dong (*ĝoje*): Bone. Ĝis la revido, ĉefredaktoro Jang!

Liu elŝaltas la telefonilon.

Liu Dong (*serioze rigardas la iom flaviĝintan foton de la tuta familio*): Paĉjo, vi

povas resti en paco sub la tero. Via filo estas promesplena nun. Panjo kaj fratino, tuj realiĝos mia promeso, ke mi donos al vi bonan vivon!

Patrino (*kun larmoj en la okuloj, ekscitite palpas lia kapon kaj glatigas lian kolumon*): Ho, Ĉielo, dankon al vi! Finfine kapabalulo estiĝas en nia familio. Restu en paco, mia edzo. Nia filo ne vanigas nian esperon!

Fratino (*ĝoje saltete kuras al Liu kaj kaptas liajn brakojn kun videbla adoro sur la vizaĝo*): Fraĉjo, vi estas vere kapabla. Vi tuj fariĝos granda verkisto. Mi tre tre adoras vin!

La dua akto: idolo de belulino

En ĉambro de loĝdomo en universitato.

Flanka parolo: Estas belulino kun impona deveno, kiu ŝatas legi artikolojn de iu verkanto vorton post vorto, foje kaj refoje. Sur ŝiaj vangoj aperas jen larmogutoj jen brila rideto. Liu Dong, kia homo vi estas?

Linda (*iom ebrieta en emocio*): “Mi ne plu povas priskribi vin per densa farbo, kaj via ĝojo ĵetas min en ekstreman ekstazon...” Kiel bone produktita frazo! Legante ĝin, mi ĉiam sentas, ke mia koro senĉese vibras sur la onderoj!

Chen (*ŝovas miniorelaŭdilojn en la orelojn kaj faras grimacon kontraŭ Linda*): Linda, kiel viaj vortoj sonas tiom agacaj! Ĉu tiu via idolaĉo vin sorĉas? Vi vere freneziĝas!

Linda tuj ĵetas sin sur Chen kaj minace knedas ŝiajn vangojn.

Linda: Jen vi havas! Mi batus vin ĝismorte pro via babilaĉo! Lia artikolo estas bona efektive. Vi daminda knabinaĉo! Vi ne konas literaturon! Vi ne povas manĝi vinberojn kaj diras, ke ili estas acidaj! Hm!

Chen (*ĵetas al Linda flugan ekrigardon kaj levas siajn manojn kun aspekto de kapitulacado*): Ho, Ĉielo! Vi vere estas nesavebla! Liu Dong? Kia drola strangulo! Linda (*eksplodas de kolero*): Knabinaĉo, ne insultu mian idolon!

Linda refoje donas al ŝi solidan knedadon al ŝiaj vangoj ĝis tiu montras sin obeema.

Chen (*frotas siajn vangojn*): Povrinde, povrinde! Nia belulino submetiĝas al pedanta klerulo! Vi jam fariĝas fantomeca inaĉo!

Linda (*kolere rigardas ŝin*): Ĉu vi ankoraŭ ne sentas doloron?

Chen (*ektimas*): Mia kulpo, mia kulpo. Kial vi aspektas tiom minaca? Mi ne donas

atenton al vi. Mi aŭskultu al muziko.

Linda (*donas straban rigardon al ŝi, kaj prenante lian artikolon, montras dolĉan rideton*): “Mi havas nepenteblan junecon kaj senliman ĝojon. Mi prenas vian manon kaj promenas en nuboj. Ni kune rigardas sovaĝanserojn en la ĉielo, jam forgesante la senton de disiĝo. Mi volas diri al vi: mi volas fariĝi sovaĝansero en versoj.”

Linda, premante la artikolon al la brusto, levas la kapon kaj fermetas siajn okulojn.

Linda: Liu Dong, kial io magia min sorĉas en viaj vortoj? Kia homo vi estas finfine?

Chen pasigas senŝeligitan pomon kaj skuas ĝin antaŭ la okuloj de ŝi en enpensemo.

Chen: He, ĉu vi stultas? Unue manĝu la pomon kaj poste legu la artikolon. Ŝajne, se vi tenus vin tiamaniere plu, vi certe fariĝus idiota belulino.

Linda firme kaptas la brakojn de Chen kaj ekscitite rigardas ŝin.

Linda: Mi jam faris decidon, Chen. Mi volas serĉi Liu Dong por ekscii, kiel li kreas la verkojn. Mi volas iri al lia fonto de inspiroj kaj sciigi, kia homo li estas. Mi ankoraŭ petos de li la signaturon. Jes, mi serĉos lin morgaŭ!

Kun larĝe malfermita buŝo Chen gapas al ŝi. Eĉ la pomo falas teren el ŝia mano.

Chen: Linda, vi malsaniĝas. Ni iru al la kuracisto.

Linda: Aj ja, estas vi, kiu malsaniĝas. Mi prenas tion serioze.

Chen: Nun li jam diplomigis el la universitato. Kie vi povus lin trovi?

Linda (*montras sian agrablan rideton*): Mi iros al lia hejmvilaĝo intervidiĝi kun li.

Chen (*kun larĝe malfermita buŝo*): Aĥ!

Linda: Aĥ, mi iru al lia hejmvilaĝo en Yunnan!

En la hejmo de Liu Dong, situanta en montvilaĝo de Yunnan.

Hu (*kun ekkrio stariĝas, renversinte la seĝon malantaŭ si*): Kio okazas al vi Liu Dong? Vekiĝu, fraĉjo. Ne timigu min. Kio okazas al vi? Onjo, venu rapide. Liu Dong jam svenis...

La patrino stumble impetas en la ĉambron. La telero en ŝia mano falas kaj la melonsemoj en ĝi disverŝiĝas sur la teron.

Patrino (*plorante sin ŝetas sur sian filon*): Kio okazas al vi, Liu Dong? Ne timigu min. Kio okazas al vi? Rapide rekonsciiĝu. Mi estas via patrino. Emmm...

Fratino: Fraĉjo, kio okazas al vi? Mi volas, ke vi vekigu!

Hu: Onjo kaj franjo, ne ploru. Unue ni devas sendi lin al la hospitalo en la urbo!

Flanka parolo: Hu dorsportas Liu Dong kaj la patrino kaj fratino lin sekvas. Ili rapidas al la ŝoseo...

La tria akto: Blindeco je du okuloj

Post kvin horoj. Ekster sukurĉambro de hospitalo en Kunming.

Patrino (*maltrankvile rigardas la ruĝan lampon super la pordo de la sukurĉambro. Fratino kaj Hu subtenas ŝian ŝanceliĝantan korpon.*): Liu Dong, neniel falu en ĝenon! Se okazus io malbona, mi ne volus vivi plu...

Fratino (*kun larmoj sur la tuta vizaĝo. Ŝia delikata korpo tremetas.*): Panjo, certe nenio trafus fraĉjon. Li estas tiom bonkora kaj tiom scipova. Lin certe trafos nenio mava...

Hu (*kun larmoj en okuloj*): Onjo kaj franjo, mi kaj Liu Dong estas bonaj amikoj. Denaske li estas bonkora kaj saĝa. Li estas protektata de la favora stelo. La Ĉielo certe helpos lin rekonsciiĝi!

La ruĝa lampo sur la pordo de la sukurĉambro estingiĝis. Malfermiĝis la pordo. Elirinte el la sukurĉambro, la kuracisto demetas la maskon.

Patrino (*tuj sin ŝetas antaŭen kaj kaptas la kuraciston je la manikoj de blanka kitelo*): Kio okazas al mia filo, doktoro? De kia malsano li suferas? Vi nepre savu lin. Li estas nur dudekdu-jara...emmmm...

Kuracisto (*kun seriozmieno*): Ne maltrankviliĝu. Ne danĝero staras kontraŭ via filo, nur...

Hu (*kun ekstrema kolero kaptas la kolumon de la kuracisto*): Nur? Nur kio...? Rapide eldiru...

La kuracisto lasas Hu kapti sian kolumon. Patrino kaj fratino tiras la manon de Hu, por ke li forlasu la kolumon de la kuracisto. Taŭzante siajn harojn, Hu kaŝriĝas.

Kuracisto (*rigardante la triopon, eligis suspiron*): Lia patrino, tra la sukurado ni

trovis, ke ŝoko trafas vian filon pro lia subpremita optika nervo...

Fratino (*plorante prenas la kuraciston je la maniko*): Doktoro, mi petas vin nepre savi mian fraĵon...

Patrino (*kun jam raŭkiĝinta voĉo*): Doktoro, mi ne komprenas, kion vi parolas pri nervo. Nur diru al mi, ĉu io danĝera okazos al mia filo...

Hu stariĝas, ŝajne enpanseme.

Hu: Laŭ via diro, la nervo de mia frato estas difektita, ĉu tio signifas...

Kuracisto (*iome balancas la kapon*): Jes, lia nervo suferas de subita difekto, kion la moderna medicino ne povas klarigi, sed estas certe, ke li neniam havas ŝancon reveni al vidpovo...

Aŭdinte tion, Patrino svenis. Kun dentmordita lipo Fratino subtenas la svenintan Patrino plorsingultante. Hu kolapsas sur la teron.

Flanka parolo: En malsanulejo Liu Dong, kun firme fermitaj okuloj, kviete kuŝas sur la lito, ricevante envejnan pogutigadon. Strikte premante lian manon per ambaŭ manoj, Patrino neniam deŝiris sian rigardon de lia pala vizaĝo. Fratino kaj Hu, sidante ĉe la lito, kvankam lacaj kaj spiritmankaj, ankaŭ ne deturnas sian rigardon de Liu...

Liu Dong (*malfermas siajn okulojn kaj sidigas sin sur la lito*): Aj ja, kial tiel mallume? Panjo, kial mi vidas nenion? Ĉu nun estas nokte? Kial vi ne ŝaltas la lampon? He, panjo, vi ĉiam tenas mian manon, ĉu vi supozas, ke mi timas malluman nokton kiel en infanaĝo? Nun mi jam plenkreskas, kaj mi neniam timas la malluman nokton. Iru dormi. Panjo, kial vi ploras? Vi ploras, kial...

Plorante, Patrino premas sian filon firme al sia sino. La okuloj de Fratino ruĝe ŝveliĝintaj pro plorado kaj neniuj larmero elfluis el ili. Dume Hu verŝas torentan larmfluon.

Patrino: Lu Dong, mi ne ploras, mi ne ploras. Mi ĝojas, pro tio, ke vi estas promesplena.

Liu Dong (*Lia mieno subite ŝanĝiĝas. Li palpas per mano ĉirkaŭ la kapkuseno*): Kie estas miaj okulvitroj, panjo? Mi volas surmeti la okulvitrojn.

Fratino pasigas al Liu Dong la okulvitrojn per tremantaj manoj.

Fratino (*raŭke*): Jen estas viaj okulvitroj, fraĵo...

Liu Dong (*maltrankvile surmetas la okulvitrojn, ŝajne perceptante ion*): Kio estas al vi, franjo? Kial vi ploras? Kio estas al vi ĉiuj? Aĥ, mi vidas nenion. Panjo kaj franjo, kie vi troviĝas? Kial mi ne povas vidi vin?

Hu tuj brakumas Liu Dong tre firme.

Hu: Mi estas Hu, fraĵo. Mi estas ĉi tie kaj viaj patrino kaj fratino ankaŭ estas ĉi tie. Ni ne forlasos vin, neniam.

Liu Dong (*ekscitite forpuŝas Hu-n kaj baraktas iri el la lito. Li pene liberiĝas el la retenado de la triopo, sed falas sur la litrandon*): Aĥ! Ne! Tio ne estas vera! Mi ne estas blinda, mi ne...

La kvara akto: Testamento

Tempo: je la tria posttagmeze

Loko: en hejmo de Liu Dong

Fratino (*kriante en paniko, disverŝas la varmegan teakvon sur la manon kaj la taso falas sur la teron. Kun leterpapero en la mano, ŝi elkuras el sia ĉambro*): Panjo...fraĵo...fraĵo forlasis testamenton, kaj li...malaperis...

La telero en la mano de Patrino subite falas sur la teron kaj pomoj en ĝi forruliĝas disen.

Patrino (*paliĝas pro konsterniĝo*): Filnjo, kion vi diris? Kie estas via fraĵo? Testamento...

Vidinte la konatan manskribon de sia filo, Patrino svenis. Envenas bela knabino antaŭ ilin.

Linda (*maltrankvile sin klinas por helpe subteni Patrino*): Kio okazas, fratineteto? Kio okazas al via patrino? Venu kaj ni helpe starigu ŝin.

Patrino malrapide malfermas la okulojn kaj rigardas la belan knabinon. Kaj tiu donas al ŝi tason da malvarme boligita akvo.

Linda: Onjo, trinku iom da akvo.

Patrino: Dankon, knabino. Kiu vi estas...

Linda (*tre ĝentile*): Saluton, onjo. Mi nomiĝas Linda. Mi venas de Pekino kaj vizitas Liu Dong. Onjo, vi...

Patrino tre ekscitiĝas. Larmoj fluas el ŝiaj okuloj.

Patrino: Liu Dong? Ĉu vi venas viziti Liu Dong? Li...

Ankaŭ Linda tre ekscitiĝas, kun larĝe malfermita buŝo.

Linda: Onjo, ĉu vi estas patrino de Liu Dong? Kie li estas nun?

Plorante, Fratino enmanigis al ŝi la leterpaperon.

Fratino: Panjo, ni tuj serĉu fraĉjon ĉie. Mi serĉu lin kune kun fraĉjo Hu.

Flanka parolo: Karaj panjo kaj fratino, en ĉi mondo vi estas miaj plejkaruloj. Mi iam ĵuris, ke mi nepre havigos al vi feliĉan vivon. Ekde kiam la patro forpasis, mi estas la sola viro en la familio kaj mi devas surŝultrigi la pezan ŝarĝon de la hejmo. Mi klopodadas kaj strebadas nur por prezenti la plej bonajn aĵojn al vi. Tamen mi ne povos plenumi mian promeson, ĉar mi fariĝas blindulo kaj la mallumo iompostome voras min kaj mian brilan estontecon. Miaj revo, idealo kaj promeso jam krevis kiel sapveziko. Panjo, vi tutanime zorgas pri mi kaj la fratino, dum kiel via filo, mi ne povas ĝuigi al vi la restantajn jarojn de via vivo, kaj igas, ke vi lavas vestojn kaj preparas manĝojn, eĉ purigas urinvaŝon kaj fekujon por mi... Panjo, kiam vi faras ĉi ĉion por mi, mia koro disrompiĝas. Franjo, vi estas sagaca kaj obeema knabino, kaj mi fieras, ke mi havas tian fratinon. Mi promesis al vi, ke mi fariĝos granda verkisto, sed nun mi ne povas teni la promeson. Ĉu vi povas doni al mi pardonon? Dum mia tuta vivo la plej granda feliĉo estas ke mi kunvivis kun vi kaj la patrino. Sed nun la Ĉielo senigas min je la lumo kaj ankaŭ neniigas mian esperon, ĉiujn miajn esperojn... Mi nur volas, ke vi ĝuu feliĉon, sed ne volas, ke mi fariĝas via balasto. Mi decidis forlasi ĉi malluman mondon, eble mi povas eviti ĉi tion. Tamen mi plej timas, ke vi dediĉas ĉion al mi kaj mi, kiel blindulo, ne rekompencos vian penegon por mi. Panjo kaj franjo, vi devas bone vivi kaj mi nun iras al la paĉjo. Adiaŭ, mia plejkaruloj... via nesindonema filo Liu Dong.

Legante la la testamenton, Linda sentas, ke ŝia koro disŝiriĝas. Ŝi subite ekpensas pri io.

Linda: Liu Dong, vi vere estas timemulo! Ĉu vi volas elekti evitadon, kiam vi renkontas ion malbonan? Mi nepre trovos vin. Ĉu vi troviĝas ĉe la Klifo de Inspiroj? Nun mi iru...

La kvina akto: renkontiĝo ĉe la klifo

Flanka parolo (sonas fona muziko): Sur la montoj freŝa verdecio plaĉas al okuloj. Kiam zefiro blovas, susuroj de folioj kaj branĉoj precipe agrablas la orelojn. Klifoj kaj danĝeraj rokmuregoj neniam povas bari tiun, kiu akiras inspirojn el ili. Lia revo tre tre belas, lia amo tre tre sinceras kaj lia penso tre tre profundas... Tamen li jam ne povas vidi tian freŝverdecon nek imponecon de la altaj montoj. La mallumo jam senkompate voris lin. Li dronas en malespero, soleco kaj malvigleco. Ĉe la tombo de lia patro li milde palpas la surskribo sur la tomba steleo kaj poste faras tri riverencojn kun kapo ĝis la tero. Sin turninte, li iras al la rando de danĝera klifo...

Linda (*anhelante, premas la genuon per unu mano kaj frapetas la bruston per la alia. Indigne*): Liu Dong, ĉu vi konsideras, ke vi povas elturniĝi per morto? Vi povas salti malsupren, sed vi pensas, ke viaj patrino kaj fratino povas senti tiom grandan suferon pro tio?

Liu Dong tuj haltigas sian saltontan korpon. Li returnas la kapon kun tristeco kaj malespero sur la tuta vizaĝo.

Liu Dong: Kiu vi estas? Ne vin koncernas mia afero. Mi ne estas Liu Dong. Mi estas blindulo, kiu povas vidi nenion. Se mi vivos, mi nur povas plipezigi la ŝarĝon de miaj patrino kaj fratino. Mi preferas iri vidi mian patron sub la teron pli frue.

Linda (*montras lin per fingro*): Timemulo! Egoistaĉo! Se vi saltus malsupren, kiel vi povus certigi, ke viaj patrino kaj fratino vivas trankvile en ĉi mondo?

Lu Dong (*amare ridetas*): Mi estas blindulo kaj sentaŭgulo, kiu povas fari nenion. Ĉu vi komprenas?

Linda (*plorsingulte*): Mi komprenas! Mi klaras! Mi scias, kion signifas la blindeco por vi. Ankaŭ mi scias, kiom da suferoj eltenas tiu, kiu teksas belecon, sed mankas al li okuloj, kiuj povas vidi la belecon. Sed mi esperas, ke vi donu al vi mem la ŝancon vivi denove!

Liu Dong (*returnas la korpon*): Kiel vi trovas ĉi tiun lokon?

Linda (*paŭzas*): Ne indas, ke mi prenas vin kiel mian idolon. Mi venas de malproksima Pekino cele por ekscii, kiel la talentulo, kiun mi adoras longatempe,

kreas belajn verkojn. Mi petis informojn pri vi la tutan tempon. Ne facilas akiri la informon, kie vi loĝas. Kiam mi atingis vian hejmon, mi vidis, ke viaj patrino kaj fratino serĉas vin ĉie kun via testamento en la mano. Ili diris al mi la tutan aferon. Laŭ viaj verkoj mi scias, ke vi certe troviĝas ĉe la Klifo de Inspiroj, la loko, kiun vi tre ŝatas dum via verkado. Mi neniel pensas, ke vi... Emmm!

Flanka parolo: Kiam temas pri lia adoranto, kiu serĉas lin mem, li naskas sennoman emocion en la koro. Kvankam li ne povas vidi la knabinon, li tamen sentas en la koro, ke ŝi estas tre tre bela.

Liu Dong: Ĉu vi povus diri al mi vian nomon?

Linda (*tre kolere*): Vi granda kanajlo! Kial mi devus diri al vi mian nomon? Ĉu vi konsideras, ke vi rajtas scii mian nomon laŭvole? Hm! Kio do? Vi ne volas salti malsupren? Ĉu vi volas elturniĝi? Kial vi ne saltas malsupren? Jen plonĝu do!

Liu Dong (*montras rideto ĉe la buŝangulo*): Lasu do, se vi ne diras al mi vian nomon. Mi nun hejmeniras. Ĉi tie frekventas lupoj!

Linda (*sin fetas kaj kaptas lian veston*): Aĥ! Lupoj! Atendu min, vi kanajlo! Nu, mi diru al vi. Mi nomiĝas Linda. Mi studas en la sama universitato kiel vi. Mi estas via studfratino!

La sesa akto: Mi estas via okulparo.

Flanka parolo: Patrino, Fratino kaj Hu serĉas lin ĉie, sed vane, kvankam kelkaj horoj pasis.

Patrino (*tre maltrankvile, kun ruĝaj okuloj pro plorado*): Ho, filĉjo, vi estas karno el mi, via panjo! Vi neniel renkontu ajnan danĝeron. Se io mava okazos al vi, kiel mi povus vivi plu en paco?

Fratino trenas sian lacan korpon en hejmon. Verŝinte glason da malvarma akvo, kiam ŝi alportas ĝin al la buŝo, ŝi tuj haltas. Grasaj ŝviteroj malrapide fluas sur ŝiaj vangoj.

Fratino: Panjo, tiu ĉi glaso estas aĉetita de fraĉjo, sed mi ne scias, kie li troviĝas. Panjo, mi nun sopiras al fraĉjo...

Patrino tuj brakumas ŝin kaj ili ploregas.

Patrino: Filnjo, mi serĉis ĉie, sed ne trovis eĉ lian ombron. Kaj mi kriis ĝis raŭkiĝo, sed ne ricevis lian respondon. Se via frato ne sin trovus, mi ne volus vivi plu...

Fratino (*etendas manon por forviŝi larmojn de la patrino*): Panjo, frato Hu ankoraŭ ne revenas, eble li jam trovis mian fraton. Ne ploru. Fraĉjo ne povas fari stultaĵojn.

Kun mallevita kapo Hu revenas. Malespero skribiĝas sur lia vizaĝo.

Hu: Onjo kaj franjo, ĉu vi jam trovis Liu Dong? Mi iris al ĉiuj lokoj, kiujn mi povas imagi, sed ne trovis eĉ lian ombron...

Patrino denove svenas pro ekstrema maltrankvileco.

Fratino (*ploregas*): Panjo, kio okazas al vi? Tuj rekonsciiĝu...

Hu (*kun sufero sur la tuta vizaĝo*): Onjo kaj franjo, estas mia kulpo, ke mi ne sukcesis trovi lin...

Linda rehejmiĝas, prenante Liu je la mano. Kiam ŝi vidas la svenintan Patrino, la plorantan Fratinon kaj memriproĉantan Fan, ŝi des pli firme prenas la manon de Liu.

Linda: Jen la ĝenaĵon kaŭzas vi, Liu Dong. Vidu, kia sufero ilin turmentas!

Liu Dong (*kun rimorso montrita sur la vizaĝo*): Panjo, franjo, Hu... Mi...

Antaŭ ol li finas sia parolon, Fratino fulme sin ĵetas kaj lin brakumas.

Fratino: Fraĉjo, ne timigu min tiamaniere poste. Mi volas ke vi vivu bone...

Hu altiras Liu-n kaj premas lin al la sino.

Hu: Frato, mia bona frato...

Liu Dong premas la manojn de Patrino kaj metas ili sur sian vizaĝo, kiun inundas larmoj.

Liu Dong: Panjo, via filo ne donas sufiĉe da sindonemo al vi. Mi estas kulpa. Poste mi neniam plu ekhavos ideon fini mian vivon...

Patrino malrapide malfermas la okulojn. Vidante sian filon tuj antaŭ si, ŝi ekploras

pro ĝojo kaj firme brakumas lin.

Patrino: Filĉjo, vi estas mia karno el mi. Poste ne timigu vian patrinon. Vi estas mia tutaĵo!

Kun ruĝaj okuloj, Linda, vidante la kortuŝan scenon, ŝajne faras decidon en la koro.

Linda (*iras al Liu kaj firme prenas lin je la mano*): Liu Dong, vi estas mia idolo, ekde kiam mi legis vian unuan artikolon.

Liu Dong (*ekridetas*): Dankon al vi. Estas viaj vortoj, kiuj min ŝanĝis...

Linda: Mi ankoraŭ memoras pri viaj artikoloj pri via karmemora patro, pri amo al vi de via patrino, pri racio kaj prudento... Viaj vortoj ĉiam kortuŝas min kaj influas min. Ĉu vi scias?

Flanka parolo: Tiumomente Liu Dong vere venas al kompreno pri la favoro de la belulino kaj ŝajne vidas la lumon, la brilon, kiu prilumas lian koron.

Liu Dong: Mi neniel forlasos verkadon. Mi verkos pli da pli belaj artikoloj por mi, des pli por vi.

Linda elprenas porteblan komputilon kaj ĝin malfermas. Ŝi sidigas Liu Dong kaj metas lian manojn sur la klavaron. Poste ŝi metas siajn manojn sur la liajn.

Linda: Diru al mi, kion vi volas skribi. Ekde nun mi servas kiel via okulparo...

Flanka parolo: Liu Dong emociplene eldiris kelkajn vortojn. Klavaro sonas klake sub la fingroj. Sur la ekrano aperas "Vi estas mia okulparo dum mia tuta vivo!"

(La kurteno falas.)

reverkis **Yanke** laŭ interreta materialo

Guozhu (1938-2020)



Kiu estas Gulik?

Kiu estas Gulik? Eble iuj el miaj amikoj ankoraŭ ne aŭdis pri li. Tamen, lastjare, kiam la ĵurnalo *Ĉina Voĉo* faris elekton per publika diskutado pri 100 fremduloj kiuj donis plej grandan influon al Ĉinio, en la nomaro inkluzive de Lenin (1870-1924),

aŭtoro, Guozhu

Norman Bethune (1890-1939), John King Fairbank (1907-1991), eĉ de Bill Clinton (1946-) kaj Bill Gates (1955-) kc, interalie troviĝas ankaŭ la nomo de Gulik, vere neordinara famulo. Ĉina Centra TV speciale konigis lin en sia dissendo. Tial Gulik estas fremda ĉinologo kiun mi admiris kun granda estimo.

Mi admiras pri Gulik ĉefe pro tri motivoj:

1. Gulik havas potencon komplekson de Ĉinio;
2. Gulik vivas pli ĉinisme ol veraj ĉinoj;
3. Plej grava motivo: kiel fremdulo, Gulik tamen plenumis la taskon, plenumandan ĉial de ĉinoj.

Li verkis la librojn *La Seksa Vivo en la Antikva Ĉinio* kaj *La Erotikaj Koloraj Bildoj en Ming-dinastio* kc, per tio li merite fariĝis la fondinto de la esplorado pri la historio de la ĉina seksologio.

Gulik estas nederlandano, origine li nomiĝis Robert van Gulik, naskiĝis 1910-08-09 en Zutphen, Nederlando, kaj tro frue forpasis en 1957 kiel 57-jara talentulo. Ĉiu homo havas sian profesion, aferon kaj hobion.

Klasifite laŭ tiuj tri sferoj, Gulik estas diplomato, ĉinologo kaj romanisto, same elstaraj je ĉiu fako.

Ĉirkaŭ en 1936 Gulik eniris la rondon de diplomatio. Dum 30 jaroj li rondvizitis tra la mondo, sinsekve al Usono, Malajzio, Ĉinio, Hindio kaj diversaj landoj en la Meza Oriento, li estis sendita al Surabajo, Jakarto, Tokio, Chongqing, Vaŝintono, Nov-Delio, Bejruto, Damasko, Kuala-Lumpuro kaj aliaj lokoj. Gulik scipovas pri 15 lingvojn. Li funkciis kiel sekretario, konsilisto, sendito kaj glate finalis kariere kiel la nederlanda ambasadoro en Japanio. En la epoko ankoraŭ sen jeta vojaĝo, tio estas vere malfacile akirebla travivaĵo.

Ĉe multaj homoj, profesio ne estas la afero plej amata. Tio estas tre facile komprenebla por esp-istoj. Okupato de profesio havas ripoztagojn kaj emeritecon, sed la afero akompanas por eterne dum tuta vivo.



Robert van Gulik

Profesio de Gulik estas diplomatio, sed profesia laboro havas nur signifon por mallonga tempo.

Kion Gulik ŝatas, estas ĉinologio. Laŭ lia opinio nur akademia esploro havas eternan valoron kaj indas esti lia dumviva afero. La granda avantaĝo de Gulik estas esplorado trans nesamaj fakoj kaj kulturoj. Li tre amas Ĉinion. Ekde 1934 li komencis lerni la ĉinan lingvon. En 1935 akiris la klercon de doktoro, kaj pro tio lia animo ankaŭ fariĝis ĉinigita. Fakte la tendenca "adoro al fremdaj

landoj" ne estis monopola de la orientuloj. Se okcidentulo estis sorĉita de la ĉinologio, li certe fariĝos kaptito de la granda kaj profunda ĉina kulturo, li ankaŭ admiros ĝis adorsterniĝo forgesunte siajn prapatrojn. Li komencas bedaŭri siajn okulkavojn tro konkavaj, nazdoron tro alta, kaj harojn tro brunaj. Ekde tiam li ne plu volas esti nomata Peter aŭ Johano sed preferas havi ĉinan nomon. Li ne plu volas vesti sin per eŭropa kostumo kun kravato, sed preferas porti ĉinstilan robon kun mandarena jako. Li ne plu volas uzi fontplumon skribi horizontale, sed preferas uzi tuĉpenikon skribi vertikale. Li ne plu volas loĝi en eŭropa vilao kun ĝardeno, sed preferas en kvadrata korto kun domoj ĉirkaŭ si. La arda amo pri ĉina kulturo far la okcidentulo-adorantoj jam multe superis la limojn de lando kaj nacio, vere kortuŝa! Gulik donis al si ĉinan nomon Gao Luopei, alnomon Wang'xiao(forgesi ridon), literaturan nomon Zhitai (Irida Teraso); kaj al sia loĝejo la titolon *Kabineto Ankoraŭ Ekzistanta kaj Loko por Apreci la Lunon*, kie li okupas sin per verkado de poemoj kaj versparoj kaj amuzis sin per ludo de ĉina liuto, ŝako aŭ kaligrafio kaj pentrado. Li lertis pri ĉina muziko, ĉar li prenis s-ron Ye Shimeng (1863-1937), la Majstron de ĉina antikva liuto, sia instruisto. Kune kun la famaj personoj Yu Youren(1879-1964) kaj Feng Yu'xiang (1892-1948) Gulik fondis liutan asocion nomatan *Ĉiela Vento*. En 1940 Gulik verkis

libron *Arto de Liuto*, per erudicia teksto Gulik sisteme konigis al la Okcidento la arton de ĉina antikva liuto kun longa historio. Inter 1943 ĝis 1947 Gulik funkciis kiel la sekretario de la nederlanda ambasadorejo en Ĉinio, li havis intiman amikecon kun la famaj personoj kiaj Guo Moruo (1892-1978), Xu Beihong (1895-1953) kc. En 1943 Gulik geedziĝis kun ĉina f-ino Shui Shifang (1912-?) el nobla familio. Gulik estas erudicia poligloto, scipovanta dekkelkajn fremdajn lingvojn, sed kun aparta amo pri la ĉina lingvo.

Li scipovas verki en la antikva ĉina skrib-lingvo sen moderna interpunkcio. Laŭ kultura klereco, Gulik efektive vivas pli ĉinisme ol multaj ordinaraj ĉinoj. En sia

hejmo Gulik ŝatas porti sur si larĝan robon, trinki ĉinan teon, ludi antikvan ĉinan liuton, fari ĉingvajn sigelilojn, kaj dormi kuŝante sur la malmola tabulo de ĉina lito. Tial por tiu ĉi paro da geedzoj el nesamaj landoj, ekzistas nenia kultura baro. Laŭ diro de s-ino Shui Shifang: “Li ne estas fremdulo! Ekde la unua momento kiam mi konatiĝis kun li ĝis lia vivofino, li neniam interrompis sian ekzercadon pri kaligrafio. Mangĝaĵoj kiuj pli plaĉas al li, estas pladoj ekz. kolbaso de Sichuan-provinco. Li estas efektive vera ĉiniano.” Ĉiutage Gulik persistas en ekzercado de ĉina kaligrafio. Foje li faris belskribon en ekstravaganca caŭ-stilo kun densaodoro pri poemo de Chen Hao (1032-1085) por donaci al Chen Zhimai (1908-1978). Tio montras ke Gulik ne estas nur banala t.n. ĉinologo.

Hobio de Gulik estas verki romanojn, eĉ detektivajn, pri temoj el Ĉinio, el kiuj la plej fama estas la *Kompleta Solvado de Kriminalaj Kazoj far la Duko Di Renjie*, kiun Gulik verkis per la stilo de modernaj detektivaj romanoj kaj multoble pli interesa ol tiuj de la *Spiono 007* aŭ krimromanoj de Christie (1890-1976) aŭ la *Aventuroj de Sherlock Holmes*. Multaj ĉinoj eble ne konas la nomon de Gulik, sed ili certe vidis la kinofilmojn aŭ la televidan serion *Legenda Di Renjie* (630-700). Gulik verkis unue en la angla lingvo siajn romanojn, kiuj poste formiĝis serio inkluziva de 15 romanoj kaj 8 noveloj, resume kun 1300 miloj da vortoj kaj riĉa enhavo koncerna pri diversaj flankoj de la justico, politiko, administracio, lokaj ŝtatoficistoj, diplomatio, militaj aferoj, industrio kaj komerco, edukado, kulturo, religio, stato de popolanoj kaj socia vivo de Tang-dinastio (618-907). La tuta serio legiĝas en la parola stilo imite al la rakontoj de dinastioj Song (960-1279) kaj Yuan (1206-1368). Tio rekordas unika inter la ĉinologiaj verkoj tra la mondo.

Poste la romanoj de Gulik estis tradukitaj en multajn fremdajn lingvojn kaj debite vendiĝis je milionoj da ekzempleroj. En la 80-aj kaj 90-aj jaroj de la 20 jc aperis ankaŭ la ĉina traduko, majstre farita de s-ro Chen Laiyuan kc en parola stilo imita al la rakontoj de Ming-dinastio (1368-1644), vere brila traduko! En 1952 Gulik transoficiĝis de Japanio al Hindio. En Nov-Delio, Gulik ĉinigis la romanon *Murdo en la Ĉina Labirinto* el la angla kaj aldonis la titolon *Mirinda Solvo de Kazo far Di Renjie* kaj eldonis tiun libron en Singapuro. Antaŭ la romano Gulik donis prefacan poemon en la ĉina laŭ melodio *Luno Super la Okcidenta Rivero*, tio sufiĉe montris lian kapablon versi en la ĉina antikva lingvo. Vere admirinda!

Post fino de la Dua Mondmilito, Gulik refoje venis al Japanio kiel nederlanda diplomato. Li volas eldoni en Japanio du detektivajn romanojn kiujn li mem verkis kaj tradukis pri ĉina temo. La unua kun titolo *Murdo per la Ĉina Sonorilo* estis rifuzita de la eldonisto pro tro densa koloro de opono kontraŭ budaismo, sed la alia romano *Murdo en la Ĉina Labirinto* estis akceptita de la eldonisto pro iom da

erotikaj priskriboj. Dum la eldona proceso la japana eldonisto persistas pri aperigo de nuda virino sur la kovrilo por altiri atenton de aĉetontoj. Tamen Gulik havas alian opinion. Li trovis la proponatan bildon malakorda al la epoka fono en la romano. Aŭ, eĉ se bildo estus vere necesa por la kovrilo, oni devas uzi veran erotikan pentraĵon en la antikva Ĉinio. Gulik do dissendis leterojn respektive al komercistoj de antikvaj objektoj en Ĉinio kaj Japanio, por serĉi tiajn bildojn. Ekster lia atendo, mastro de antikvaĵa vendejo en Kioto rapide respondis al li, kun konsento transvendi al li albumon de kompleto el 24 bildoj, lignogravuritaj kaj kvinkolore presitaj en Ming-dinastio, kun titolo *Flora Formacio*. Tio estas la *Erotika Albumo* farita en la erao Wanli (1573-1620). Krome, alia librejo en Ŝanhajo ankaŭ konsentis proponi al li similan albumon faritan en lastaj jaroj de Ming-dinastio por lia mankopio.

Jam delonge Gulik interesiĝis pri la lignogravuritaj bildoj de Ĉinio, nun en favora hazardo li ekvidis tiujn albumojn de erotikaj bildoj delikate gravuritaj, ekde tiam Gulik komencis sian studon pri la seksa vivo en la tradicia socio de Ĉinio. Li faris multajn notojn kaj cite kopiis el deko da raraj libroj tiel ricevinte materialojn en dekmilojn da vortoj. Gulik persone stencilis per delikataj literoj, kaj presis ĉion kune kun la 24 bildoj kaj surskriboj de la albumo *Flora Formacio* akirita de la antikvaĵa vendejo de Kioto, mimeografe eldonis 1951 en Japanio.

Tiu ĉi libro kun titolo *La Erotikaj Koloraj Bildoj en Ming-dinastio* (Erotic Colour Prints of the Ming Period) siatempe estis presita nur je 50 ekzempleroj. Laŭ rimarko far aŭtoro, ĝi ne estu cirkuligata publike sed estis dissendita al la ĉefaj institutoj de ĉinologio, ŝtataj bibliotekoj, famaj muzeoj, universitatoj aŭ esploraj institucioj tra la mondo, en gardema deponado por la studo de kleruloj aŭ zorgema konservo de intimaj amikoj. Inter la nomaro de adresatoj tamen troviĝas neniu en Ĉinio. Post sia aperigo, tiu ĉi libro donis grandan influon en la rondo de ĉinologio. Nemalmultaj ĉinologoj ekz. D-ro Joseph Needham (1900-1995) kc korespondis diskute pri tiu temo kun Gulik. Post jardeko da vasta kolektado kaj studo de materialoj, Gulik pliampleksigis kaj reviziis la enhavon de la unua volumo de *La Erotikaj Koloraj Bildoj en Ming-dinastio* kaj eldonis en 1961 novan libron kun titolo *La Seksa Vivo en la Antikva Ĉinio* (Sexual Life in Ancient China). Por eviti eventualan misinfluan al la publiko, Gulik tradukis ĉiujn citaĵojn kaj terminojn de la antikva ĉina seksologio per skribo en latina lingvo, ĝuste laŭ la stilo de tiaj eldonaĵoj en la epoko sub regado de la reĝino Alexandrina Victoria (1819—1901). Tiel la libro *La Erotikaj Koloraj Bildoj en Ming-dinastio* de Gulik meritplene fariĝis la praverko en la studado pri la seksa kulturo de la antikva Ĉinio. Gulik, kiel fremdulo, neĉino, kun granda sentima kuraĝo kaj la spirito de pioniro, plenumis taskon malfacile plenumeban eĉ por ĉinoj, ŝtopante la vakajon de academia esploro por Ĉinio. Vere admirinda bravo!

Estas du ĉefaj malfaciloj por verki tiun ĉi libron. Unue, manko de materialoj, ĉar la tasko estas senprecedenca; due, la temo estas speciala, fakte tabua. Dum multaj jaroj la cirkonstanco restis same senŝanĝa: “Se iu klerulo aŭdacas verki pri tiu ĉi speciala temo, li estas tuj mokata de publiko per nazbruo” (p.27)

Pli ol 40 jarojn post kiam eldoniĝis *La Erotikaj Koloraj Bildoj en Ming-dinastio*, aperis ankaŭ la ĉina traduko sed kun indiko "nur por interna distribuado". Tempo pasis. Kune kun la disvolviĝo de la reformo kaj malfermo de Ĉinio, tiu ĉi ĉina eldono estas permesata vendiĝi ankaŭ publike. La ĉina traduko estis eldonata kaj distribuata de la Guangdong-a Popola Eldonejo en 1992. Tradukis s-ro Yang Quan per serioza ĉinigo. Fajna preso. Bedaŭrinde ne kompleta eldono, ekz-e la tria kajero *Flora Formacio* estis ekskluzive forigita. *Flora Formacio* estas unu el la erotikaj koloraj bildoj, kiuj furoras dum lastaj jaroj de Ming-dinastio. Ĉar erotikaj bildoj temas pri seksa vivo, nature tre ofte fariĝis la objekto de la kampanjo far registaro por forbalai "pornografiaĵojn". Distingiteco de Gulik kuŝas je tio, ke li havas tiel superan kuraĝon, sagacon kaj originalan klarvidecon, scipovante vidi mirindaĵojn el "dekadencaĵoj" kaj eĉ transformigi la dekadencaĵojn mirindaĵoj. Ke li sukcesis fari tion, antaŭ ĉio devas danki al lia animstato: Gulik havas virton (sed neniom da perverso) en sia animo kaj konsekvence pli superan ideon. Lia motivo estas korekti la antaŭjuĝojn de okcidentuloj, plenenergie pledante ĉinan civilizacion. Gulik justame kaj malkaŝeme riproĉis la novajn kaj malnovajn disertaciojn de okcidentuloj kiuj senrespondece malhonori ĉinan civilizacion "amaso da centprocentaj senvoloraĵoj". Prenante la albumojn *Superba Amoro* kaj *Flora Formacio* realaj ekzemploj, Gulik pruvis ke la ĉinaj lignogravuritaj bildoj de Ming-dinastio jam atingis la unuarangan fajnecon; ke la kapablo de ĉinaj pentristoj en pentrado de nudaj korpoj estas neniom malpli lerta ol tiu de la okcidentaj artistoj; ke la erotikaj koloraj bildoj de Ĉinio povas esti rigardata kiel pioniro de ukijo de Japanio. Tiuj verkaĵoj havas neneglekteblan signifon por studo pri la historioj de arto, kulturoj kaj medicino. Dank' al sia erudicio, Gulik havas pli vastan rigardangulon kaj povas fari komparan studon pri samspecaj materialoj de Ĉinio, japanio kaj Hindio. Tio estas lia elstara kontribuo.

En vintro de 1994, Guozhu kaj Sceto havis ŝancon kunloĝi en Kantono pli ol tri monatojn (1994-08-24/12-09). Tage ni tradukis aŭ verkis en Esperanto. Post vespermanĝo ni promenis sur stratoj. En proksima librejo ni aĉetis la ĉinan eldonon (nekompletan) de *La Erotikaj Koloraj Bildoj en Ming-dinastio* de Gulik. Tio vekis nian vastan babilon pri beletro. Poste, Guozhu verkis la eseon *Neforgesebla Mirpoemaro* kaj per jardeko da klopodo esperantigis la 24 poemojn de la albumo *Flora Formacio*; dume Sceto verkis originale la novelon *La Resurekto*, kiu poste servis kiel la enkonduka novelo por la ĉineska poemaro *Ovra Burĝono* (1994). Mi devas rimarki la pozicion de la libro *Ovra Burĝono* en la Esperanta literaturo. Ĝi

estas la unua ĉineska (eĉ erotika) poemaro originale verkita de ĉina esperantisto. Poste Guozhu faris ĝin eLibron (2003), adaptigante per la erotikaj bildoj de Ming-dinastio kiujn akiris Gulik en Japanio. Papera eldono de *Ovra Burĝono* aperis nur en la vintro de 2009 en limigita kvanto. Imitante al la precedenca ago de Gulik siatempe pri *La Erotikaj Koloraj Bildoj en Ming-dinastio*, la libro *Ovra Burĝono* estas disponebla ne per publika vendado sed ankaŭ per disdonado al amikoj por akademia studo. Parolante pri la agado de Gulik, nun ni sentas lin feliĉa ke li havas la ŝancon kolekti tiujn rarajn kuriozaĵojn en Japanio. Se li agus en Ĉinio, ho ve, la unua probable estus ke li sukcesos akiri nenion; kaj la dua probable estus veki diplomatan konflikton kaj li estus proklamita nebonveninda homo.

Guozhu:

Malica Prohibo

--- laŭ ĉinesko Yumeiren*

Ho, malica prohibo

al mia skribo

pri jubileo kara

de Gulik, ĉinolog' centjara.

Pro unu vorto "nuda"

kondamno kruda!

Kial tiel timema

antaŭ la verko gema, krema?

(2010-08-11)

* Yumeiren (Belulino Yu): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5; 7,9; silaboj kun para rimo.

2010-8-22



Rita Mkrtĉjan (Armenio)

Esperanto en ni, aŭ ni en Esperanto?

(La artikolo estis verkita en 2013 kaj aperigita en revuo "ESPERANTO", tamen ĝi restis aktuala ankaŭ hodiaŭ.)

Probable ne estas esperantisto, kiu ne ŝatus rememori sian unuan ekscion pri tiu ĉi miriga lingvo, pri studado, pri sia unua Universala Kongreso kaj unuaj amikoj-esperantistoj.

Esperanto ne estas nur hobbio kaj ne estas nur lingvo, posedo de kiu helpas komunikiĝi, Esperanto fariĝis parto de nia vivo, eble ĝi estas nia tuta vivo.

Grandegaj ŝancoj de sociaj retoj, novaj organizaj strukturoj, ekspansio de internaciaj renkontiĝoj, plimultiĝo de tradukita kaj originala literaturo, konkursoj kaj eĉ filmofestivaloj — ĉio ĉi atestas, ke Esperantujo fariĝis grandega, moderna, evoluinta lando kun kreskanta loĝantaro.

Sed, kial en iuj landoj ne estas progreso en la Esperanta movado, aŭ okazas malprogreso? Ĝuste diris en sia intervjuo H. Tonkin: “Foje ŝajnas, ke, kontraŭ ĉiu esperantisto, kiun ni nove envagonigas, unu elfalas el la kontraŭa pordo”. Ĉagrena humuro, sed tre preciza.

La kialoj estas multaj. Ekzemple ekzistas landoj, kie ne eblas diskonigi Esperanton, ĉar al iuj “patriotoj” ŝajnas, ke la internacia lingvo povas iel subpremi la nacian lingvon. Alia kialo sidas en ekonomiaj kaj sociaj problemoj de la popolo, kiu alcelas sian ĉiutagan panon. La samaj problemoj ne permesas, ke multaj esperantistoj partoprenu internaciajn renkontiĝojn, kiuj ĉiam aldonas novan spiron al Esperanto. Bedaŭrinde ekzistas ankaŭ internaj kaŭzoj, kiuj ne malpli gravas ol la eksteraj.

La fama rusa reĝisoro, aktoro, instruanto Stanislavskij diradis: “AMU ARTON EN VI, sed NE VIN EN ARTO!”

Ĉi aforismo povas esti aplikata al Esperantistoj, precipe tiuj, kiuj deziras aktive kunlabori, agadi, estri asociojn aŭ unuiĝojn, devas fari ĉion por la sukceso kaj prospero de la lingvo Esperanto, pensi ne pri “MI”, “MIA”, sed labori por la komuna intereso kaj utilo.

Tamen ofte okazas, ke esperantisto foriras nur pro tio, ke ne ĉiuj konsentas pri lia opinio aŭ decido, forgesante, ke ni ĉiuj ne estas konstruantoj de la propra “piedestalo”, sed estas membroj de granda familio, kiu laboras por evoluo kaj akcepto de la internacia lingvo.

Kion devas fari landa asocio aŭ unuiĝo por revivigi la antaŭajn entuziasmon kaj aktivecon en laboro? Necesas uzi sperton de alilandaj Esperanto-asocioj, esti atentemaj al novaĵoj, memori, ke informa kaj financa agadoj devas esti travideblaj, organizi kursojn kaj uzi por tio ĉiujn informajn eblojn.

Ege gravas akiri novan literaturon en Esperanto. Por stimuli Esperantan agadon kaj instrui novajn lernantojn, la asocio (unuiĝo) devas nepre havi vortarojn, lernolibrojn, libroservon.

Unu el la vortoj, kiuj ekzistas en pluraj lingvoj, sed nur en Esperanto havas specialan signifon, estas la vorto "samideano".

Estus bone, se ĉirkaŭ ni estu pli multe da samideaj homoj. Tio ĉi dependas kaj de la prezidantoj kaj de ĉiuj esperantistoj.

Ĉio ordiĝos kaj direktiĝos laŭ ĝusta vojo nur tiam, kiam ni amos ne "NIN EN ESPERANTO", sed "ESPERANTON EN NI".

La mondo ŝanĝiĝis ekde tiam, kiam multaj el ni esperantistiĝis, sed la respekto al aliaj nacioj kaj kulturoj, la amika kaj ĝentila sinteno ne malaperu, ĉar de tio komenciĝis nia konatiĝo kun la historio de la lingvo Esperanto.

Homoj estas kreitaj tiel, ke malgraŭ limoj, diverseco, aĝo, ili ĉiam volas komunikiĝi kaj dank' al ĝusta organizado de la laboro, individuoj nepre interesiĝos pri la lingvo Esperanto, kiu unuiĝos homojn labori kaj vivi "en" kaj "por" Esperanto.

Komento de Jean-Claude Roy

Bona eseo pri nia situacio. Gratulon Rita

Al mi ankaŭ plaĉas la frazo de Humphrey!

Tamen, miaopinie, niaj precipaj problemoj por eventuala progreso de nia afero estas:

Unue multaj esperantistoj (homoj, kiuj bone parolas Esperanton) ne interesiĝas pri nia idealismo, nia strebo al unuiĝo de nia homaro. Por multaj el ni, Esperanto restas hobia.

Dua problemo (ĉiam miaopinie)

Ne ekzistas vera trafa celo por la disvastigo de la uzo de Esperanto kaj do ne ekzistas strategio kaj agadplano kaj efika lunlaboro por sukceso.

Konklude: malgraŭ multaj tre (tro?) diversaj agadoj, Esperanto stagnas.

Pri la unua problemo, ne eblas agadi nuntempe

Pri la dua problemo, evidente eblas ŝanĝi tion. Kiel kaj kion fari?

Miaopinie estas eble nur unu eblo : instrui en lernejoj elementaj kaj mezaj; instrui la lingvon kaj ĉefe instrui la internan ideon, tre gravan por la paco en nia mondo.

Krom tiu instruado en multaj landoj, necesas krei la kondiĉojn por ke la gentoj proksimiĝu, amikiĝu, grandskale kaj multifacete interrilatu.

Sen bona agaplano, tiu malbona situacio de Esperanto ne evoluos aŭ eĉ malboniĝos.

Obstine antaŭen!

Paŝo post paŝo kaj persisteme kaj ne flankiĝante ni atingos la celon.



Vilhelmo Lutermano (Germanio)



Evoluo de Ĉinio signifas evoluon de ĉiuj triamondaj landoj

Vilhelmo Lutermano

Vilhelmo Lutermano estas germana esperantisto, kiu aktive tradukas germanan literaturon en Esperanton kaj viglas en la maldekstra Esperanto-movado. Li naskiĝis en 1936 en norda Germanio kaj esperantistiĝis en 1987. Li estas ĉefredaktoro de la Esperanto-versio de Le Monde diplomati-que (<http://eo.mondediplo.com>). Li delonge loĝas en Kubo kun sia edzino kaj fondis familion en la lando.

Li opinias, ke Kubo estas entute simpatia pro sia principo de socia justeco en la lando mem kaj ankaŭ pro sia internacia solidareco. Lastatempe, pri la kunlaboro inter Kubo kaj Ĉinio kadre de la iniciato "La Zono kaj Vojo", El Popola Ĉinio intervjuis lin.

El Popola Ĉinio: Kia estas la vivo de ordinaraj homoj en Kubo? Ĉu vi iam renkontis ĉinojn laborantajn kaj loĝantajn en Kubo?

Vilhelmo Lutermano: La situacio de ordinaraj homoj ĉi tie estas tre malfacila kaj eĉ pli graviĝis pro la epidemio de KOVIM-19, kontraŭ kiu Kubo ja tre rapide havis bonajn vakcinojn (mi mem estis tuj vakcinita per la vakcino Soberana). Sed pro la epidemio la turismo, unu el la ĉefaj ekonomiaj pilieroj de la lando, dum jaroj tute nuliĝis, kaj la sekvoj, aldone al la usona blokado, estas serioza reduktiĝo de la vivnivelo al klopodo de simpla transvivado por la ordinaraj homoj.

En Havano ja ekzistas ĉina kvartalo, kun multaj ĉinaj restoracioj – kelkaj kun vere ĉinaj kuiristoj, sed la ĉinoj tie, kiuj parolas la ĉinan, estas tre malmultaj. Ekzistas Konfucea Instituto, kiu instruas la ĉinan, ligitan kun la universitato. Mi mem lernas la ĉinan – memlerne per lernolibroj kaj telefonaj aplikaĵoj, ĉar mi intencas viziti vian landon – la ĉinaj amikoj asertis al mi, ke mi ne bezonas koni la ĉinan, ĉar mi estos ĉiam akompanata de ĉinaj esperantistoj, sed via lingvo mem, ŝarĝita de jarmiloj da

kulturo, tre interesas min kaj mi eĉ esploras la eblecon plu lerni ĝin en Ĉinio mem. El Popola Ĉinio: Vi scias pri la ĉina iniciato "La Zono kaj Vojo". Fakte, kompare kun la komenco, eĉ kompare kun la pasinta jaro, la iniciato multe vastiĝis, kiel vi pensas pri ĝi kaj ĉi tiu ŝanĝo?

Vilhelmo Lutermano: Okaze ni ankaŭ nomas ĝin Nova Silkovoyo. Laŭ mia observo, ĝi sekvas la ĝeneralan principon de ĉinaj eksteraj politiko kaj komerco, nome agi surbaze de reciproka gajno, ne por la elitoj de la koncerna lando, sed por la popoloj. Tiu principo estas komprenata kaj akceptata de ĉiam pli da landoj, pro la intertempe jam videblaj avantaĝoj. Cetere mi vidas similecon ankaŭ kun la principoj de la nune kreskanta BRICS-grupo (Brazilo, Rusio, Hindio, Ĉinio kaj Sud-Afriko), kiu fine de ĉi aŭgusto kunvenis kaj faris gravajn decidojn. Ambaŭ iniciatoj montras prosperigan vojon al la estonteco de la homaro.

El Popola Ĉinio: Nun, kadre de la iniciato "La Zono kaj Vojo", Ĉinio kaj Kubo kunlaboras en biomedicino kaj agrikulturo, kion vi opinias pri tiuj kunlaboroj?

Vilhelmo Lutermano: Mi havas grandajn esperojn por bonaj reciprokaj rezultoj, ekzemple en biomedicino, ĉar Kubo ja sukcese investis multan energion kaj laboron de multegaj homoj kaj en medicina kaj en biomedicina esplorado. Pri la teknikoj de silkoproduktado per moruso kaj silkraŭpoj, Ĉinio kompreneble havas tre valorajn miljarajn spertojn, kiujn Kubo per tiu projekto povos akiri, sed pri la detaloj mi ankoraŭ devos informiĝi.

El Popola Ĉinio: Kiaj estas viaj atendoj pri la estonta kunlaboro inter Kubo (kaj aliaj landoj najbaraj al Usono) kaj Ĉinio, kaj la interŝanĝoj kaj kunlaboroj inter esperantistoj de ambaŭ flankoj?

Vilhelmo Lutermano: Mi esperas, ke la amikecaj rilatoj kun Ĉinio baldaŭ kondukos al plibonigo de la ekonomia situacio en Kubo. Tiaj rilatoj absolute necesas por rompi la mortigan usonan blokadon. Feliĉe kromaj najbaraj landoj, ekzemple Honduro, nun ankaŭ iras la amikecan vojon kun Ĉinio. Bonaj rilatoj de ĉiuj ĉi latinamerikaj landoj kun Ĉinio estas antaŭkondiĉo por vere sendependiĝi el la usona politika kaj ekonomia premado.

Kaj estas necese, ke ankaŭ la esperantistoj komprenu tion kaj ke ili energie intervenu en la diskutadon pri la okcidentaj provoj "senriskigi" kaj "diversigi" siajn komercajn rilatojn kun Ĉinio – provoj kiuj vere celas malhelpi la evoluon de Ĉinio kaj kiom eble plej longe konservi la okcidentan (usonan) dominadon. Necesas ke la esperantistoj komprenu, ke la evoluo de Ĉinio signifas evoluon de ĉiuj ceteraj triamondaj landoj, kaj ke ili esprimu tion en Esperanto kaj ankaŭ en siaj propraj naciaj lingvoj. Ili pli ol nun sur ĉiuj kontinentoj fariĝu perantoj de la estonteco.

El Popola Ĉinio: Multaj ĉinaj esperantistoj malmulton scias pri Kubo kaj tiea Esperanto-movado. Ĉu vi povas diskonigi ĝin al ni?

Vilhelmo Lutermano: Kubo, insularo en la suda proksimeco de Usono, jam de jardekoj suferas krudan usonan blokadon en financo kaj komerco, kiun ankaŭ mi spertas. La vivkondiĉoj pro tio estas kelkfoje tre akre tuŝitaj. Aktuale Kubo, tre dependa de internacia turismo, suferas la mankon de eŭropaj turistoj, ĉar pro la ekonomia krizo en Eŭropo, precipe en Germanio, granda parto de ties turistoj jam ne povas pagi la pli multekostan flugbileton al tiom fora turismejo. La kuba Esperanto-movado estas vigla, tamen ĝia aktiveco draste reduktiĝis dum la KOVIM-19-a periodo, kaj nun iom post iom reakiras sian antaŭan vigecon.

El Popola Ĉinio: Ĉu vi scias pri Esperanto-movado en Ĉinio? Kion vi pensas pri ĉinaj esperantistoj kaj ĝia Esperanto-movado?

Vilhelmo Lutermano: Mi havas diversajn bonegajn rilatojn kun ĉinaj esperantistoj kaj eldonas iliajn librojn. Mi alte taksas ilian tradukadon de la riĉa klasika literaturo, faritan precipe de Wang Chongfang kaj de Vejdo. Cetere mi pensas, ke ĉinoj, pro la interesaj ecoj de sia propra lingvo, povus ludi gravan rolon por antaŭenigi Esperanton en ties fundamenta senco – do en la senco de la fundamento de Esperanto, per uzado de vortoj el kunmetaĵoj anstataŭ uzi plurmilojn da fremdvortoj, per kiuj la lingvo proksimiĝas al naciaj lingvoj kaj per tio ĉiam pli perdas sian ekzistorajton. Do, miaopinie, ĉinoj povas savi Esperanton per uzado de sia propra vortfarado anstataŭ imiti la eŭrop-centran stilon de fremdvort-emo.

Intervjuita de **Chen Ji** kaj **Xie Ruifeng**

el El Popola Ĉinio

